

ESPERANTOLOGIO

INTERNACIA REVUO POR LA LINGVISTIKO KAJ BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO

Vol. II (p. 73—168)

Julio 1961

N-ro 2

Redaktata de D-ro PAUL NEERGAARD, Ak., Kopenhago, Danlando.

Redakta komitato: Profesoro, d-ro E. BOKAREV, Moskva, Sovet-Unio . profesoro, d-ro BJÖRN COLLINDER, Uppsala, Svedujo . profesoro, d-ro W. E. COLLINSON, Ak., Liverpool, Britujo . docento, d-ro KALOMANO KALOCSAY, Ak., Budapest, Hungarujo . profesoro NAOKAZU KAWASAKI, Ak., Osaka, Japanujo . profesoro S. LA COLLA, Ak., Milano, Italujo . d-ro WALTER LIPPMANN, Ak., Hamburg, Germanujo . d-ro W. J. A. MANDERS, Ak., Venlo, Nederlando . profesoro, d-ro EDMOND PRIVAT, Ak., Neuchâtel, Svislando . profesoro, d-ro G. JOHN RAMSTEDT †, Helsinki, Finnlando . magistro VILHO SETÄLÄ, Ak., Helsinki, Finnlando . profesoro G. WARINGHIEN, Ak., Paris, Francujo . docento d-ro EUGEN WÜSTER, Wieselburg, Aŭstrujo.



ENHAVO

K. KALOCSAY: Waringhien (poemo)	73
Portreto de Gaston Waringhien	75
PAUL NEERGAARD: Gaston Waringhien, 1901—1961	75
EDMOND PRIVAT: Hommage à Gaston Waringhien	80
WILLIAM AULD: Neoficialaj vortoj en la poezio de Hohlov kaj Miĥalski	82
ANDREO ALBAULT: Etimologio, pra-Esperanto kaj Mistrala lingvo	87
W. E. COLLINSON: Pri kelkaj kulturvortoj	93
D. B. GREGOR: La funkcio de la derivita adverbo en Esperanto	100
H. A. de HOOG: Interplektitaj frazoj	109
K. KALOCSAY: La waringhiena verbodivido	118
N. KAWASAKI: Konsonantkombinoj ĉe radikkomenco	123
PAUL NEERGAARD: Demokrateco ĉe vortelektio kaj vortderivado en lingvo internacia	127
W. MANDERS: „Latino macaronico“	136
KENJI OSSAKA: Gramatika karaktero de la sufiksoj „in“ kaj „um“	139
J. RÉGULO PÉREZ: Ĉu Nepalo aŭ Nepalujo?	145
EBBE VILBORG: Esperantigo de grekaj nomoj	152
VILHO SETÄLÄ: Pri la artikolo, precipe en esperanto	159
J. C. WELLS: Indikoj per Esperanto de angla prononco	163

EINAR MUNKSGAARD • PUBLISHER • COPENHAGEN • DENMARK

ESPERANTOLOGIO

Internacia revuo por la lingvisti-
ko kaj bibliografio de Esperanto.

Redakcia adreso / Address (editorial matters): D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago / Copenhagen K, Danlando / Denmark.

Administracia adreso (abonoj k. s.) / Address (subscriptions etc.): Ministeria sekretario Eskil Svane, Lindegårdsvej 28 C, Kopenhago/Copenhagen, Charlottenlund, Danlando/Denmark.

ESPERANTOLOGIO aperas per kajeroj 48—80-paĝaj formantaj volumojn 250—300-paĝajn. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo probable kov-ranta ĉ. tri jarojn. La abonpago por unu volumo estas 35 ŝilingoj anglaj aŭ 6 us. dolaroj aŭ 35 danaj kronoj.

La revuo estas destinita por la studo de Esperanto kaj akceptas traktaĵojn bazitajn sur originalaj esploroj el la kampo de la Esperanta lingvistiko inkludante i. a. fone-tikon, leksikologion, etimologion, sintakson, stilistikon, lernopsikologion kaj biblio-grafion.

La respondeco pri asertoj, ĉu temas pri faktoj aŭ opinioj, restas tute ĉe ties aŭtoroj. ESPERANTOLOGIO appears in issues of 48—80 pages, forming volumes of 250—300 pages. The issues will come out according to circumstances, one volume covering probably about 3 years. The subscription for one volume is 35 shillings, 6 dollars or 35 Danish crowns.

The journal is devoted to the study of Esperanto and accepts papers based on ori-ginal research in the field of Esperanto linguistics including e. g. phonetics, lexico-logy, etymology, syntax, stylistics, psychology of learning and bibliography.

The responsibility for statements, whether of fact or opinion, rests entirely with the writers thereof.

INSTRUKCIOJ

por kunlaborantaj de
ESPERANTOLOGIO

- 1) *Manuskriptoj* proponataj por pub-likigo kaj komunikoj pri redakciaj aferoj estu sendataj al la redaktoro D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K, Danlando.
- 2) Manuskriptoj estu verkitaj en Es-peranto, angla, franca aŭ germana kaj tajpitaj kun duobla interlinia spaco sur nur unu flanko de ne tro maldika papero, kun sufiĉe larĝa marĝeno ĉe la maldekstra flanko de la paĝo. Ili prefere estu sen-dataj duekzemplere por ŝpari tem-pon ĉe la prijuĝado. Kontribuaĵo enhavanta lingvajn aŭ formalajn erarojn povas esti resendata al la aŭtoro por korektado.
- 3) Traktaĵoj jam publikigitaj en unu el la supre menciitaj lingvoj aŭ ali-loke prikonsiderataj ne povas esti akceptataj.

[daŭrigota sur p. 3 de la kovrilo]

INSTRUCTIONS

for Contributors to
ESPERANTOLOGIO

- 1) *Manuscripts* submitted for publica-tion and communications concern-ing editorial matters should be sent to the editor, dr. Paul Neer-gaard, Gothersgade 158, Copenha-gen K., Denmark.
- 2) Manuscripts must be written in Esperanto, English, French or Ger-man and must be typed double space on one side only of a not too thin paper, with a fairly wide margin on the lefthand side of the page. It should be sent preferably in duplicate in order to save time in judging. A paper containing lan-guage or formal errors can be re-turned to the author for correction.
- 3) Papers already published in one of the above mentioned languages or under consideration elsewhere can-not be accepted.

[continued on p. 3 of the cover]

- 4) Ni rekomendas, ke traktaĵo estu dividata en sekciojn, ĉiu provizita per titolo. Klareco kaj koncizo estas esencaj.
- 5) Bibliografiajn referencojn indiku per la nomo de la aŭtoro sekvata per la jaro: (MOCH 1907) aŭ Moch (1907). La bibliografion oni metu en la fino de la artikolo kun ĉiu indiko redaktita jene:
COLLINSON, W. E., 1927: La homa lingvo, Berlin.
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) Ni presigas ĉiujn ekzemplojn pri vortformoj *kursive*, kaj tiajn ekzemplojn oni bonvolu substreki en la manuskripto (ne substreku ion alian). Se la aŭtoro deziras emfazi nemultajn gravajn vortojn aŭ frazojn koncizajn, oni substreku tiujn ĉi per rompita linio, kaj ili estos presataj interspacigite. Ĉiuj personaj nomoj estas presataj per malgrandaj ĉefliteroj: MOCH, kaj povas esti tajpataj tute per ĉefliteroj: MOCH.
- 7) Oni finu la artikolon per konciza kaj klara resumo redonanta la plej gravajn punktojn de la teksto.
- 8) La aŭtoro ricevas unu, se necese du presprovaĵojn de sia artikolo. Korrektoelspezoj, kiuj superas 10 % de la kosto de la kompostado, devas esti pagataj de la aŭtoro.
- 9) La redaktoro bedaŭras ne povi honorarii artikolojn akceptitajn.
- 10) *Represaĵoj*. Ĉiu kontribuinto ricevas 2 ekzemplerojn de la kajero enhavanta lian artikolon. Senkostaj represaĵoj ne estas je dispono. Tarifo estas havebla ĉe la redaktoro kaj la aŭtoroj povas mendi represaĵojn.
- 4) It is recommended that papers be divided into sections, each headed by a caption. Clearness and conciseness are essential.
- 5) Text references should be made using author's name followed by the year: (MOCH 1907) or Moch (1907). The bibliography should be placed at the end of the article and arranged in alphabetical order. — Each item should be set out as follows:
COLLINSON, W. E., 1927: La homa lingvo, Berlin.
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) We print all examples of word-forms with *italics*, and such examples should be underlined in the manuscript (do not underline anything else). If the author wants to emphasize a few important words or short sentences these should be underlined with a broken line and will be printed with spaced type. All personal names are printed with small capitals: Moch, and may be typed entirely with capitals: MOCH.
- 7) The article should conclude with a short, clear summary reviewing the important points in the text.
- 8) The author receives one, if necessary two proofs of his article. Correction costs which exceed 10 % of the type-setting costs must be paid by the author.
- 9) The editor regrets not to be able to pay any fee for articles submitted.
- 10) *Offprints*. Each contributor will receive 2 copies of the issue in which his article is published. No gratis offprints will be supplied. A schedule of prices is available and authors may secure offprints by placing an order.

Waringhien

Tra l'Esperanta mondo sonoru nun
Alkaje alta kant' pri Waringhien
omaĝe al la sesdek jaroj
plenaj abunde de bonaj fruktoj.

Ĉu tro patose do? Ĉu li kun grimac'
ĝin prenos eble? Povas okazi, ĉar
la flat-siropon li ne amas,
preta je mok' pri la incensfumoĵ.

Nun tamen sonu, sonu la laŭda od'
eĉ spite lin! La verda popolo jam
konsciu, kiom ĝi malriĉus
sen lia entuziasma saĝo!

Li ĝin instruas pri l'senerara vers'
kaj pri la ĝusta uzo de vorttrezor',
li: trezoristo de la lingvo,
gardo fidela de l'orrezervoj.

Per li kreiĝis el la leter-arkiv'
de l'lingv-aŭtor' la kor-emocia verk':
la tragedio Zamenhofa,
dramo sesakta de dorn-kronulo.

Praesperantojn vivi revokis li,
Postesperantoj sub lia esplori'
kvalifikiĝis malsufiĉaj
inde rivali al Esperanto.

Per li parolas al ni kun alta art'
sagaco senreviĝa de Rochefoucauld,
kaj la irana skeptikulo,
tiu vinama saĝulo, Kajjam,

kaj tramp' Villon kaj princo de Orlean',
kaj du Bellay, pirato de l'arta bel',
Verlaine, pia lascivul', kaj
papo severa de simbolismo,

Mallarmé — Oriento kaj Okcident'!
Jen la Eseoj kun sia kon-abund',
spicitaj tiel, ke vi povas
frandi, lekante la lipojn ĝue.

Babili dokte — jen lia majstra pov'!
Necesus ronde sidi kaj aŭdi lin,
kaj per delic' de li verŝata
lerni la amon al Esperanto.

Necesus multmilope akiri kaj
— popolo alfabeto! — legadi lin,
plezuri pri l' racio luma,
ĝusta mezur' kaj atika salo!

Kaj kion porti el mia koro nun
al plur-jardeka kunklopodanto, al
amik' en plena harmonio,
en kunagordo de puro pleja?

Li estis por mi dum tiu longa temp'
legant' unua, de plej unua grad',
kaj ol la frato frat' pli frata,
helpo, apogo kaj instiganto.

Ni rompis vojon kune per akra fer'
tra densa denso de l'gramatik-ĝangal',
por al lingvuzo zamenhofa
ĉiuiireblan aleon meti.

Ni kune pekis per tiu Fakvortar'
de Poezio, kiu resonis en
du kontinentoj per skandalo,
sed ĉe poetaj animoj lante

azilon trovis kaj plu ĝin anatem'
ne trafas (eble sole sur aŭstra ter'),
ĉar venkas la deviz' aŭdaca:
Riĉu la lingvo por alti arte!

Ni kune luktis kun la metala vers'
Baudelaire-a, ĝis nin, post ia jar-dudek',
la Floroj ĉarmis Esperante
per la arom' de matura lingvo.

Ni kongresadis kune Parize kaj
Viene, gajaj, en (relativa) jun'.
Pri l' vienaĵ' raportis Maŭra,
bona poeto, amik' mistera.

Ni kune donis en nia koro kaj
komuna lingvo hejmon al Ekzilit',
romantikul' romantik-rompa,
sprita Lazaro: al orfa Heine.

Kion rakonti pri la revid-minut'
en Budapeŝt, somere de 59?
Post fulmo pli mallumas nokto,
eĉ se defore la fajro glimas.

Jes, kune, jes, sed el kia malproksim'
respondis argumento al argument'
en la diskutoj gramatikaj!
Kaj delikata sopir-ĝemeto


Sed for kortuŝ'! *Maiores canamus!* En
Alkaja formo altu la voĉo pli!
La odo diktas, kiel decas,
laŭdi merite la laŭdindulon!

el „douce France“ al la Danuba bord'
kaj de ĉi tie poste returne al
Francujo flugis plurajn fojojn
ĝis la ricevo de pura formo.

Li estas, sola, en si mem, institut'
por dokta varto de l'poezia bel',
por la logik' sen algluiĝo,
por l'unueco, la forto-fonto.

Ni danku por klopod' memofera, por
donac-prodiga viv' kaj obeu lin,
paŝtiston, kiu pelas ame
al Helikono la esperantojn!

K. Kalocsay.



Gaston Waringhien

1901 — 29-an de julio — 1961

„La perfido de la kleruloj’ . . . Kiel ofte tiu fama titolo de la pamfleto de Juliano Benda revenis al mi en la memoron, ĉiufoje kiam mi havis okazon konstati la nescion de eĉ eminentaj filologoj pri la elementaj faktoj de internacia lingvo, ĝenerale, kaj, aparte, de Esperanto! Perfido, ne rilate al ni — ni ne estas tiel pretendemaj, kaj ni ja komprenus, se spiritoj pli sentemaj al la forma ol al la socia aspekto de la problemo preferus aliajn solvojn ol la nian. Sed perfido rilate al ilia profesio mem, perfido al la lingvistiko“.

Tiel WARINGHIEN enkondukas sian belan, lume klaran kaj dokumentoabundan libron *Lingvo kaj Vivo* parolante pri la ignorado de la lingvistoj, ne al iu lingvo sin kaŝanta en ĝangalo aŭ forgesita en dezerta regiono aŭ atingebla en fora mondangulo per ekspedicioj trans la barado de Andoj aŭ de Himalajo, sed la ignorado al lingvo ĉiutage parolata ĝuste sub iliaj okuloj aŭ ĉe iliaj oreloj — la disvolviĝo de iu kabineta projekto sur kelkaj paĝoj de broŝureto en lingvon vivantan de kelkcent mil homoj, mallonge, la inerto, kiun montras lingvosciencistoj al la fenomeno, ke por la unua fojo en la homa historio oni povis ĉeesti la naskiĝon de nova lingvo.

Sed la iom amarajn vortojn ne eldiras elreviĝinto, seniluziiĝinto. La 450-paĝa volumo mem, matura frukto de vivolonga, skrupula, kaj ni estu permesataj diri ama, scienca esplorado de Esperanto, de ĝia antaŭhistorio, de ĝia formiĝo el siaj skizaj trajtoj al lingvo vivopulsanta, de filologiaj kaj sociaj aspektoj de tiu disvolviĝo, ĉio ĉi estas ja ia feliĉa memkontraŭdiro, ke la lingvistiko forgesis la studadon de Esperanto! Neniu povas kontesti, ke pli ol iu ajn alia scienca esploro de tiu ĉi lingvo, la objekto de nia omaĝo hodiaŭ, mem alte erudicia faka filologo franca kun profunda kultura fono de la klasikaj lingvoj helena kaj latina, kontribuis al la formiĝo kaj solida fundamentigo de la aspirata nova branĉo de la lingvistiko, la esperantologio. Neniu motivigo estas bezonata por la hodiaŭa fokusigo de niaj pensoj, de nia admirado kaj estimado kaj de niaj varmaj bondeziroj, kies esprimo estas la aperigo de tiu ĉi modesta festa volumeto de nia revuo.

La bazo por normala funkcio de kiu ajn lingvo estas unueco de ĝia uzado. Se tio estas vero pri naciaj lingvoj, ĝi estas la vivkondiĉo por lingvo internacia. Se hodiaŭ la unueciga dokumento de Esperanto, la Fundamento, estas konata nur laŭnome de la granda plimulto de ĝiaj adeptoj, tiun iom mirigan fakton klarigas ne nur ĝia dinamika efiko, sed ne malpli la laborado de kelkdekoj da sindonintaj vortaristoj kaj gramatikistoj, kiuj zorge registradis la plue evoluintan lingvaĵon de ZAMENHOF kaj aliaj bonaj aŭtoroj el ĉiuj kampoj de la beletro, la fakoj de scienco kaj tekniko kaj el la ĉiutaga vivo. Sen tiu giganta registrado la Fundamento estus restinta pura, griza teorio, apartenanta al la bela mondo de kongresaj rezolucioj.

En tiu registrado WARINGHIEN estas rekonita kiel la ĉefa gvidanto, tiel de la leksikologio kiel de la gramatiko, sen neglekto al pluraj eminentaj antaŭuloj, el kiuj enfalas al mi la nomoj de GROSJEAN-MAUPIN kaj RENÉ DE SAUSSURE.

Depost 30 jaroj *Plena Vortaro*, ĉe kies unuaj eldonoj li estis la ĉefa redakcia kunlaboranto de sia samlanda GROSJEAN-MAUPIN, estas la ununura normiga gvidilo de vortuzado en Esperanto, kaj fonto de la nacilingvaj vortaroj. Sed jam de preskaŭ 15 jaroj li laboradas super la gvidilo de la estonta generacio, *Plena Ilustrita Vortaro*, kiu nun ricevas de li sian finpoluradon. El ties trezorejo aperis la al ĝi kompare modesta, sed jam mem normodona 63-paĝa *Suplemento*, eldonita kiel parto de la kvara eldono de Plena Vortaro (1953). Ankoraŭ pli vaste manifestiĝas la abunda materialo de lia laborejo en *Grand Dictionnaire Espéranto-Français* (1957). La prestiĝan valoron, se menciis nur tiun, de tiu fidinda Esperanto-vortaro de unu el la ĉeflingvoj oni apenaŭ povas trotaksi. Kiel unu el liaj fakaj kunlaborantoj mi per multjara korespondado spertis la skrupulecon kaj la al eksteruloj malfacile imageblan gigantecon de lia leksikografia laborado.

Estas preterpase menciinde, ke ankaŭ sur la kampo de franca leksikologio WARINGHIEN estas rekonita aŭtoritato estante membro de „Office de Vocabulaire français“ kaj kunlaboranto en redaktado de la nuna *Larousse du XX^e Siècle*.

La paralelaĵo de Plena Vortaro estas *Plena Gramatiko*, dua monumenta ĉefverko de la esperantologio, kiun li verkis en intima

kunlaborado kun KALMAN KALOCSAY. Same kiel Plena Vortaro ĝi per sennombraj ekzemploj el la zamenhofa verkaro registras la el-laboriĝintajn lingvajn tradiciojn, analizas tiun „spiriton“ de la lingvo, kiu kreis el ĝi ne sterilan imitaĵon de iuj etnikaj lingvoj, sed memrajtan heredanton, kiu alproprigis al si iujn pli purajn strukturajn kvalitojn de homa lingvo. Per la kompilado de tiu ampleksa gvidilo de sintaksa lingvuzo la aŭtoroj liveris al la lingvistiko dokumenton, kiu pro sia ĉerpado el la originaj fontoj neniam povos perdi sian valoron.

Al la supre priparolitaj lingvistikaj ĉefverkoj ni devas ankoraŭ aldoni mencion de tiuj sennombraj artikoloj, kiujn li dise aperigis pri leksikologiaj kaj gramatikaj temoj. Multaj el ili, ofte en prilaborita formo, trovis daŭran lokon en la tria ĉefverko de WARINGHIEN, la jam menciita *Lingvo kaj Vivo*. Liaj penetraj studoj tie publikigitaj pri la Pra-Esperantoj prilumas la laborprocedojn aplikitajn de ZAMENHOF, kiam li ellaboris sian Lingvon Internacian. Montrigis, ke problemoj kiel forlaso de la akuzativo aŭ pli-proksimigo de la vortotrezoro al la romidaj lingvoj aŭ alpreno de pli „naturaj“ vortoj anstataŭ la pli aprioraj, skemecaj korelativoj ne estis neglektitaj de ZAMENHOF, kiel oni volis pretendi, sed klare prikonsideritaj, kaj ke formoj tiurilate estis eksperimente elprovataj kaj forĵetitaj. Kiel ĉiam, fundamente gravaj temoj estas pritraktitaj en la libro sub lia verva plumo: La Fundamento de Esperanto, la akuzativo en interlingvistiko kaj en Esperanto, la tiklaj problemoj de la landnomoj kaj de la esperanta pasivo kaj de la neologismoj kaj de „niaj novaj konkurantoj“ (la naturismaj lingvoprojektoj).

Kaj tra la paĝoj de tiu ĉi libro, en kiu harmoniiĝas konsideroj lingvistikaj kun filozofiaj, humanismaj, ni jam ekturnis nian atenton al lia ampleksa, pli filologie orientita verkado. Ankaŭ en tiu ĉi, karakteriza trajto de liaj interesiĝo kaj labormetodo estas lia persista retroirado al la originaj fontoj, kaj ni devas rekoni en li ankaŭ, kiel jam montris al ni liaj studoj pri la zamenhofa lingvaĵo, nian gvidan zamenhofologon.

Historiofara estas lia kompilaĵo *Leteroj de Zamenhof* (du volumoj, oni esperas pri kompilo de tria volumo el lia mano) kaj la riĉa komentario, kiun li ligis al tiu dokumentaro. Kaj en *Eseoj I*

(*Beletro*) WARINGHIEN pritraktas el sia profunda kono pri naci-lingvaj literaturoj klasikaj kaj modernaj plurajn el la zamenhofaj tradukoj: Malnova Testamento, Hamleto, Fabeloj de Andersen. En rilato al tiu lasta li sprite pritraktas la intervenetojn de la Demono de la preseraroj, kun kiu sinjoro nia eminenta esperantologo ne malofte havas siajn petolemajn interrilatojn (vere oni rifuzus malhavi liajn ripete revenantajn elturniĝojn de ĝustigo kun tiu Moŝto en *La Nica Literatura Revuo*).

Deviga legaĵo por tradukantoj devus esti lia eseo pri la tradukarto. Nekontesteblan signifon por la disvolviĝo de la esperanta poezio havas lia *Skizo de Esperanta Metriko* en *Parnasa Gvidlibro*, kiun li verkis kun KALOCSAY, kaj ne malpli ni devas atenti lian tutan fekundan verkadon kiel kritikisto, tiu rara birdo en la periodaĵa vivo de Esperanto. Abundas liaj recenzoj en pluraj gazetoj, precipe en *Literatura Mondo*, kiun li kunredaktis, kaj en *La Nica Literatura Revuo*, kiun li ĉefredaktas, tiu perlo de nia beletra revuaro. Estinte dum jaroj (1932—1939) literatura recenzisto ĉe Radio Lille, promociiĝinte kiel Profesoro Agregacia de l'Universitato kaj estante depost 1953 profesoro pri literaturo (donante kursojn pri literaturaj komentoj de klasikaj tekstoj) en Institut Britannique de Paris (sub Universitato de Parizo), ne estas mirige, ke, provizitaj per tiaj eksteraj fakaj kvalitoj, li povis, kun sia personeco, enĵeti en la recenzan kaj esean literaturon de Esperanto fajrerojn de galla spirito, lumon kaj varmon de klasikaj kulturoj. Tiel estiĝis ankaŭ la bela franca eksponilo de la lingvo internacia, *A. B. C. de l'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres*, por ne paroli pri liaj propraj gravaj kontribuadoj al la traduka literaturo de Esperanto en revuoj, kaj en *Baudelaire, La Flo-roj de l' Malbono*, kiun li majstre tradukis kune kun KALOCSAY k. a., la *Maksimoj de La Rochefoucauld*, kaj la *Poemoj de Omar Kajam* (el la persa originalo).

Ni hodiaŭ omaĝe salutas WARINGHIEN kiel tiun esperantologon, kiu ĝis nun kulturis la senkompare plej vastajn kampojn de la lingvistiko kaj filologio de Esperanto. Kiel mentoro de tiu juna scienco tra tri jardekoj li masonis fundamenton solidan kaj daŭran.

PAUL NEERGAARD.

BIBLIOGRAFIO

de libraj verkoj de Gaston Waringhien.

- 1930: (kun E. GROSJEAN-MAUPIN, A. ESSELIN, S. GRENKAMP-KORNFELD): Plena Vortaro de Esperanto. 519 p. Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris 1930. 2-a eldono 1934, 3-a eldono, 511 p., 1947, 4-a eldono kun *Suplemento* kompilita de G. W., 511 + 63 p., 1953.
- 1931: L'Espéranto et la Stylistique.
- 1932: (kun K. KALOCSAY): Parnasa gvidlibro aŭ Kiel fariĝi poeto. 176 p. Literatura Mondo. Budapest.
- 1935: (kun K. KALOCSAY): Plena gramatiko de Esperanto. Vorto kaj frazo. 371 p. Literatura Mondo. Budapest. 2-a tralaborita eldono (subtitolo: Kun detala komentario pri vorto kaj frazo). 489 p., 1938. 3-a eldono prilaborita estas nun presata, 1-a vol. aperis 1959.
- 1935: Facilaj Esperantaj legaĵoj. 94 p., Librairie Centrale Esperantiste, Paris.
- 1935: La Rochefoucauld, Pripensoj aŭ sentencoj kaj primoraj maksimumoj (traduko). 111 p. Librejo Felix Alcan. Paris.
- 1937: Cours Illustré d'Espéranto (adapto de la Szilágyi-kurso). Librairie Centrale Esperantiste. Paris.
- 1946: A. B. C. d'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres. 71 p. Union Esperantiste de France. Paris.
- 1948: Leteroj de L.-L. Zamenhof. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezento kaj komento de G. W. I. 1901—1906. 17 + 369 p. II. 1907—1914. 11 + 373 p. S. A. T. Paris.
- 1953: Poemoj de Omar Kajam. El la persa originalo verse tradukis G. W. 60 p. S. A. T. Paris.
- 1956: Eseo. I. Beletro. 231 p. J. Régulo. La Laguna.
- 1957: Grand Dictionnaire Espéranto-Français. 367 p. Librairie Centrale Esperantiste. Paris.
- 1957: Charles Baudelaire, La floroj de l'malbono. Kompleta eldono aranĝita laŭ nova ordo kaj sekvata de La defalaĵoj kaj de Fragmentoj, rilataj al La floroj de l'malbono. Redaktis K. KALOCSAY kaj G. W. 398 p. J. Régulo. La Laguna.
- 1959: Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj. 450 p. J. Régulo. La Laguna.

Hommage à Gaston Waringhien

par EDMOND PRIVAT*)

Notre collègue GASTON WARINGHIEN, qui est professeur agrégé de langues classiques en France, se plaint dans son livre „Lingvo kaj Vivo“ que les linguistes, si ardents à se pencher sur n'importe quel dialecte africain, ne prennent pas la peine d'étudier l'expérience de l'Espéranto, qui est en usage écrit depuis 74 ans et oral depuis plus d'un demi-siècle en de nombreux congrès, rencontres, voyages, émissions à la radio etc. comme *lingua franca* de milliers de personnes dans les deux hémispères. Ceux qui abordent le sujet se contentent de traiter du rôle de ZAMENHOF à l'origine et laissent de côté les phénomènes de la vie en ignorant qu'il se voulait „initiateur et on créateur“.

Outre WARINGHIEN lui-même et les Prof. COLLINSON de l'Université de Liverpool et COLLINDER de l'Université d'Upsal, je mentionnerais aussi, comme exceptions à ce manque d'intérêt scientifique, mes regrettés maîtres MEILLET à Paris, SÉCHEHAYE et BALLY à Genève. Ce dernier engagea même l'Université de cette ville à me charger, entre les deux guerres, d'un cours sur l'évolution de l'Espéranto, en particulier sur l'expression des sentiments dans cette langue et sur les influences affectives dans la vie des suffixes et la dérivation spontanée.

GASTON WARINGHIEN s'est occupé surtout de l'évolution lexicologique et syntaxique de la langue. Son oeuvre est consacrée à l'observation des faits anciens et nouveaux. On lui doit le plus complet des nombreux dictionnaires espéranto-français, riche des dérivés et des emprunts les plus récents, une grammaire avec commentaires sur l'usage actuel, sans parler, ni de ses études sur la correspon-

*) Docteur d'histoire, professeur honoraire de l'Université de Neuchâtel (Suisse) ou il enseignait la langue et la littérature anglaises après avoir été chargé de cours à l'Université de Genève. Il est l'auteur d'une histoire de l'espéranto et d'un ouvrage sur l'expression des sentiments en espéranto outre ses livres sur l'histoire des cultures anglaise et américaine.

dance et le style de ZAMENHOF, ni de ses traductions d'Omar Kajam et de Baudelaire ou de son ouvrage sur la poésie en collaboration avec l'écrivain hongrois Kalocsay, le meilleur des poètes originaux en espéranto avec Julio Baghy et Marjorie Boulton.

Son patient travail de trente ans met à la disposition des chercheurs une documentation sérieuse et montre à quel point ZAMENHOF avait eu raison de faire confiance à la vie et d'abandonner humblement au courant de l'usage la petite base qu'il avait établie et lancée en 1887. En effet, l'usage a peu à peu développé une vraie langue sur ce fondement originel et maintenu son unité par la pression constante du besoin général d'être compris.

L'espéranto de 1961 est plus fluide, plus riche et mieux prononcé dans les congrès que celui de 1905. A vrai dire il est beaucoup plus uniforme et plus vivant que l'anglais ou le français de la plupart des étrangers. Il n'est pas troublé par les hésitations que cause le complexe d'infériorité dans les assemblées internationales.

Tous ces faits devraient être observés sans déformations d'enthousiasme ou de préjugés par des chercheurs objectifs et solidement informés. Un GASTON WARINGHIEN rend service à la science en appliquant son esprit critique à ce domaine de la vie moderne.

Je suis donc heureux de me joindre à l'hommage de reconnaissance qui lui est rendu par ses lecteurs et ses collègues de tous pays.

Neoficialaj vortoj en la poezio de Hohlov kaj Miĥalski

de WILLIAM AULD*)

En ĉiuj lingvoj, kiuj entute havas literaturon, la poezia lingvaĵo estas ĝenerale la plej larĝa kaj multampleksa el ĉiuj formoj de la lingvo. Celante samtempe *precizigi kaj kolorigi*, la poetoj emas utiligi ĉiujn semantikajn, leksikologiajn kaj sintaksajn latentojn de la koncerna lingvo, kelkfoje eĉ ĝis ekstremo. Ĝis nun la poezia lingvaĵo de Esperanto ne ricevis tiun apartan atenton far leksikologoj kaj aliaj, kiun ĝi jam meritas, kaj, kiel la unuan el projektata serio de tiaj studoj, mi prezentas sube konkordancon de la neoficialaj vortoj (t. e. vortoj ankoraŭ ne, en la komenco de 1961, oficialigitaj) uzitaj de HOHLOV (1928) kaj MIĤALSKI (1929). Ni trovas, ke en la koncernaj verkoj HOHLOV utiligis 63 neoficialajn radikojn kaj sufiksojn sume 81-foje, kio konsistigas proksimume 1,2 % el lia vortara materialo, ekskluzive de la gramatikaj finaĵoj. Ĉe MIĤALSKI, la respektivaj ciferoj estas: 38 radikoj kaj sufiksoj, uzitaj sume 58-foje = proksimume 0,9 %.

Mi aldonis difinon por tiuj vortoj, kiuj ne estas registritaj ĉe WARINGHIEN (1954). Post ĉiu citaĵo sekvas du ciferoj, el kiuj la unua estas la paĝnombro kaj la dua estas la linio. (H = HOHLOV; M = MIĤALSKI.)

aĵur-: ŝalo aĵura (M 40, 18).

anal-: (-o = jarkroniko); analojn, postlasitajn de gentoj kaj prauloj (H 45, 9).

anatem- (z): ofte vi estas anĝelo, /pli ofte — anatem' (M 25, 4).

anemi- (z): de pala anemi' (H 33,2).

arĥaj-: (-a = arĥaika, antikva) La ŝipo venas la kajon, tuŝante bordon arĥajan (H 42, 9).

arboj-: (-o = ?) en river' en reflektaj helstria / per la plektoj arboja ombrel' (M 21, 8). (?adjektivo neregule formita el la pluralo de *arb-*).

*) Master of Arts (magistro), Glasgow University, diplomito de Brit. Esp. Asocio.

atlant-: (-o = laŭ greka mitologio, la titano, kiu portis sur la ŝultroj la ĉielon) sur iliaj ŝultroj atlantaj (H 45, 19).

atol-: al iu atol' ne notita (H 6, 15).

aŭror- (z): aŭroro de nova tagiĝo (H 5, 10); novaj aŭroro kaj tago (H 5, 11); alvenon de ĉiu aŭroro (H 5, 14); mi vidis aŭronon de l' amo (M 28, 12); ploregis pri la amaŭror' (M 55, 14).

aŭt-: fajfsirenas aŭtoj (M 38, 2).

bakh-: (-o = laŭ latinaj kaj grekaj mitologioj, la dio de vino) la amo, bakhanino kun amfor' (H 51, 15); for la kisojn bakhaninajn (H 14, 5).

beat-: beato — sufero (M 23, II 3).

bravur-: (-o = (muz.) vigleco) bravuraj marŝaj vortoj (H 53, 2).

briz-: (-o = venteto) dolĉa blovo briza (H 19, 7).

ciklamen-: (-o = sudeŭropa speco de primolaco) fragoj, framboj, ciklamenoj (H 7, 1); aromas ciklamenoj (H 7, 16).

ĉarlston-: (-o = moderna dancspeco) danca ritmo de ĉarlstono (H 37, 6).

ĉirp- (z): brila neĝo . . . / gaje ĉirpas en la knar' (H 59, 18).

ekzotik-: ekzotikaj boskoj / de Posejdono (H 43, 15).

eldorad-: (-o = fiktiva lando, abunde riĉa je oro) fantazian eldoradon de la ravo kaj fabel' (H 19, 12).

epikur- (z): en la parol' epikura vi trovis kaŝitan pozemon (H 58, 3).

epistol- (z): gala epistolo (H 28, titolo).

fajn-: du sitelojn . . . / sur fajna ŝnur' mi portas (M 7, 8).

farnient-: (-o = nenionfarado) dum farniento de l' vespero (M 15, 8); farniento, amoĝuoj (M 57, 8); mia farnient-ripozo (M 15, 4).

fatamorgan- (z): ĉio restos . . . / fatamorgan' perfida (H 47, 20).

firmament-: am' . . . / nebulas / firmamenton (M 22, 4); firmament' . . . / regas min (M 51, 15); sur la ĉarma / firmament' (M 61, 20).

fokstrot-: (-o = moderna dancspeco) mizera knarado de l' usona fokstrot' (H 57, 14).

fug-: (-i = fuĝi) al la suno hela celas mi en fugo (M 54, 14); de sufer' / fugas mi (M 51, 10).

gaŭl-: (-o = virkoko) alarmu do, gaŭlo orpluma (H 5, 13).

gehen- (z): eble ĝi estas gehena (M 20, 11).

- golgot-*: (-o = mortejo, precipe rilate al la krucumo de Kristo)
 golgotas la vivo (M 37, 6; 37, 13; 38, 19).
- grak-* (z): grakas amasoj da korvoj (M 37, 8).
- gravit-*: ĝi gravitas peze al la tero (H 41, 14).
- hist-*: agordanta . . . ĉiujn histojn de la kor' (H 19, 8).
- huri-*: tenton de hurio paradiza (H 19, 5).
- ĥameleon-* (z): en sonoj — ĥameleonoj (M 10, 19); ĝi kiel ĥameleono . . . kolorbrilas (M 34, 1); ĝi ankaŭ ĥameleonas (M 34, 5); varie, ĥameleone, fragmente (M 36, 1).
- ĥan-*: volupta ludilo de ĥano (H 21, 7).
- iberi-*: (-o = Hispanujo kaj Portugalujo kune) la vent' iberia (H 27, 9).
- inkub-* (z): suĉas min akra inkubo (M 31, 15); ĝi inkube torturis katene (M 53, 3).
- irit-*: (-i = inflametigi, doloretigi) fulmoj de la krea amirito (H 19, 19); iritilo de l' eterno (H 9, 4); iritu vin per gusto de l' absint' (H 14, 8).
- iv-*: ravas la muzikeman aŭdivon (M 34, 8); „is — as“ = estiv' (M 6, 5); foliojn de l' kreiva libr' (M 8, 2); mi agordis mian kreivon (M 8, 6); disburĝonis kaŝtanaj la floroj / kun kreivgeedziga polen' (M 21, 22).
- ĵazband-*: (-o = ĝazbando) paŝoj sub ĵazband' triviala (H 57, 7).
- kabared-*: (-o = kabareto) post amuza kabaredo (H 59, 1).
- karmanĵol-*: (-o = franca revolucia kanzono kaj danco) sub karmanĵola fajfo de l' siroko (H 3, 19).
- kosm-* (z): konkordas mi kun kosma fluga ĥor' (M 54, 2).
- koŝmar-*: (-o = inkubsonĝo) en koŝmaro de nokto (M 50, 6).
- kulmin-*: la komenco kaj kulmino / de l' pasio (H 9, 11); danĝero estis ĉe kulmino (H 36, 20).
- kvik-*: (-i = pepegadi) kun kvikanta kri' (H 14, 14).
- lakon-* (z): per paŝo klaka kaj lakona (H 37, 8).
- lampion-* (z): eklumos la elektraĵ lampionoj (M 43, 14).
- lisp-*: kun infana lisp' (H 28, 18).
- lokust-* (z): plendo monotona de lokust' (H 51, 14).
- lotus-*: simbolitaj per lotuso (H 19, 11).
- minstrel-*: (-o = mezepoka kantisto) minstrelo de l' amo (H 27, 1).
- mucid-* (z): fluoj de mucidaj vomoj (M 54, 10).

- obsed-*: en la koro — amara obsedo (H 16, 11); min obsedas la li-
riko (H 19, 1).
- obtur-*: min muroj-obturoj ĉirkaŭas (M 27, 12).
- odalisk-*: estas ĝoje — esti viro kaj facile — odalisko (H 10, 12).
- oremus-*: (-o = preĝo) oremuso de mia belsento (M 16, 17).
- orgasm-*: blasfemas mi orgasme (H 41, 8).
- ornat-* (z): ornato orname orita (M 16, 7); oro, ornamo, ornato
(M 16, 19).
- ort-* (z): tra la orto al la oriento (M 16, 15).
- oz-*: celo al grandozo (M 15, 2).
- pari-*: de la pasinto sklavo kaj pari' (H 14, 16).
- parvenu-*: la parvenua frand' (H 28, 12).
- pastoral-*: lazura, sonvelura pastoral' (H 8, 10).
- penat-*: skulptis por ni la penatojn (H 12, 2).
- permanent-*: (-a = definitiva, daŭre restonta) permanenta celo
(M 15, 2).
- pitoresk-*: pitoreska viv-kanvaso (M 43, 23).
- polen-*: saturita per la maja florpolen' (H 19, 22); disburĝonis kaŝ-
tanaj la floroj / kun kreiv-geedziga polen' (M 21, 22).
- prolegomen-*: (-o = antaŭparolo) prolegomeno (H 19, titolo).
- prud-* (z): dogmoj de la sekta prudo (H 61, 15).
- pseŭd-* (z): kuŝejo de l' pseŭdo-karin' (M 49, 9).
- reflekt-* (z): en river' en reflekttoj helstriis / per la plektoj arboja
ombrel' (M 21, 7).
- refrakt-*: diamanto . . . / refrakte semis lumon (H 40, 2).
- rekviem-* (z): post la rekviemo / venas ĉerka tegmento (M 40, 11).
- retrospekt-*: (-o = perspektivo tempe malantaŭen) retrospekton /
de miaj pensoj (M 7, 5).
- rotaci-* (z): rotacias karuselo (H 59, 9).
- sakrilegi-* (z): stimulas / sakrilegia pens' (M 30, 12).
- satelit-*: kanto-amik' — satelito (M 11, 2).
- sentinel-*: (-o = gardostaranto) kri' de la du sentineloj (H 5, 16);
sur nia posten' sentinelas (H 5, 5).
- sin-* (z): ĝojas la kor' en la sino (M 10, 14); ŝia sino ĉasta (M 15,
7); mi svenis al sino (M 21, 15); tera parfumas sin' (M 60, 9).
- sirok-* (z): fajfo de l' siroko (H 3, 19).
- sled-*: sur la sledo, svelta sledo (H 59, 1).

- smaragd-*: (-o = smeraldo) smaragde-verda maro (H 31, 7).
spark-: la sparka diamanto (H 40, 9); fulmoj de l' ĉielo / sparkis kaj radiis (H 29, 4).
spekul-: sindono — spekulato (M 24, VIII 4).
steril-: miajn rusajn sentojn sterilis kaj poligis (H 30, 7).
svelt-: la virina mov' / nur gajnas pro kaŝita svelto (H 36, 12); svelta sledo (H 59, 1).
ŝablon-: ŝablonaj dogmoj (H 61, 15).
tajd- (z): la tajdo (H 3, titolo); pro tiu tajdo (H 3, 17); ondojn ligis / per monotona tajdo (H 31, 10); la kanto . . . / tajdas en la sango (H 3, 15).
tempest-: tempestas la mistikaj abismoj (H 46, 17); la angoro muĝas kaj tempestas (H 3, 11).
teror- (z): blinda, despota teroro (H 39, 4).
toast-: (-i = trinki je la sano de) la gastoj toastis Eternon (M 29, 13).
tortur- (z): ĝi inkube torturis (M 53, 3).
transcend- (z): transcendo (H 24, titolo); tuŝis . . . la sentojn transcendaĵojn (H 58, 7).
tumulus-: (-o = termonteto sur tombo, precipe prahistoria) signoj jam pratumulusaj (H 21, 4).
ultraviol-: vi nomis ĝin ultraviola (H 58, 1); la ultraviolaj daktiloj (H 58, 7).
valv- (z): trans baretoj valvaj / saltas akvo (H 7, 13).
vit-: kovrita de vitoj rubusaj (H 21, 2).

Summary

In all literary languages, the poetic language normally makes use of the widest possible vocabulary. The author presents a concordance of the unofficial word-material used by the poets HOHLOV and MIĤALSKI, and notes that the former uses 63 unofficial roots 81 times, which represents approximately 1,2 % of the text; the later uses 38 such roots 58 times, representing approximately 0,9 % of the text.

BIBLIOGRAFIO

- HOHLOV, N., 1928: La tajdo, Horrem bei Köln.
 MIĤALSKI, E., 1929: Prologo, Leipzig.
 WARINGHIEN, G., 1954: Plena vortaro de Esperanto, 4a eld., Parizo.

Etimologio, pra-Esperanto kaj Mistrala lingvo

Metodo de la »koincidoj«

de D-ro ANDREO ALBAULT

„Estas nescienca hipotezo proponi, kiel etimon, vorton de lingvo, kiun ZAMENHOF ne sciis . . .“ skribis WARINGHIEN (1959). Konsentite! Sed kiuj nome estis la lingvoj sciataj de ZAMENHOF? Kaj kion ĝuste signifas „scii lingvon“? Cetere ĉu ZAMENHOF ne havis eblon konsulti vortarojn ankaŭ pri lingvoj, kiujn li „ne sciis“? Mi diros plu: ĉu ne estis lia devo vastigi sian scion el „ne sciataj lingvoj“?

Evidente, sana prudento avertas, ke, se *koro* estas japana, aŭ se vortoj ĉina (*mien?*) aŭ vietnama (*kiel?*) similas al esperantaj, aŭ ankaŭ se kelkaj afrikaj vortoj similis al pra-esperantaj aŭ esperantaj (bantua *pa* kaj pEo. *ba* = sur¹; senegala (volof) kaj pEo. *di* = ĉe; senegala (volof) *fi* kaj pEo. *fi* = tie; svahila pronomo *fi*; svahila *ki* = kiam; senegala (volof) *bi*, *gi*, *li*, *mi*, *si*, *vi* signifantaj: li, ŝi, ĝi; svahila *mimi* = mi; zulua *mi* = mi; ktp . . .) (TASTEVIN 1946) temas nur pri „*hazardaj koincidoj*“: tiaj verŝajne ekzistas por iu ajn lingvo rilate al iu ajn alia; per la leĝoj de probableco, oni povus kalkuli ilian procentaĵon.

Tamen, se temas pri eŭropaj lingvoj, oni estu multe pli singardema kun sia sana prudento! — Konstatinte ke *tuj* similas nur al Li. *tuoj* mi informiĝis kaj eksciis, ke ZAMENHOF efektive parolis la litovan (ALBAULT 1959). Sed mian supozon ke de tiu *tuoj* ZAMENHOF konis dialektan prononcon en la relative suda Bjalistoko,

¹ *Lingvosimboloj*. La aŭtoro starigis racian kaj homogenan liston de lingvosimboloj por modernaj kaj antikvaj lingvoj: entute iom pli ol 160 lingvoj (manuskripte). En la artikolo estas uzitaj: A. = angla; 'E. (aŭ simplige: E.) = helena, antikva greka; Eo. = Esperanto; pEo. = pra-Esperanto; F. = franca; mF. = malnova franca; G. = germana; Gt. = gotika; H. = hispana; Hg. = hungara; I. = itala; Kt. = kataluna; L. = latina; La. = latva; Li. = litova; Oc. = okcitana; P. = portugala; R. = rusa; Rk. = romanika; Rn. = rumana.

poste konfirmis D-ro BROZOVIČ (1959): la esperanta *tuj* precize respondas al la dialekta prononco! ZAMENHOF ne inventis aŭ misformis vorton: li prenis sian proprajn, de kie li trovis ĝin. Aliparte ne ekzistas aliaj koincidoj: ja kompare foraj estas R. *toĉas* (ne ĝuste samsenca), I. *tosto* aŭ F. *tout de suite* kaj aliaj latinidaj (Kt. *tot sequit . . .*); plej proksima estus La. *tulin*. Oni povas ilin konsideri kiel „apogojn“, ili ne estas „koincidoj“. Kiel ofte ZAMENHOF uzis ankaŭ ĉi tie partan similecon el pluraj lingvoj (ses, ĉi tie!).

Tiaj faktoj restus kaŝitaj, se oni rifuĝus malantaŭ la ŝildo de la lingvoj kiujn ZAMENHOF certe konis.

Ol povas tradukiĝi en la hungara per sufikso *-ál* [pr.: ol]; tio aspektas kvazaŭ hazarda koincido. Tamen se oni scias, ke ekzistas ankaŭ la formo Hg. *-el* kaj ke en pra-Esperanto *ol* havis la formon *el*, oni prave miras pri tiu duobla koincido: ĉu vere ZAMENHOF iel ne konis ĝin? La apogo de G. *als* estas vere iom fora.

Mi jam citis (ALBAULT 1959) aliajn koincidojn el la rumana (paŝi, paŝti = Rn. *a paŝi, a paste*) [pr. s = ŝ]² aŭ el la okcitana³ (aglo, bramo, fali, naŭ = Oc. *aglo, bramo, fali, nau*) kaj opiniante unuflanke, ke ZAMENHOF mem estis sufiĉe sagaca por uzi jam ekzistantajn pli malpli hazardajn koincidojn inter diversaj lingvoj (ekz-e: Oc. *fali*, G. *fallen*, Kt. *fall d' aygua* = akvofalo), kaj aliflanke, ke tio ne povas esti scienca, aŭtomate kvalifiki „hazarda“ iun ajn koincidon, mi proponis difinon, kiun mi nun prezentus jene:

Estas *koincido* inter vorto de Esperanto kaj vorto de alia lingvo, dialekto, ktp . . . , kiam la simileco estas maksimuma inter ili. Tiun maksimumon determinas la reguloj de ortografio aŭ prononco, ĝenerale malsamaj en ambaŭ lingvoj. Plie, koincido rilatas al nur unu elemento: ĝenerale la radiko, foje la finaĵo. Ekz-e en Oc. *aparteni* estas du koincidoj: tiuj de la radiko kaj de la finaĵo. Aglo koincidas kun Oc. *aglo* sed ne kun F. *aigle* aŭ A. *eagle*.

Tiu nocio de „koincido“ havas la avantaĝon noti fakton, sen per tio mem aludi, ĉu ZAMENHOF konis ĝin aŭ ne, uzis ĝin aŭ ne.

² Ĉar la presejo ne posedas la tipon „cedilan s-on“ ni presis per simpla „so“.

³ Pri la nomo *okcitana* vidu la bibliografion: ALBAULT (1957).

„Garbo“ repondas al G. *Garbe*, F. *gerbe*, H.Kt.Rk. *garba* kaj Oc. *garbo*. Ekzistas *sama* koincido por ĉiuj lingvoj krom la franca. Sed tie la germana (kaj eble la hispana) kun apogo de la franca sufiĉas por klarigi la etimon de Eo. *garbo*.

Male, *arbo* koincidas nur kun Oc. *arbe*, dum apogas tiun formon F. *arbre*, H. *árbol*, P. *árvore*, I. *albero* el L. *arbor*. Tiu „izola koincido“ nepre tiras la atenton al la okcitana, kvankam oni povus aludi la „komunan trunkon“ (akcentohavan!) *arb-* en F. H. L. kun apogo de P. I.

Aldonendas, ke la nombro de koincidoj estas granda en la okcitana, kaj inter ili la „izolaj koincidoj“, t. e. ekzistantaj nur kun tiu lingvo, ne mankas.

Pra-Esperanto kaj la okcitana.

Hodiaŭ mi deziras nur montri la ekziston de kelkaj koincidoj inter Pra-Esperanto kaj la okcitana (ALBAULT, 1960). Mi unue konsideros du el la vortoj kiujn WARINGHIEN signis pro la netrovita etimo. Mi ne pretendas ke ZAMENHOF tiris ilin el la okcitana. Mi nur konstatas atentovekajn izolajn koincidojn:

pEo. *penĉi* signifas *kombi* kaj respondas al Oc. *penchina* aŭ *penchena*. Tiu devenas de Rk. *penchenar* el L. *pectinare* kaj parencas kun Kt. *pentinar*, P. *pentear*, I. *pettinare*, H. *peinar* kaj F. *peigner*. Krome, Oc. *penche* signifas kombilo (el Rk. *penche* apud Kt. *pinte*, P. *pente*, H. *peine*, F. *peigne*, I. *pettine*, el L. *pecten*). Ni aldonu ke *ch* respondas al *ĉ* (ĉ en pra-Esperanto).

pEo. *janta* povas tradukiĝi per „ĉarma, belega“. Nu, Oc. *gènt*, laŭ la dialektoj havas la formojn: *yent*, *jànti* [pr.: ĝent; jent; ĝanti aŭ ĵanti]; ĝi devenas de Rk. *gent*, *jen*, el L. *genitus* = (bone) naskita, kaj retroviĝas en Kt. *gent* kaj mF. *gent*. Ĝi signifas laŭ MISTRAL (1878): „ĉarma, afabla, gracia, bontona, belforma, superbela“.

Aldone, jen okcitanaj formoj kiuj donas pli grandan koincidon ol tiuj proponitaj de WARINGHIEN (signitaj de li aŭ preterlasitaj kvazaŭ evidentaj).

pEo. *bura* = bruna. Oc. *bourre*, *bourro* [pr.: bure, buro] = bruna. Apud mF. *bur*, kaj el L. *burrus* = rufa, vizaĝe ruĝa (el 'E. pyrrós).

pEo. *parmi* = permesi. Oc. *permetre, parmetre* = permesi, apud: Rk. *permeter*, Kt. *permetrer*, H. *permitir*, P. *permittir*, I. *permettere*, F. *permettre*, el L. *permittere*. Krome: Oc. *permés, parmés* = permeso. Apud: Kt. *permés*, L. *permissum*, F. *permis, permission*.

pEo. *fano* = infano. Oc. *fant*, el Rk. *efant, efan, fant*. Ktp . . .

pEo. *kabro* = kadavro; simpligo de Oc. *cadabre* (dum ni trovas nur *v* en: F. Kt. *cadavre*, H. P. L. *cadaver*, I. *cadavere*).

pEo. *dillo* = tilio. Oc. *tiei, tilh, til* el Rk. *teill*, ktp. . . .

Mi ne elĉerpas la temon, sed la ĉi-supraj koincidoj ŝajne ekzistas nur en la okcitana, parte en la romanika. Aliparte, mi tute ne atentis la vortojn de pra-Esperanto identaj al esperantaj.

Hipotezoj.

A.) Se ZAMENHOF ne sciis la okcitanan lingvon li almenaŭ povis disponi la vortaregon de MISTRAL, kiu aperis ĝuste en la jaro de la Lingwe Uniwersala (1878). Cetere, jam pli frue ekzistis pluraj ampleksaj vortaroj. Sed tiu de MISTRAL donas por ĉiu vorto la diversajn formojn (kelkfoje dekon aŭ pli) laŭ la diversaj dialektoj. Tio konsistigis por ZAMENHOF taŭgan elektomaterialon, des pli ke estis aldonitaj la komparoj en la latinidaj lingvoj kaj kelkfoje ankaŭ en aliaj lingvoj (ĝermanaj kaj eĉ iafoje hebrea . . . ; ne ĉiam fidine laŭ spertuloj . . .)

Ekzemple, ĝuste en tiu vortaro, li povis elekti: pEo. *balko* = balkono, el Kt. *balcó, P. balcão* (el Gt. *balck*). — pEo. *degi* = deziri el simpligo de Rk. Kt. *desig* = deziro. pEo. *kvan* = kiam el Rk. *quant, quan*. — pEo. *delka* = delikata, el Rk. *delgat*. pEo. *gava* = gaja, el L. *gavisus* = ĝojiĝinta. — pEo. *sobri* = superi (iun), el Rk. *sobiran, sobran, sobra* = suvereno (Oc. *soubeiran*) el L. *superans*.

B.) Se oni komparas la Lingwe Uniwersala kun la Pra-Esperanto II, oni konstatas: 1-e. *-e* iĝas *-o*. Nu, en la Mistrala skribo, konforma al la prononco, oni renkontas multajn vortojn finiĝantajn je *-o*: temas pri la finaĵo *-a* de la latina kaj de la romanika, kiun konservas la ĝermana kaj la hispana kaj kiun la franca ŝanĝas al obtuza *-e*; ekz-e: L. I. H. Kt. P. *rosa*, Rk. *rosa, roza*, F. *rose*, Oc. *roso* [pr.: rozo, ĝuste kiel en Eo.]. Aliaj okcitanaj verkistoj kon-

servis tiun etimologian *-a*, ankaŭ aliaj nun reestablas ĝin, malgraŭ la prononco kaj malgraŭ MISTRAL.

2-e. *-are* iĝas *-i*. En la Mistrala skribo, la infinitivoj je *-ir* de la romanika, pli multaj en la okcitana ol en la franca, skribiĝas laŭ la prononco per nura *-i*. Ekz-e: F. *répéter*, I. *ripetere*, el L. *repetere* respondas al Oc. *repeti* najbara al Rk. Kt. H. P. *repetir*.

3-e. Pluralo je *-s* iĝas pluralo je *-j*. La okcitana havas pluralon je *-s*, sed en kelkaj dialektoj, ĝi prononciĝas kiel *-j*. Ekz-e: *en bel-loi letroi d'or* = per belaj literoj el oro. MISTRAL mencias la fakton en pluraj lokoj de sia vortaro.

Ĉu do opinii, ke ZAMENHOF lasis sin influi de la Mistrala lingvo, ĝuste en la periodo inter la Lingwe Uniwersala kaj „Pra-Esperanto II“? Bedaŭrinde ni scias preskaŭ nenion de la lingvo de 1878. Kaj tamen oni povus supozi ke ZAMENHOF jam antaŭe konis la okcitanan! La himno de 1878 komenciĝas per „*Malamikete*“.

Nu! Tiu sufikso *-et-* kiu troviĝas en la franca estas multe pli ofta en la okcitana (Oc. *ounesteta*, *oupourtuneta*, *ouriginaleta* = honesteco, oportuneco, originaleco; apud: F. *honnêteté* oportunité, originalité) kaj troviĝas preskaŭ nur en ĝi. (Ekz-e: Oc. *rapideta* = rapideco, apud F. *rapidité*, Kt. *rapiditat*, I. *rapidità*, el L. *rapiditas*). Ĉu ZAMENHOF jam sciante la okcitanan estis aparte logita de la Mistrala skribo, relative multe pli „fonetika“? (Rilate fonetikon, preskaŭ nur unu difekto: sono *u* skribiĝis *ou*; la modernuloj skribas ĝin *o*, dum la sonon *o* ili skribas *ò*; tiu glito de *o* al *u* retroviĝas en Eo.).

Konstatinde do, ke la hipotezo devus esti kompletigita! Ĉiaokaze hipotezo, laŭ mia kompreno, ne estas io en si, io sufiĉa per si mem. Ĝi estas nur laborilo. Cetere tiu artikolo estas nur antaŭverko al pli vasta studo, kiu sisteme komparos Esperanton al la lingvo de Mistral. Kaj nu! Se ĝi kondukas nur al komparo de la internacia kun la okcitana, kiu, iam lingvo de la trobadoroj estis la unua beletra lingvo de Eŭropo, ĉu tio ne estos per si mem bela akiro, sufiĉa rezulto?

Résumé

Ne sachant pas infailliblement quelles étaient les langues que connaissait ZAMENHOF, il est difficile d'établir l'étymon de certains mots. L'auteur définit une méthode dite des coïncidences, qui consiste après

avoir constaté l'existence d'un nombre suffisant de „coïncidences isolées“ entre l'Espéranto et la langue en question, à établir l'hypothèse que ZAMENHOF connaissait cette langue ou du moins qu'il s'en était inspiré pour le choix de certains mots. Il applique ensuite cette méthode à la comparaison du „pré-Espéranto“ et de la langue de Mistral.

BIBLIOGRAFIO

- ALBAULT, ANDREO, 1957: Pri la terminoj „*Provenca*“, „*Provençala*“ kaj „*Okcitala*“. — La Nica Literatura Revuo, 2/4: 159.
 — 1959: Pri la fontoj de Esperanto. — Nuntempa Bulgario 1959 (n-ro 9); 15.
 — 1960: Glosaro pEo—Eo. kaj Eo—pEo. (manuskripto).
 BROZOVIČ, DALIBOR, 1959: Denove pri la fontoj de Esperanto. Zamenhof kaj la litova lingvo. — Nuntempa Bulgario, 1959 (n-ro 12): 40.
 MISTRAL, FRÉDÉRIC, 1878: Lou Tresor dóu Felibrige, ou Dictionnaire provençal-Français. — V-ve Remondet-Aubet, Libraire Editeur. Aix-en-Provence. 1878. Tome I (A-F), 1196 p. Tome II (G-Z, Suplemento), 1165 p.
 TASTEVIN, R. P. CONSTANT F., 1946: Petite Clef des Langues Africaines. Imp. Franciscaine Missionnaire. Vanves (1946). 200 p.
 WARINGHIEN, GASTON, 1959: Lingvo kaj Vivo. Stafeto. 450 p.

Pri kelkaj kulturvortoj¹

de D-ro W. E. COLLINSON*)

En la usona *Saturday Review* de la 22a de novembro 1958 p. 102 eldoniĝis artikolo 'What is an idea?' (Kio estas ideo?) de MORTIMER ADLER, kiu kompilis liston de 102 gravaj konceptoj influintaj nian hodiaŭan vivon. Inter ili troviĝas kelkaj, nome NATURO, SCIENCO, ARTO, RELIGIO, VIRTO, AMO kiuj havas semantikan fonon esplorindan. Mankas en la listo CIVILIZO kaj KULTURO, kiuj certe meritas pritraktadon. El sento de kora dankemo pro la valora helpo kiun s-ro WARINGHIEN malavare donis al mi, zorge kaj saĝe trarigardante por Stafeto mian verkon *Civilizo kaj Lingvo*, mi submetas al li ĉi tiun kontribuon. Francujo ja estas estinta dum jarcentoj fokuso de la civilizo kaj kulturo de Eŭropo kaj per ĝi ili disvastiĝis en multaj landoj. Nia samideano mem estas altgrade civilizita homo, kiu plene meritas nian omaĝon.

Multaj kulturvortoj havas siajn fontojn en la klasikaj lingvoj. Ili plej ofte estiĝis ĉe la Grekoj, sed migris al la modernaj lingvoj tra la latina precipe per pruntotradukado. Kelkaj estas eĉ pli malnovaj, ĉar ili troviĝas en la hebrea kaj aramea lingvoj kiujn la prakristanoj tradukis en la grekan. Aliflanke pluraj vortoj de klasiklingva aspekto fakte estas elpensitaj longatempe post la Roma epoko. Kiel R. A. BARRELL klare montras en *Archivum Linguisticum* XI (1959), ni ŝuldas la terminojn ESTETIKO, PSIKOLOGIO kaj STATISTIKO al germanaj erudiciuloj. A. G. BAUMGARTEN uzis la vorton 'estetiko' en siaj *Meditationes philosophicae* en 1735, kaj eĉ en 1776 franca enciklopedio aludis al ĝi kiel 'nova termino'. Kvankam *psychologia* troviĝas jam en la 16a jarcento en Germanujo, estis la fama filozofo WOLFF kiu en 1728 popularigis ĝin. La vorton *statistiko* uzis en 1672 HELENUS POLITANUS de Frankforto en sia *Microscopium statisticum* kaj prof-o SCHMEITZEL de Jena disvastigis ĝin per kursoj pri la konstitucio, vivrime-

¹ Koran dankon mi ŝuldas al D-ro WIENER, kiu tajpis la manuskripton kaj faris valorajn sugestojn.

*) Emerita profesoro pri germana lingvo kaj (John Buchanan) ekslektoro pri Esperanto, Universitato de Liverpool.

doj kaj politiko de diversaj *ŝtatoj*. La termino anstataŭis en Britujo tiun de Sir WILLIAM PETTY, kiu estis nominta per 'politika aritmetiko' priskribon de la loĝantaro, komerco, enspezoj kaj elspezoj de ŝtatoj.

El la vortoj diskutotaj ĉi tie nur CIVILIZO ne havas klasik-latinan prototipon. La Esperanta bazo CIVILIZ formas rekte la verbon *civilizi*, kiu signifas laŭ la trafa difino de P. V.: 'morale, intelekto, socie mildigi, klerigi, plidelikatigi barbarajn gentojn'. La franca *civiliser* troviĝas en la 16a jarcento kaj povas reprezenti mezepokan latinan formon **civilizare*, kiu donas h. *civilizar*, it. *civilizzare* kaj — tra la franca — a. *civilize* kaj g. *zivilisieren*. Kiel substantivon la itala uzas anstataŭ la internacia 'civilisation' la formon *civiltà*, kvankam f. *civilité* (a. *civility*) havas la signifon de 'ĝentileco'. La bazo *civiliz-* estas derivaĵo de l. *civis* 'burĝo', 'civitano', praparenca kun g. *Hei-* en *Heirat* 'geedziĝo' el **hīwa* 'familio'. La adjektivo *civilis* havis la signifojn 'burĝa', 'publika' kaj 'ĝentila'.

Nelatinaj ekvivalentoj de *civilizo* estas la kimra *gwareiddiad*² kaj finna *sivistys*. La unua estas derivaĵo de *gwâr* 'malsovaĝa' tra *gwareiddio* 'malsovaĝigi' kun la sufikso de verba ago *-iad*. La finna vorto laŭŝajne parencas kun la prafinna adjektivo *siveä* 'konvena', 'ĉasta'.

La partsinonimo de civilizo, KULTURO, devenas de l. *cultura*, derivita de la verbo *colere* 'kultivi [la teron]' kun participo *cultus*. En la klasika latina ĝi signifis (1) kultivadon, (2) flegadon, (3) formadon aŭ edukadon. En la latinidaj lingvoj 'homo de kulturo' implicas la posedon de ampleksa scio kaj delikata sento, kp. it. *uomo di molta cultura*, h. *hombre de gran cultura*, a. *man of culture*. Ĉi tiun koncepton la germanoj esprimas per *Bildung*, lv. formado. La germana pruntvorto *Kultur* rilatas nuntempe al la fundamentaj bezonoj de la homo, ekz. nutraĵo, vestoj, loĝejoj, bonfarto ktp., ankaŭ malpli materie al institucioj, teknikoj kaj moroj. Ĝi estas do la germana ekvivalento de 'civilizo'. La angla uzas ambaŭ vortojn, *civilization* kaj *culture*, ofte preskaŭ sinonime. MATTHEW ARNOLD establis la sencon estetikan kaj intelektan per

² La etimologion de la kimraj vortoj mi ŝuldas unualoke al mia amiko MELVILLE RICHARDS, docento pri keltaj lingvoj en la Universitato de Liverpool.

Culture and Anarchy (1869) kaj EDWARD TAYLOR la neŭtralan senco de 'civilizo' per *Primitive Culture* (1871). La germana *Kultur* povas krome aplikigi kiel sinonimo de *Bildung* al la formado de la homa personeco per sublimigo de naturinstinktoj kaj al la flegado de la lingvo kaj intelekto. Kelkfoje oni diferencigas gradojn de civilizo kiel *Primitivkulturen* kaj *Hochkulturen*, lv. altkulturoj. Laŭ la *Deutsches Fremdwörterbuch* de H. SCHULTZ la vorto *Kultur* enkondukiĝis en Germanujon je la fino de la 17a jarcento. En la senco de intelekteco kaj bongusto la kimra uzas *diwylliant* el *diwyll*[t], lv. nesovaĝa (*gwyllt* 'sovaĝa'). La finna prunteprenis *kulttuuri*, sed ofte uzas *sivistys* 'civilizo' aŭ *kehitzs* 'evoluo'. Kelkaj germanaj verkistoj inter la du mondmilitoj polemikis por *Kultur* kaj kontraŭ *Zivilisation*, aludante iom malestime al ĉi tiu koncepto kiel io naturfremda, tro ebeniga, importita pli ol organe kreskinta, do io artefarita. Oni bedaŭris la forpason de regionaj kaj naciaj kutimoj kaj moroj, akcelitan per la alpreno de internaciaj menuoj, modoj, fakte de tute fremda vivmaniero.

En la unua epoko de la natursciencoj estas peninde konsideri la vorton NATURO kaj vortparon SCIENCO/ARTO. La latina fontvorto *natura* rilatas al la verbo *nasci* 'naskiĝi' kiel *cultura* al *colere*. Jen kelkaj gravaj aplikoj de *natura* en la klasika lingvo: (I) 'naskiĝo' ofte kun esprimo de sangoparenceco; (II) 'krea potenco'; (III) 'kreitaĵo', 'ennaskita kaj heredita emo aŭ aparteco' kaj (IV) 'evoluo de aferoj' kaj 'la universo mem' kontraste kun la homo kaj liaj faraĵoj. Kiel la P. V. montras, la ĉefa internacia signifo hodiaŭ estas 'kunaĵo de ĉio kio ekzistas en la mondo . . .' kaj 'denaska esenco propra al iu estulo aŭ aĵo . . .'. Vidu plue la bonegan artikolon de LITTRÉ en lia vortaro s. v. *Nature*. Bone konata estas la titolo de la poemo de LUKRECIO *De natura rerum* (Pri la naturo de estaĵoj) kiu atentigas pri la uzo de *physis* en la greka, ekz. *physis arithmōn* 'la naturo de nombroj'. La latina vorto fakte estas pruntotradukaĵo el la greka, en kiu *physis* havas la signifojn cititajn. Ĝi interrilatas kun *phyein* 'kreski, evolui'; *phytōn* 'kreskaĵo', 'ido'; *phŭlon* 'tribo', kiuj devenas de radiko **bhu* kun plujaj parenkvortoj en aliaj lingvoj, ekz. l. *fui* 'mi estas estinta', g. *bauen* 'konstrui' ktp. El la greka la latina transprenis la adjektivon *physicus*, el kiu evoluis la termino *fiziko* kun la signifo de scio pri la tuta materia mondo, sed nun limigita al la teorioj de varmo, lumo,

sono, mekaniko, magnetismo, elektro kaj atomstrukturo. La plej multaj eŭropaj lingvoj konservis la latinan *NATUR*, sed la kimra havas krom *natur* la esprimon *anian*, ankaŭ pruntvorton el la latina (*ingenium*) precipe en la senco de natura emo aŭ temperamento. La finna ekvivalento *luonto* estas derivaĵo de *luoda* 'krei', 'formi' kiu tamen ankoraŭ montras sian konkretan originon, ekz. en la frazoj *luon lunta* 'mi forŝovelas neĝon' kaj *käärme loi nahkansa* 'la serpento deĵetis la haŭton' (kp. L. HAKULINEN, *Handbuch der finnischen Sprache*, vol. 1, p. 153, kiu aludas al la elpuŝo de la infano dum naskado).

SCIENCO reprezentas l. *scientia*, derivitan per sufikso *-ntia* el *scire* 'scii' kiel *kondolenco* el *condolēre* kaj *pacienco* el *pati* 'sufери'. Unue la latina vorto aplikiĝis ĝenerale al scio pri, aŭ kono de, objektoj, regionoj, homoj ktp. Jam en la klasika epoko ĝi povis havi la senco kolektan de fakaj konoj aŭ erudicio. Cicerono uzas ĝin en la vortgrupo „teni apartaj la sciencon kaj la arton“. Tre frue ĝi aplikiĝis ankaŭ specife al la medicino. Kiel ĉe *natura*, la latinaj signifoj de *scientia* estas subirintaj la influon de la greka *epistēmē*, kiun ni konservas en *epistemologio* 'teorio de la kono'. Tiu vorto estas la substantivo de *epistamai* 'mi komprenas', kunmetaĵo el *epi* 'sur', 'apud' kaj *histēmi* 'mi staras', do metaforo iom simila al a. *understand*, lv. substari, kaj g. *verstehen*, lv. stari antaŭ. La latinidaj lingvoj alprenis *scientia*, ekz. f. *science* (a. *science*), it. *scienza*, h. *ciencia*. La germana pruntotradukis ĝin kiel *Wissenschaft*, kiu unue troviĝas en Erfurt en 1392 kun la senco de 'scio' kaj 'antaŭscio'. Jam en la 17a jarcento la senco etendiĝis ĝis tiu de la sumo de fonditaj veraĵoj. Estas rimarkinde ke la kunmetaĵo *Naturwissenschaft* ankoraŭ mankas en la vortaro de CAMPE (1801). La sencamplekso de *Wissenschaft* estas iom pli vasta ol la angla uzo de *science*, kiu — sen determina esprimo, ekz. *linguistic science* aŭ *social science* — kutime rilatas nur al la natursciencoj, ĉar *Wissenschaft* signifas simple la metode ellaboritan scion pri ia fako, do — en la formo *Geisteswissenschaft* — aplikiĝas eĉ al la filozofio kaj teologio. La vorto migris ankaŭ en la nederlandan kiel *wetenschap* kaj la nordajn lingvojn kiel dana *videnskab* ktp. La finnan ekvivalenton *tiede* proponis en 1842. V. KILPINEN, kiu formis ĝin el la verbo *tietää* 'scii'. Laŭ HAKULINEN la verbo originis en *tie* 'vojo' kaj reprezentas eble metaforon 'iri

laŭ vojo', 'sekvi spuron', kp. f. le *cheminement* de la pensée. La kimra havas kiel ĝeneralan kolekta terminon *gwyddoniaeth*, kp. *gwybod* 'scii', sed por la natursciencoj oni uzas krome *gwyddorion*, lv. rudimentoj, kp. *egwyddor*, pruntvorto el l. *abecedarium* 'la aboco'.

La alia ero de la vortparo, ARTO, ankaŭ devenas de la latina. La temo *arti-* (nominativo *ars*) baziĝas sur la radiko **ar*, kiun enhavas krome *armus* 'supra parto de la brako kaj ŝultro', *artus* 'membro' (kun diminutivo *articulus*) kaj kiu havas la prasignifon 'kunigi'. La latina *ars* havas la sencon de 'kapablo akirita per studo aŭ praktiko' kaj 'teknika lerteco', senco kiu poste konkretiĝas al tiu de 'metio' aŭ 'profesio'. En la antikva mondo oni kutimis diferencigi la *artes liberales* kiuj taŭgis por liberuloj kaj *artes sordidae* kiuj taŭgis nur por neliberaj sklavoj. Kiam la Angloj nomas la filizofian fakultaton *Faculty of Arts*, ili alprenas la sencon de 'artes liberales', kp. danan kaj norvegan [eksamen] *artium* 'bakalaŭreco'. La latina termino *ars* reprezentas la grekan *tehnē*, kiu postvivis en *tekniko*, *arkitekto* ktp. La greka vorto apartenas al granda familio, inter kies membroj estas sanskrita *takṣan* 'ĉarpentisto', l. *texere* 'teksti', irgaela *tāil* 'hakilo', mezaltgermana *dehsen* 'rompi linon' kaj eble g. *Dachs* 'melo'. La germana ekvivalento de *ars*, nome *Kunst*, verba substantivo de *können* 'scipovi', 'kapabli' anstataŭas ĉirkaŭ 1270 *list* kiu nun signifas 'ruzeco', sed parencas kun *lernen* 'lerni' kaj *lehren* 'instrui'. La nederlanda havas *konst* kaj la nordaj lingvoj *kunst*. En la senco de altgrada kapablo la germana ankaŭ substantivigis la infinitivon kiel das *Können*. Kiel V. KILPINEN formis la finnan *tiede* el *tietää* 'scii', tiel li formis *taide* 'arto' el *taitaa* 'scipovi' (v. Hakulinen). La kimra *celfyddyd* estas laŭŝajne prakelta vorto, ĉar la mezepoka formo *celmed* estas komparebla kun frua irgaela *calma* 'kuraĝa, viveca, efika'.

La etimologio de la latina *religio*, bazo de la internacia Esperanta vorto RELIGIO estas pridisputata. Jam antaŭ la fino de la Roma imperio ni konstatas du proponitajn solvojn. CICERONO en sia traktato pri la 'naturo de la dioj' rilatigas ĝin al la verbo *religere* (lv. relegi) 'rekonsideri, zorge pripensi', tiel aludante al la senco de 'skrupuleco ĉe diservo', kiun havis la latina substantivo. La kristano LACTANTIUS — kiu mortis en 375 — pensis pri la

verbo *religare* 'ligi', aludante al la 'devoj' kiujn la adoranto entreprenas. La verbo eble celis origine la kapbendojn (l. *vittae*) de la oferbestoj. Ĉiukaze AŬGUSTINO akceptis la parencecon de *religare*, LACTANTIUS aludis al la vortgrupo *religionum nodis* 'per la nodoj de la religioj' uzita de LUKRECIO; alia grupo estas *religio iurisiurandi* 'la ligemeco aŭ deviga karaktero de ĵuro'. Ofte en la klasika latina *religio* estas ekvivalento de 'skrupulo'. La vorto restis en f. *religion* (a. *religion*, ned. *religie*), it. *religione*, h. *religiön*, ankaŭ g. *Religion* kaj rusa *religiya*. Kiel sinonimon la germana uzas *Glaube*, lv. *kredo*, kp. en la nordaj lingvoj *tro* kaj en la finna *uskonto* el *uskoa* 'kredi'. La nederlanda ofte uzas *godsdienst* ne nur por la diservo mem, sed ankaŭ ĝenerale. La kimra *crefydd* — tute sendependa de *créd* 'kredo' — laŭŝajne estas prakelta, ĉar ĝi havas parencecon en la mezepoka irgaela *crabud*.

Estas rimarkinde ke la Grekoj ne havis specifan vorton por 'religio'. Ili plejparte kontentiĝis per *eusebeia* 'pieco' aŭ *ta theia* 'la diaj aferoj'. Aliflanke kelkaj modernaj lingvoj havas abstraktan substantivon por la 'religia sento', nome f. *religiosité* (g. *Religiosität*), it. *religiosità*, h. *religiosidad*, sed en la angla *religiosity* estas tre malofte uzita.

La intereso de la koncepto AMO baziĝas en ĝia ĝeneraleco hodiaŭ. La latina vorto *amare* 'ami' kaj substantivo *amor* (it. *amore*, h. *amor*, f. *amour*) devenas kiel *amicus* 'amiko' kaj *amita* 'onklino' de infana babilformo **ama*. Partsinonimo de *amare* estis *diligere* kun la nuanco 'alte ŝati', 'estimi'. Kelkaj modernaj lingvoj diferencigas gradojn, ekz. a. *love/like* 'ŝati' kaj g. *lieben/gerne haben*. La greka povis esprimi almenaŭ kvar specojn de amo, nome: (a) la seksan amon (*erōs*), (b) la familian senton (*storgē*), (c) la amikecon (*philia*) kaj (d) la amon de Dio al la homoj kaj reciproke (*agapē*). En Readmono VI. 4 ZAMENHOF tradukis per „Amu [la Eternulon]“ — en la hebrea 'ŝema' — la verbon *ahab*. Por *hesēb*, kiun la anglaj tradukintoj de la 16a jarcento tradukis per 'loving-kindness' li uzis 'favorkoreco', ekz. en Psalmo XXV. Inter la ĝermanaj lingvoj la angla havis *lufu* (novangle *love*) kaj la altgermana *luba*, kiun anstataŭis ĉirkaŭ 1200 *liebe*, kp. adjektivan *liep*. La norda *elskov* (sv. *älskog*) estas kunmetaĵo el *elske* 'ami' (kp. l. *alere* 'nutri') kaj *hugr* 'emo'. La finna formas el *rakas* 'kara' la verbon *rakastaa* 'ami' (kp. *rakastelu* 'amo'). La kimra

havas *caru* 'ami', *cariad* 'mo', kp. *cār* 'amiko' praparencon kun l. *carus* 'kara'. Sinonimo estas *serch* kiu parencon kun irgaela *searc* kaj plue kun la greka *stergein* 'ami' kaj la supre citita *storgē* 'spirita amo'. En la keltaj lingvoj la vorto signifis seksan amon, kiel montras la bretona *serc'h* 'konkubino'.

La koncepto VIRTO el l. *virtus* rilatas origine al la 'vireco', 'taŭgeco' aŭ 'efikeco' kaj pro tio tradukiĝis en la malnova altgermana per *tugunti* el *tugan* 'taŭgi', kp. en la nordaj lingvoj *dygd* kaj en la nederlanda *deugd*. La greka prototipo de latina vorto estis *aretē*, kiu ĉe Homero signifas virecon, kuraĝon kaj dignecon kaj parencon kun *aristos* 'plej bona' kaj eble *arsēn* 'viro'. Sub la influo de la kristana etiko, kiu alte taksis la ĉastecon — almenaŭ de la virino — *virtus* iom post iom specialiĝis al tiu karaktero, sed la kromsenso de 'efikeco', ekz. de medicina planto — kiel jam ĉe Ovmo *herbarum virtus* — postrestas (1) en f. *plantes qui ont la vertu* de guérir, h. *virtud* de las plantas, a. *virtue* of herbs, kaj (2) en la prepozicia grupo f. *en vertu de*, a. *by virtue of*, g. *kraft*, t.e. in Kraft, dana *i kraft af*, ned. *krachtens* kp. La finna ekvivalento estas *hyve*, substantivo el *hyvä* 'bona'. La kimra *rhinwedd* enhavas *rhin*, kiu signifas ankaŭ 'sekreto', vorton parencon kun ĝerm. **runō*, kaj *gwedd* 'formo'.

Ĉi tiuj vortoj montras klare, kiom ni ŝuldas al la antikvaj civilizoj kaj kiel intime interplektitaj estas la konceptoj de la okcidentaj popoloj.

Summary

The international vocabulary typical of modern civilization is in the main a heritage from the Greeks and Romans. Especially in science and mathematics, philosophy, grammar and the arts, the Greeks created terms, which the Romans more or less literally translated, e. g. *science* (*epistēmē*), *art* (*technē*), *nature* (*physis*). These key-words and some characteristically Latin concepts, e. g. *civilization*, *culture*, *religion* and *virtue* are traced to their origins in certain metaphorical applications. Loan-translations in the Germanic languages, e. g. *Wissenschaft*, *Kunst*, *Tugend* are also elucidated. Some modern words, e. g. *love* (f. *amour*, g. *Liebe* etc.) cover a plurality of Greek words (*erōs*, *agapē*, *philia*, *storgē*). By adducing equivalents of cultural terms from peripheral languages such as Welsh and Finnish, we observe different approaches in the original metaphors and their semantic history.

La funkcio de la derivita adverbo en Esperanto

de D. B. GREGOR*)

Ĉiu Esperantisto, de la plej eta ĝis la plej eminenta, sentas ke unu el la plej elstaraj kaj plaĉaj kvalitoj de la lingvo estas la ebleco, decidi la funkcion de senŝanĝa radiko tutsimple aldonante unu el la finaĵoj *o, a, i, e*. Vere estas, ke la afero ne estas ja tiel simpla, — ke ekzemple la evidente gramatika karaktero de la radikoj ludas rolon, tiel ke tiu tuta tereno fariĝis agrabla ĉasejo por gramatikistoj kaj erudiciuloj (por ne paroli pri tiuj pedantuloj, kiuj je la fino de siaj laboroj trovis ke ili estas kreintaj Idon): sed malgraŭ ĉiuj ĉi komplikaĵoj Esperanto ŝuldas grandan parton de sia facileco kaj tial de sia disvastigiteco al tiu genie elpensita rimedo, semantike ekfunkciigi radikon pere de gramatike distingita finaĵo.

Nu, dum la batalo furiozis ĉirkaŭ la senpera verbigo de adjektivoj (*bluas, fortas* ktp.), kaj nur hezite oni kuraĝas verbigi iujn, sed ne ĉiujn, substantivojn (*patri* heziligas, sed ne *marteli*), kaj la substantivigo de verboj (*skribo* anst. *skribado*) kaj de adjektivoj (*belo* anst. *beleco*) levas siajn proprajn problemojn, la derivado de adverboj ĉu de substantiva, ĉu de verba, ĉu de adjektiva radiko procedis tute sendiskute. Ĉi tio estas tiom pli rimarkinda, ĉar adverboj diferencas inter si laŭ pluraj kategorioj, povante esti aŭ loka aŭ tempa aŭ maniera aŭ alia. Tamen, la adverboj havas ĉi tiun avantaĝon, ke preskaŭ ĉiam la kunteksto montras, al kiu kategorio ili apartenas. Ekzemple *ventre*, tutsola, povus signifigi aŭ *en* aŭ *sur la ventro*; sed tuj kiam ĝin sekvas *rampante*, la signifo *sur la ventro* estas klara, kaj ne necesus prefiksi *sur*, skribante *surventre*, kvankam tiu vorto estas absolute korekta. Tial okazas, ke ZAMENHOF en unu kaj la sama poemo (FK 323—4) skribas unue *surgenue starantan* kaj poste *staras genue*. Same po-

*) Master of Arts (magistro), Oxford University, licenciato de Brit. Esp. Asocio, licea instruisto pri la itala kaj klasikaj lingvoj.

vas okazi, ke la sama adverbigita substantivo estas uzita en pli ol unu adverba senco; ekzemple: —

plenbeke paseroj pepas (Price Heywood, DP 37/-9) (maniero).

*Kornikoj babilon daŭrigas larĝbeke*¹ (Grabowski, ST 6/22) (maniero).

kis' la lipojn beke boras (Kalocsay, SK 151/-4) („kiel per“).

bruston boras beke akcipitro (Auld, K 88/3) (instrumento).

Ke ĉi tie ni ekhavas potencon rimedon, koncize, trafe, kaj pitoreske esprimi niajn ideojn, estas evidente; kaj ĉar ĉi tiuj kvalitoj estas karakterizaj por la poezio, ne estas mirinde ke precipe poetoj uzis kaj eluzis la derivitan adverbbon. KALOCSAY, skribante² pri *Sinjoro Tadeo* de GRABOWSKI, konstatas ke inter ĝiaj pioniraj trajtoj estas „la plej larĝa kaj vastsenca uzo de la adverboj, tiel ke la e-finaĵo post substantiva radiko formas kvazaŭ novan kazon, specon de ablativo, anstataŭante la plej diversajn prepoziciojn.“ Sed ankaŭ prozistoj ne fuĝis de tiaj formoj; kaj efektive laŭmezure kiel ĉe proza verkisto abundas la derivita adverbo, oni povas kategoriigi liajn verkojn en la poezian stilon. Inter la donotaj ekzemploj la prozaj estas steletumitaj.

La originaleco de GRABOWSKI en ĉi tiu rilato estas eĉ pli frapa, ĉar temas pri tradukanto, kiu, kiel niaj komparoj el la originalo montras, ne havis antaŭ si adverbojn, sed instinkte utiligis tiun rimedon por traduki diversajn polajn esprimojn. Li povis kompreneble troigi: ekzemple, pro tio ke la pola *po* ofte indikas manieron, li tradukas *po lacinie* per *latine* (anst. *latinon*) eĉ kiam, laŭ la pola idiotismo, ĝi sekvas la transitivan verbon por *kompreni*; ekz. ST 6/540 *kiuj sciis eĉ latine*³. Kun tiu ni povas kompari *Zam.*, Fab. 2, 62/20 *legi en ili nigre sur blanke* (kie ZAMENHOF tradukis el la germana).

Ni ordigu nun niajn ekzemplojn, procedante de la malplej al la plej oftaj okazoj: —

¹ Pole: *rozdziawwszy sie* (gapinte).

² LSF 57.

³ *po lacinie umieli*. Verŝajne GRABOWSKI pensis pri la latina esprimo: *scire Latine*.

1. *Kaŭzo*: malofta, pro konfuzebleco kun *Maniero*; ekz. Boulton E 218/4 *ekploras vivovee*, ĉu „pro la veoj de la vivo“ aŭ „vekriante pri la vivo“? Pli klara kiel prepoziciaĵo kun *de* laŭ la tipo *kaŭze de*:

*Strangdispone de sortoj*⁴ Grabowski, ST 8/577.

Sed la kunteksto povas montri kaŭzecon: *Akvomanke ĝi mortis*⁵ (ib. 8/94).

2. *Tempo*: kompreneble ofta ĉe ordinaraj vortoj rilatantaj al periodoj de tempo, sed malofta alimaniere:

mortintaj naske Kalocsay, SK 132/1 *Geknabe ni vadis* Rossetti, PK 91

3. *Grado*: malofta, pro la limigo al adjektivoj aŭ aliaj adverboj, ĉar kun verboj ĝi tuŝas manieron. Jen kvar ekzemploj el M. Boulton, *Eroj*:

ŝtale forta (295/5) *pretertere dikaj* (250/6)
neĝe ĉasta (204/2) *preterŝulde kvita* (192/10)

4. *Celo* aŭ *Rezulto*: malofta, ĉar la rilato inter la adverbo kaj la verbo konsistigas kvazaŭe kunfandiĝon de ideoj:

pune rifuzis Thorsen, R 106/7 *ŝiriĝos vunde* Kalocsay, SK 56/17
sange bati Kurzens, DP 57/9 *ektuŝis vunde* Boulton, E 112/-2
refute paroli Boulton, E 187/-3 *vunde brogis* Boulton, E 212/8

5. *Instrumento*: sufiĉe ofta kaj plejparte kun konkretaj substantivoj:

vokos gonge Heywood, DP 46/—10 *or-fadene brodis* Boulton, E 315/—9
*montris fingre*⁶ Grab., ST 8/104 *brodas ore, geme* Boulton, E 177/2
*pafale mortigas*⁷ Grab., ST 8/239 *daŭrigi specon ide* Boulton, E 193/2

⁴ *Dziwnem zrzadzeniem losów* (instrumenta kazo).

⁵ *Z niedostatką wody* (De nesufiĉeco de akvo).

⁶ *palcem* (instr. kazo).

⁷ *ze stucca* (de pafilo).

<i>larĝa-flugile</i> batante ⁸ Grab., ST 2/15	<i>pluvokise trempos</i> Boulton, E 198/—3
<i>murdi bombatome</i> Boulton, E 66/—3	<i>eksplode, brule, vente aŭ</i> <i>kancere mortigi</i> E 78/3

6. *Loko*: ofta, plejparte kun signifo *en*:

<i>kote kaŭras</i> Heywood, DP 43/—4	<i>ĝardene forestis</i> ⁹ Grab., ST 2/460
<i>vidas balkone</i> Thorsen, R 82/—10	<i>ĝardene sidas</i> Rossetti, PK 59/4
<i>turnas sin tombe</i> Kal., SK 118/8	<i>manĝis kastele</i> ¹⁰ Grab., ST 5/301
<i>kuŝas tombe</i> Rossetti, K 190/3	<i>herbe svarmis</i> ¹¹ Grab., ST 5/272
<i>marŝadas kaĝe</i> Boulton, E 33/6	<i>lunlume revivantaj</i> Newell, DP 75
<i>libre premita floro</i> Kal., SK 148/6	<i>okulangule viŝas</i> Kal., SK 130/5
<i>vaganta labirinte</i> Boulton, E 304/—9	<i>sidis ombre</i> Thorsen, R 89/12

Tiel ne malofte en prepoziciaĵo kun *de*:

ekstazas brake de l' amanto Thorsen, R 86/—1
aperis fone de l' arabaj muroj Thorsen, R 89/15
*dormi ombre de viaj okulharoj*¹² Waringhien, FdM X/VII. 14.
*morti borde de via daŭr'*¹³ Vatré, FdM VIII. 44.

Foje kun signifo *sur*:

<i>Montete kuris</i> Rossetti, PK 91/13	<i>venĝon tombejurus</i> ¹⁴ Grab., ST 2/342
--	---

Sed pli ofte oni sentas bezonon klarigi per prefiksado de *sur* kiel supre montrite):

⁸ *szerokiem skrzydłem* (instr. kazo).
⁹ *wdogrodzie* (en la ĝ.).
¹⁰ *w zamczysku* (en la k.).
¹¹ *po trawie* (en kaj sur la h.).
¹² *à l'ombre de vos cils*.
¹³ *au bord de votre éternité*.
¹⁴ *poprzysiągl na grobie* (j. sur la tombo).

Survange ardadas Nuñez-Dubus, DP 87/—3 *eksonu surliute* Kal., SK 18/8

Malofte kun signifo ĉe: *diskutante table* Thorsen, R 92/4

7. *Maniere*: la plej ofta uzo.

a) *el substantivoj*, ofte kunmetitaj, kaj speciale korpopartoj:

<i>diras sangbuŝe</i> Kurzens, MS 18/8	<i>tutgorĝe ridante</i> ¹⁵ Grab., ST 9/139
<i>sanglipe maĉas</i> Kalocsay, SK 61/—6	<i>ridegis plormiene</i> Szilagyi, DP 110/—4
<i>sorbas plenabuŝe</i> Kalocsay, SK 138/—9	<i>reĝmiene vadi</i> Boulton, E 41/—5
<i>kaptu kole</i> Kalocsay, SK 22/—1	<i>kape vaganta</i> Totsche, DP 124/4
<i>frapis pugnalnaze</i> Kalocsay, SK 171/14	<i>brutmense ignoris</i> Dinwoodie, K 133

Tiel kun pliprecizigo per prefiksita prepozicio:

<i>surgenue maĉas</i> Heywood, DP 38/—8	<i>ĝismedole penetras</i> Thorsen, R 80
<i>surventre rampante</i> Baghy, DM 134/—10	<i>ĝisrande ŝaŭmantan</i> , Dresen, ap. Totsche, PP 41
<i>perokule taksadis</i> Baghy, DM 115/—14	

b) *el verboj*, ofte samsignifaj kun participoj:

<i>gutoj frapiĝas resalte</i> Zam, OV 591	<i>irus for ŝultrotire</i> Kal., SK 146/—7
<i>ŝirme kontraŭ</i> Zam.,* Fab. 2,86/—3	<i>tiondire kaptis</i> ¹⁶ Grabowski, ST 9/298
<i>eksonu ĝeme</i> Kalocsay, SK 18/8	<i>glute manĝos</i> Totsche, DP 126/—2
<i>dentgrince gardatan</i> Kalocsay, SK 181/1	<i>aplaŭdas stare</i> Thorsen, R 84/—7
<i>bene tegis</i> Kalocsay, SK 161/—6	<i>zume ĉirkaŭsvarmas</i> Heywood, DP 44

¹⁵ *na cale gardlo.*

¹⁶ *To mowiac* (Tion dirante).

<i>ĉeestas bene</i> Boulton, E 230/—2	<i>rikane algapas</i> Kurzens, DP 57/2
<i>iris ne plu vivovole</i> Boulton, E 190/7	<i>trapantoflas molpaŝe*</i> Rot- kviĉ, NLR 1, 199/—14
<i>kuris boje</i> Boulton, E 115/—10	<i>sangŝpruce interpugnas*</i> Rot- kviĉ, NLR 1, 200/5
<i>fontis stelokree</i> Boulton E 315/—5	<i>okulstreĉe sondi</i> Rossetti, Otelo 63/4

Estas eĉ eble, uzi la adverbos en la senco *per -ado*:
*nokto estis pasonta trinke, manĝe, kante*¹⁷ Grabowski, ST 8/800,
fratobuĉe falis milionoj Rossetti, PK 81/—7

aŭ en la senco *kun -o de* (t. e. kiel prepoziciaĵo):
*antaŭsente de stranga afero*¹⁸ Grabowski, ST 8/7

Foje la verbo estas refleksiva:

<i>sinforĝese rigardis</i> Baghy*, DM 123	<i>idiĝas sinampute</i> Francis, K 16
<i>sidante sinforĝese</i> Kalocsay, SK 127/11	<i>kliniĝis sinofere</i> Kal., SK 73/8

Estas rimarkinde, ke verboj povas perdi siajn transitivecon:

<i>batas konfuze</i> Zamenhof, OV 592	<i>mi febras broge</i> ¹⁹ Boulton E 111/—1
<i>rememore reviviĝis</i> Zamenhof, OV 592	<i>portos flose</i> ²⁰ Rossetti, K 192/—3

c) *el adjektivoj* (ofte koloraj):

<i>grize strekis harojn</i> Boulton, K 37/—2	<i>revoj-peze falis kap'</i> ²¹ Grab., ST 5/905
<i>malaperis purpure</i> Boulton, E 208/12	<i>maroflok' flugas ondece</i> Boul- ton, E 17/—1
<i>fulmetis brune</i> Boulton E 268/2	<i>brilos ruĝe</i> Boulton E 34/8

¹⁷ noc te przepic, przejsc i przespiewac (tiun n. tratrinki, tramanĝi kaj trakanti).

¹⁸ przecucie nadzwyczajnych zdarzen (antaŭsento de eksterordinaraj okazantaĵoj).

¹⁹ Eble tamen transitiva.

²⁰ Post ZAMENHOF tamen flosi estas ofte netransitiva.

²¹ ciezka marzeniami (peza je revoj).

²² Кр. germ. *lebensbejahend*.

<i>kadavre falas</i> Ribillard, VsP*	<i>vivas argile</i> Boulton, E 232/7
<i>ventege ribelas</i> Kurzens, DP 64/—7	<i>brilis perlamote</i> Boulton, E 98/—6
<i>eksvarmas funge</i> Maiura, DP 72/3	<i>flugpendis juvele</i> , Boulton, E 244/1
<i>neĝofloke masiĝas</i> Francis, K 174	<i>ligis placente*</i> Rotkvič, N/R 199/—4
d) kiel „konkretaj“ objektoj:	
<i>meĉe briletante</i> Baghy, VD 134/—6	<i>vartus ŝilde</i> Auld., K 103/5
<i>tamtame vibras</i> Ribillard, VsP*	<i>benu ŝilde</i> Boulton, E 129/—7
<i>akordione faldita</i> Ribillard, VsP*	<i>ĉerke litas</i> Francis, K 169/4
<i>ringe fumon lasas</i> Grab., FK 362/1	<i>putris lepre</i> Boulton, E 97/7 <i>ĵetegos ŝakte</i> Rossetti, Otel 196/—5

Resumante do tion, kion ni povas konkludi el la supra studo, ni rimarkigas ke (I) la finaĵo *-e* povas esti aldonita al kiu ajn radiko, sen tio, ke la senco malklariĝas; (II) ĝi donas al Esperanto epigraman kvaliton; (III) ĝi estas poezie tre efika esprimilo; (IV) ĝi povas viviĝi kaj pitoreskigi la prozon; (V) ĝi povas anstataŭi la participojn; (VI) adverbigita verb-radiko povas senigi je ĉiu eco krom tiu de la baza ideo.

Ni apliku ĉi tiujn konstatojn al la analizo de frazo el *Eroj*²³:

*domoj . . . disfalis en detruoj
polve, fragmente, ruine,
sed ne kapitulace!*

t. e. ili disfalis en (nubo de) polvo, laŭ (aŭ po) fragmentoj, kiel ruinoj, sed ne kapitulacante.

Fine, por kompreni kion signifas la reduktado de verba radiko al la nuda, kruda ideo, pripensu ĉi tiun version el la sama verko:²⁴ *homoj komencis revii buĉe*. Nu, ĉiu traduku tiun en sian gepatran lingvon!

²³ 282/10.

²⁴ 34/6.

MALLONGIGOJ

FK	Fundamenta Krestomatio	R	Rozoj kaj Urtikoj
DP	Dekdu Poetoj	FdM	Floroj de l' Malbono
ST	Sinjoro Tadeo	PP	De pago al pago
ST	Streĉita Kordo	OV	Originala Verkaro
K	Kvaropo	NLR	Nica Literatura Revuo
LSF	Lingvo, Stilo, Formo	DM	Dancu, Marionetoj
Fab	Fabeloj de Andersen	VsP	Vagado sub Palmoj
E	Eroj	SP	Songe sub Pomarbo
PK	Pinta Krajono	Maz	Mazeppa

Summary

The capacity of Esperanto to create adverbs out of all roots, whatever their grammatical character, is a prime source of its flexibility and confers on it an epigrammatic quality which poets have been quick to exploit. It enables the translator to render a difficult phrase with clarity, and provides the original writer with a means of vivid expression. Perhaps no single quality has done more to invest Esperanto with a personality. Let the doubter try translating some of the quoted phrases into his native tongue.

Interplektitaj Frazoj

de H. A. DE HOOG.

Kvankam logiko povas esti nemalhavebla por konstrui ian sistemon fizikan aŭ matematikan, kaj ĝi certe estas de tre granda valoro por la formulado de gramatikaj konceptoj, por la difinado de gramatikaj reguloj kaj leĝoj, — ĉiu gramatikisto tamen sperdas, ke sur la tereno de la gramatiko kaj speciale sur la subtereno de la sintakso, ĝia Moŝto ne regas absolute.

Tial ni ĉiam renkontas frazojn, kies sintaksa konstruo metas nin antaŭ malfacilaĵojn.

Unu el tiuj konstruoj, kaj eble tiu, kiu fluigis la plej grandan riveron da inko, estas tipigita per Mateo 16/13:

- (1) Kiu, diras la homoj, ke mi estas? (Kp. Luk 9/18 kaj Mark 8/27).

Kaj, sen komo post kiu (kaj tio jam estas multedira), en Mat 16/15; Mark 8/29; Luk 9/20:

- (2) Sed vi, kiu vi diras, ke mi estas?

En la angla biblio-traduko de la 17-a centjaro la teksto havas: „But whom say ye that I am?“, prezentante do la akuzativan formon de la pronomo. En la reviziita eldono tiu „whom“ malaperis, kiel sekvo de la ofte ardaĵ gramatikaj disputoj pri „la ĝusta formo“.

Who (kiu) ja estas predikativa parto en la subpropozicio, do devas havi la nominativan formon. Sed — kaj tio estas treege misgvida — ĝi staras ĉe la kapo de la ĉefpropozicio „Kiu diras la homoj“ kaj ŝajnas esti esenca parto de tio.

En nia Esperanto-biblio ĝi estas jen apartigita de la ĉefpropozicio per komo, kio estas sendube malĝusta, jen metita en rektan rilaton al la verbo, sen komo.

Tiaj frazoj, en kiuj parto de la subpropozicio staras en la ĉefpropozicio, estas tute ne maloftaj. Mi donas kelkajn ekzemplojn:

- (3) Mat 27/17: Kiun vi deziras, ke mi liberigu?
(4) Luk 7/24: Kion vi eliris en la dezerton, por rigardi? (atentu la komon) kaj 7/25: Kion vi eliris por vidi?

- (5) Mat 30/32: Kion vi volas, ke mi faru al vi?
- (6) Mat 26/17: Kie vi volas, ke mi pretigu por vi, por manĝi la Paskon?
- (7) Mark 14/12: Kien vi volas, ke ni iru?
- (8) Mat 27/21: Kiun el la du vi volas, ke mi liberigu al Vi?
- (9) 2 Kron 10/9: Kion vi konsilas, ke ni respondu al la popolo? Ankaŭ en la ĉiutaga lingvo ili estas uzataj:
- (10) Kiom vi kalkulas, ke la libro kostos?
- (11) En kiu hotelo vi asertas, ke li loĝas?
- (12) Kio vi imagas al vi, ke mi estas?

La sama konstruo povas en sia tuteco esti dependa de alia propozicio. Plena Gramatiko (2-a eldono § 366, Rim. II) donas: „La donaco, kiun li promesas, ke li sendos, ne alvenas“ kaj „La viro, kiun vi asertas, ke vi vidas, estas delonge mortinta“.

Kaj la aŭtoroj aldonas, ke tiaj frazkonstruoj ekzistas en la franca kaj itala lingvoj, sed en Esperanto estas „krude nekorektaj“.

La lasta el la du ekzemploj tamen rememorigis min pri la fama frazo de Shakespeare: „Young Ferdinand, whom they suppose is drowned“ (Tempest III; 3—92) kaj pri I Sam 25/11: „Give it to men, whom I know not, whence they be“.

who / au,
whom they suppose to be d.

Ĝuste en la angla lingvo tia frazkonstruo havas tre fekundan vivon, malgraŭ la oftaj avertoj, kiuj tamen ne trafas la konstruon en si mem, sed la konstantan uzadon de *whom* anstataŭ la ofte pli korekta *who*.

H. F. FOWLER, dum longaj jaroj fama mentoro de la britoj por lingvaj aferoj, liveras longan liston en „A dictionary of Modern English Usage“ (pĝ. 724 k. skv.) kaj en „The Times Educational Supplement“ (citita en „Good English“ de G. H. VALLINS) Dr. P. B. BALLARD plendis, ke iu ĵetis al li la demandon „Whom do you think I am?“ (Kiun vi pensas ke mi estas?).

Manual

Pli modernaj gramatikistoj akceptas kaj la konstruon kaj la uzadon de la akuzativo.

EDZO KRUISINGA diras, ke ni devus kondamni ilin, „se gramatiko estus ludo de logiko“ kaj venas kun la tre kurioza ekzemplo el Galahad de John Erskine (ĉ. 7, pĝ. 51), en kiu ne-edukita homo diras: „Whom was that you were speaking with, Sir Ector?“

JESPERSEN konstatas simple, ke la parolinstinkto postulas la akuzativon por eviti du sinsekvajn nominativojn.

Sufiĉe por pruvi, ke ĝuste la angla lingvistika literaturo liveras abundan materialon koncerne ĉi tiun evidente tre vivan kaj neekstermeblan „eraron“.

Dum tie la problemo en la konstruo koncentriĝas al la kazo de la pronomo (who/whom), — la franca lingvo montras necertecon pri la karaktero de la kunliganta vorto inter ambaŭ propozicioj. Oni skribas: „Les manuels que vous disiez que vous avez achetés“, sed „Les manuels que vous disiez *qui* étaient excellents“. La s de achetés kaj precipe la uzado de *qui* en la dua frazo pravas, ke oni sentas la inklinon rigardi la ligantan vorton ne kiel konjunkcion, sed kiel *relativon*.

Nuntempe, sub influo de gramatikaj avertistoj, oni pli kaj pli evitas la dilemon, kaj diri: „L’homme que je crois qu’il a vu ce matin“, ne plu estas eleganta!

Sed la klasikaj francaj aŭtoroj tute ne timis la konstruon. (Ekz.: L’homme que je crois *qui* est là. L’homme qu’il a dit *qui* est venu. Nous verrons si c’est moi que vous voudrez *qui* sorte.)

Eble ĉar la francoj emas montri pli da lingva disciplino (aŭ: obeemo al *sia* Akademio) ni povas diri, ke ĝi ne plu estas moderna. Tamen, la konstruo konserviĝis en demandoj: Que veux-tu *qui* arrive? Laquelle penses-tu *qui* vaille le mieux? Qui dites-vous *qui* est venu hier? (MARTINON).

En la franca lingvo oni do preskaŭ sukcesis, per ofta kondamnado, forigi tiajn „nelogikajn“ frazojn, sed en la nederlanda lingvo kaj la germana la fenomeno estas certe same produktiva kiel en la angla, kaj akceptita kiel tute normala.

La simpla tipo, konsistanta el nur du membroj, estas tre ĝenerala:

Dat wil ik niet, dat je zegt.

Daar denk ik niet, dat ik nog vaak zal komen.

Wie denk je, dat ik gisteren ontmoette?

Wie zeggen de mensen, dat ik ben?

Wo wünschen Sie, dass ich anfangen soll?

In diesem Lichte wünschte ich, dass alle es sähen.

En la demandaj frazoj alia konstruo eĉ ne estas ebla!

Se tia tuto fariĝas dependa de tria propozicio, la konstruo fariĝas iom pli peza, sed restas uzebla kaj uzata. Ekz.: De heer Verschnur, die ik zag, dat mij hoe langer hoe waardeerde (Bilderdijk, ĉ. 1825) een zendeling, die ze zeiden, dat door de inboorlingen vermoord was (AUGUSTA DE WIT, ĉ. 1910). (Tradukoj: S-ro Verschuur, kiu mi vidis, ke ĉiam pli ŝatis min; misiisto, kiu ili diris, ke estis murdita de la indiĝenoj.)

Prof. G. S. OVERDIEP akceptas la konstruon kiel „kunplektaĵon“ kaj imputas ĝin al emociaj influoj.

Ankaŭ en Nederlando okazis disputoj pri la kazoj de la pronomoj, kiam ĉi tiuj ankoraŭ havis kazojn (almenaŭ en la presita lingvo), kaj fama fariĝis ankaŭ ĉi tie I Sam 25/11: „Zou ik het den mannen geven, *dien* ik niet weet vanwaar ze zijn“.

Kelkaj 19-jarcentaj verkistoj (i. a. JACOB VAN LENNEP) sisteme uzis la akuzativon kaj la gramatikistoj de la antaŭa centjaro senkulpigis aŭ pravigis ilin per apelacio al la latina „akuzativo kun infinitivo“. Estas certe, ke la konstruo vivis en la nederlanda literatura lingvo ek de ties komenciĝo.

En 1952, preparante la trian eldonon de la Plena Gramatiko, nia gramatikisto GASTON WARINGHIEN atentigis min pri § 366 Rim. II de la dua eldono kaj petis mian opinion.

Kaj efektive la demandoj trudas sin al ni: Ĉu tiaj frazoj estas normalaj? Ĉu ili estas permeseblaj ankaŭ en Esperanto? Kaj se jes, ĉu ĉiuj tipoj estas akcepteblaj? Kio estas la kazo por la demanda (relativa) pronomo?

Mi opinias, ke, koncerne la dumembran tipon, komenciĝantan per demanda pronomo aŭ adverbo, ni ne bezonas heziti.

Tiaj frazoj ja estas la demandaj korespondaĵoj je komunikoj kun objekta subpropozicio, kiel: La homoj diras, ke vi estas Elija (1,2); Mi deziras, ke vi faru al mi resaniĝon (5); Vi volas ke mi pretigu la Paskon tie (6); Ni volas, ke vi liberigu lin (8); Vi eliris en la dezerton por vidi profeton (4); Ni konsilas, ke vi respondu tion (9).

En la demando oni do demandas pri ia frazparto de la kompletivo. Tute normale oni metas la demandan vorton en ties naturan lokon: ĉe la komenco de la frazo. Ne ekzistas eĉ alternativo; kie alie loki ĝin?

La saman fenomenon ni renkontas ankaŭ en ekzemple:

Tie mia patrino ne volas, ke mi ludu.

Tial mi pensas, ke libroj devas esti malmultekostaj.

Mia patrino deziras ke mi manĝu sufiĉe. *Alie* ŝi pensas, ke mi malsaniĝos.

Tiaj inversaĵoj, devioj de la logika vortordo, estas stile necesaj, aŭ de la parolanto juĝitaj kiel necesaj, por meti antaŭen la „temon“ t. e. la psikologian subjekton de la frazo.

Ni vidis, ke la konstruo estas produktiva en diversaj lingvoj, kaj ne povas ne konkludi, ke ni devas akcepti ĝin ankaŭ por Esperanto.

Apartan konsideron tamen meritas la demando, ĉu ili ankaŭ *stile* ĉiam estas rekomendindaj.

Pri tio ni povas kelkfoje dubi. Mi kredas, ke Luk 7/25: „Kion vi eliris por vidi?“ estas iom aŭdaca kaj preferus: Kial vi eliris en la dezerton? Ĉu por vidi . . . ?

Sed ĉu eble tiu sento de malordinareco ne estas kaŭzita de la fakto, ke „kion vi eliris“ per si mem ne estas ebla konstruo, dum en la aliaj frazoj (ekz.: „kion vi volas“) tiu sento de kolizio mankas.

Eble jes, sed ĝuste tio pravas, ke ni *sentas* malgraŭ nia logiko *ian rilaton inter la demanda pronomo kaj la unua verbo*, kvankam ĝi dependas de la dua. Kaj tio klarigas la „eraron“ en la kazo, kiun la britoj faras: Whom do you think I am?

Logika analizo ne povas esti alia ol:

(Kiu vi diras, ke mi estas?)

Vi diras — ĉefpropozicio; kiu . . . ke mi estas — subpropozicio; ke-subjunkcio; mi-subjekto; estas kiu-predikato; kiu-predikativa pronomo.

Sed la logiko ne sufiĉas! 'Kiu' estas esenca parto de „kiu vi diras“ kaj la rilato inter kiu kaj la verbo 'diras', kiun ni instinkte sentas, estas pli ol nura iluzio.

Oni *povas*, komparante kun: „Kion vi diras“, teni la aserton, ke 'kiu' estas iel la objekto de la tuta resto: „vi diras ke mi estas“. Tamen, mi ne volas rekomendi la (britecan) uzadon de *kiun*.

La vorto 'kiu' havas vere duoblan funkcion en tiaj konstruoj.

Ĝuste ĉar la demanda vorto estas la psikologia subjekto, ĝi elstaras en la menso de la uzanto kiel la ĉefa vorto de la frazo.

Tial ŝajnas al mi nemirige, ke oni sentas la rilaton inter tiu vorto kaj la ĉefpropozicia verbo kiel rektan, kvankam ĝi dependas de ĝi nur nerekte, nome kiel komplemento (en plej vasta senco) de la subpropozicia verbo, kiu siavice dependas de la ĉefpropozicia.

La sintaksa logiko povas analizi kiel ajn, psikologie ne ekzistas diferenco inter la pronomo kaj la resto de la frazo en:

Kiun vi deziras, ke mi punu?

Kiu vi deziras, ke estu punata?

Kiun vi deziras punata?

En ĉiuj tri kazoj la rilato inter kiu(n) kaj la resto estas fakte la objekta rilato.

La lasta konstruo (Kiun vi deziras punata?) kondukas min al la kelkfoje prezentata demando, ĉu en la formado de la traktataj frazoj la latina (kaj angla) akuzativo kun infinitivo ludas ian rolon. Tian supozon ni trovas kaj en anglaj fontoj kaj ĉe MARTINON, eĉ en la malnova gramatiko de DEN HERTOG por la nederlanda lingvo.

Nu, povas esti, ke en Britujo la emo al konformeco inter „Whom do you think to be a liar?“ kaj „Who(m) do you think is a liar?“ havis influon, sed por la franca lingvo kaj la nederlanda kaj germana lingvoj, kie la akuzativo kun infinitivo estas apenaŭ uzata krom en kelkaj simplaj okazoj (Ik zag hem komen = Mi vidis lin veni), tio ne povas esti vera. Nur en la literatura lingvo tia influo povus ekzisti, sed ni konstatas, ke ĝuste en la komuna lingvo la fenomeno spontanee vivadas.

— Pro la intima ligiteco de la pronomo al la resto de la frazo, la komo, kiun ni trovas en Marko 8/27, Mateo 16/13, kaj Luko 9/18 estas sendube erara. Kurioze estas, ke ĝi ne estas uzata en la paralelaj Mat 16/15, Mark 8/29, Luk 9/20. Tre verŝajne la angla biblio-komitato uzis ĝin sub influo de la opinio, ke la ĉefpropozicio estas iel parenteza, opinio, kiun FOWLER absolute venkis kaj detruis.

Kaj nun la trimembra tipo: „La homo, kiun vi deziras, ke mi liberigu, jam mortis“.

El Plena Gramatiko § 266: La donaco, kiun li promesis, ke li sendos, ne alvenis. La viro, kiun vi asertas, ke vi vidis, estas delonge mortinta.

Ĉu vere „krude malkorekta“? Tiel kondamnas P. G. en samopi-

nieco kun la franca „grammaire raisonnée“, supozante, ke la konstruo estas de franca deveno (aŭ itala).

Ni vidis tamen, ke ĝi estas tre produktiva ankaŭ en aliaj lingvoj kaj tre verŝajne ankoraŭ estus tia ankaŭ en la franca, se ne la jam iom malmodernaj gramatikaj konceptoj estus atakintaj ĝin.

Mi opinias, ke tia vivoplena frazspeco ne povas esti anatemata en Esperanto.

Ĉu frazo kiel: „La viro, kiun ili deziras, ke Pilato liberigu, estis fama rabisto“, estas iel stranga aŭ neklara? Estas vere iom strange, ke ni devas ŝanĝi 'kiun' je 'kiu', kiam ni konstruas jene: La viro, kiu ili deziras ke estu liberigita . . . ; kaj ni povas antaŭvidi la saman „eraron“, kiu en Britujo kaŭzis tiom da disputado, tuj kiam Esperanto estos pli universale uzata.

Sed tiu malgranda malkonvenaĵo ne povas nin devigi jam antaŭe ekzili la tutan frazŝablonon!

La uzado de la trimembra tipo ja estas nepra kaj eĉ logika konsekvenco de la uzado de la dumembra tipo.

La frazo: Li ne estas la heroo, kiu(n) la aliaj pensas, ke li estas —; ja ne povas esti alimaniere esprimita same koncize kaj klare, kaj ĝi ne estas tute samsignifa kun la multe pli ĝenerala: Li ne estas tia heroo, kiel la aliaj pensas.

Eble ke en la iom komplika interrilato kuŝas la respondo, kial ZAMENHOF uzis *kiel* anstataŭ la kutima kian en la samspeca frazo: Ili ne restigis tian riĉecon, kiel la homoj asertis (Fab. de And. III pĝ. 23) (vidu §§ 27—29 de mia „Du Malsanoj en Esperanto“).

• Aliaj ekzemploj:

— Ĉu vi scias, kion li pensas, ke oni forprenos de li? (Atentu, ke *kion* estas ebلا objekto post pensi kaj post forpreni, kio certe faciligas la konstruon ĉi tie,)

— La hotelo, en kiu li diris, ke ni devos loĝi, ne povis akcepti nin.

— La viro, kiun vi neniam pensos, ke mi invitos, estas ĝuste la plej taŭga persono por tio.

Kompreneble oni *povus* diri: La viro, pri kiu vi neniam pensos, ke mi invitos lin, estas . . . ; sed tio estas „penso post la faro“ kaj miaopinie ankaŭ malpli ŝarĝita, malpli evokiva!

— Restas al ni nenio alia krom akcepti ankaŭ en Esperanton tiajn frazturnojn, tiel oftajn en la plej gravaj eŭropaj lingvoj. Ni

povas ilin rigardi kiel stilan figuron iom komplikan, sed normalan.

La sola kriterio povas esti la klareco kaj tuja komprenebleco de la frazo; gramatikajn oponojn oni ne povas fari.

Tiu kriterio de klareco kaj komprenebleco eble devigos nin limigi nin iomete, se la pronomo ne povos esti objekto de la ĉefpropozicia verbo mem. Tiam ni do evitos: „La viro, kiun vi asertas, ke vi vidis,“ (P. G. § 366), ĉar oni ja ne povas 'aserti viron'. Sed komprenu, ke tia limigo estas kontraŭ-logika, ĉar 'kiun' ja estas objekto de 'vidis' laŭ la akceptita meĥanismo sintaksa, kaj ne de 'asertas'.

*La viro,
kiu kiun
vi asertas,
ke vi lin
vidis.*

Ni do akceptu:

A: La rektajn demandojn (Tipo: Kiu ili diras, ke mi estas?)

B 1: La dependajn demandojn (Tipo: Li deziris scii, kiu la homoj diras, ke li estas).

B 2: La eksplikajn epitetojn (Tipo: Pilato metis antaŭ ilin la demandon, kiun ili volas, ke li liberigu; La novaĵo, kiel la generalo deziras, ke la armeo traktu la kaptitojn, vekis multan intereson).

B 3: La rilatajn epitetojn (Tipo: La homo, kiun la popolo deziris, ke Pilato liberigu, estis rabisto).

Pri B 3: Ni povus limigi nin al tiuj frazoj en kiuj la pronomo povus eventuale dependi ankaŭ sole de la unua sekvanta verbo.

Entute ni ne forgesu, ke la problemo estas pligrandparte teoria. La trimembra tipo estas certe pli literatura kaj retorika ol komunlingva. Sed ni ne kondamnu la tutan fenomenon a priori, limigante Esperanton sennecese, kaj rifuzante al ĝi lingvan fenomenon vivan kaj produktivan en ĝiaj font-lingvoj.

Germanaj gramatikistoj havas por la fenomeno la terminon „Satzverschlingung“, nederlande kelkloke tradukita per „zinsverlechting“. Ĉu en Esperanto ni povus uzi „interplektitaj frazoj“?

Summary

Up till now the syntactic phenomenon that is sometimes called „Satzverschlingung“ by German linguists, has almost escaped the attention of Esperanto-grammarians.

It is represented by the famous bible verse: „Whom say ye that I am?“ (two-clause type) and by the Shakespearian „... invite Young Ferdinand whom they suppose is drowned“ (three-clause type). In England the case of the interrogative (relative) has been the source of long and ardent disputes. In French this type of sentence gave rise to a controversy about the character of the (second) connecting word, which by French classics was generally treated as a relative (L'homme qu'il dit *qui* est venu).

Hence it is clear that the syntactic construction of these sentences seems to be of an enigmatic character. In the two-clause type the head-clause opens by a word (or group of words) that does not depend directly on the following verb, but is syntactically part of the sub-clause. Yet there is some feeling that it is all the same an essential part of the head-clause!

„Plena Gramatiko de Esperanto“ (KALOCSAY & WARINGHIEN) § 366, Rim. II gives two items of the three-clause type of these sentences and condemns them as gross errors. The authors consider them to be of French (Italian) origin.

The writer of this article first shows that this „Satzverschlingung“ has a much wider extension and is very common and productive in English, in Dutch and in German too. He is of opinion that the two-clause type cannot be ruled out at all, these sentences being quite natural and necessary (sometimes for emotional reasons or for the sake of emphasis) and that the three-clause type must also be accepted as normal. In the latter case it might be wise to limit the use to such sentences in which the relative might occur as the object of the finite verb of the head-clause by itself.

BIBLIOGRAFIO

- FOWLER, H. W., 1950: A Dictionary of modern English usage. Oxford. (p. 724 k. s.).
- & F. G., 1949: The King's English. Oxford. (p. 101 k. s.).
- DEN HERTOEG, C. H., 1903: Nederlandsche Spraakkunst. Amsterdam (vol. 2 §§ 52 kaj 68).
- JESPERSEN, O.: The philosophy of grammar. London. (p. 350).
- KALOCSAY, K. & WARINGHIEN, G., 1938: Plena gramatiko de Esperanto. Budapest.
- KERKHOF, EMMY: Der Relativsatz. Groningen.
- KRUISINGA, E., 1932: A handbook of present-day English. Groningen (vol. 2 §§ 1048—1055).
- MARTINON: Comme on parle en français. Larousse. Paris (p. 240 k. s.).
- OVERDIEP, G. S., 1949: Stilistische Grammatica. Zwolle. (p. 143 k. s.).
- VALLINS, G. H., 1951: Good English. London. (Pan Books, p. 82 k. s.).

Manual

La waringhiena verbodivido

de D-ro K. KALOCSAY

Unu el la plej gravaj kontribuoj de WARINGHIEN al la esperantologio estis la malkovro, ke la verbojn oni povas kaj devas dividi en tri grupojn. Ĉi tiun tezon, kiu metis plene klara la zamenhofan sistemon de la pasivo, neniu refutis ĝis nun, sed pluraj ĝin atakis kiel tro subtilan, ege komplikitan, kiel teruran ĵongladon gramatikan.

Ĉar tiaj malaprobaj aŭ malŝataj epitetoj ofte pli forte efikas ol argumentoj, eble ne estos superflue reokupiĝi pri tiu demando. Tiom pli, ĉar WARINGHIEN mem ne tro klopodis pruvi sian tezon: li opiniis, pli malpli prave, ke la afero parolas per si kaj por si mem. Ne okazis tiel, almenaŭ ne ĝenerale. Kaj tial mi nun klopodos evidenti ion plene evidentan: la waringhienan verbodividon.

La dividsistemon detale konigas Plena Gramatiko, tial mi prezentas ĝin tute mallonge. Ĝi baziĝas sur la esploro de la verboj koncerne ilian daŭrecon kaj rezultecon. Per tia esploro oni trovas jenon:

Ekzistas verboj indikantaj agon pli-malpli daŭran, post kies finiĝo restas rezulto perceptebla. Tiaj estas, ekz-e: *konstrui, verki, skribi, pentri, desegni, legi, instrui, lerni*. Estas klare, ke tiaj agoj bezonas tempon por sia plenumiĝo kaj ke ili ne ĉesas senpostsigne, eĉ se tiu postsigno ne estas materia. Post *lego* aŭ *lerno* ekz-e oni ne havas palpeblan rezulton, sed la leginto aŭ lerninto havas iom pli en la kapo kaj ankaŭ tio estas io pozitiva. Oni povas konstati, ke tiaj agoj havas sian motivon ne en la ago mem, sed en la plenumiĝo de la ago kaj en la postaga rezulto.

Ekzistas aliaj verboj, kiuj havas nur daŭron kaj kiuj ĉesas sen ia rezulto; ekz-e *koni, scii, memori, respekti, havi, ŝati, bedaŭri, kompati*. Estas sendube, ke se ekz-e la memoro, kono, scio, respekto de io ĉesas, nenio postrestas el ili. Tiaj agoj do havas sian motivon ekskluzive en si mem.

Ekzistas fine verboj, kiuj ne havas daŭron, sed sole rezulton; ekz-e: *atingi, retrovi, eklegi, forgesi, perdi*. Ĉi tiu klaso de verboj

estis pleje atakata: oni diris, ke ĉiu ago havas daŭron, eĉ se ĝi daŭras nur onon de momento. Tio tamen estas filozofio. Estas ne-kontesteble, ke oni povas ion pli aŭ malpli longtempe konstrui, legi, lerni aŭ memori, havi, kompati, sed oni ne povas ion pli aŭ malpli longtempe atingi, retrovi aŭ eklegi. Kaj tio sufiĉe montras, ke prunti daŭron al tiuj agoj gramatike ne estas io reala.

Per tio propre mi jam eĉ pruvis, ke la triklasa verbodivido estas ĝusta, ĉar ĝi estas konstato de lingvaj faktoj. Nun ni faru per tiu dividsistemo kelkajn eksperimentojn.

1. La unuaklasaj verboj estas „verboj de daŭro kaj rezulto“, indikas daŭrajn agojn rezultnaskajn, oni do povas nomi ilin *verboj kompletaj*. La du aliaj klasoj enhavas aŭ „*verbojn de daŭro sen rezulto*“, aŭ „*verbojn de rezulto sen daŭro*“, do *verbojn nekompletajn*.

El pluraj nekompletaj verboj oni povas kunmeti parojn, kiuj kvazaŭ kune konsistigas kompletan verbon. Ekz-e: *celi* kaj *trafi*, *serĉi* kaj *trovi*, *aspiri* kaj *atingi*, *sieĝi* kaj *okupi*, *peti* kaj *ricevi*, *persekuti* kaj *kapti*. En ĉi tiuj paroj la motivo de la unua ago estas la rezulto esprimata de la dua ago.

Ĉe kompletaj verboj la daŭrantan agon esprimas prezenca participo /-ata/, la rezulton preterita participo /-ita/: *konstruata-konstruita*, *legata-legita*. Ĉe la kompletigintaj paroj la daŭron indikas la prezenca participo de la unua verbo, la rezulton la preterita participo de la dua verbo: *serĉata-trovita*, *aspirata-atingita*, *sieĝata-okupita*, *persekutata-kaptita*.

Ekzistas paroj, kies dua verbo indikas negativan rezulton, nuligon de la unua-verba ago: *memorata-forgesita*, *daŭrigata-ĉesigita*, *havata-perdita*. Ĉi tiuj ne estas veraj kompletigintaj paroj: la dua verbo ĉe ili estas nur homonimo de „ĉesi-i“. Multaj senrezultaj verboj ne havas tian *ĉesi*-homonimon; ilian finiĝon oni devas esprimi per „ĉesi“: *ĉesi funebri*, *respekti*, *kompati*, *miri* ktp.

Ĉe la ĝis nun montritaj verboj temas pri la rezult-naska aŭ senrezulta finiĝo de agoj daŭraj. Sed ankaŭ inverse povas okazi: ekzistas paroj, ĉe kiuj la unua verbo estas sendaŭra rezultverbo, kaj la dua estas daŭrverbo kun aŭ sen rezulto. Ekz-e: *preni en la manon* / sendaŭra rezultverbo / kaj *teni en la mano* / senrezulta daŭrverbo /. Tie ĉi oni povas listigi ĉiujn daŭrverbojn kun iliaj

ek-verboj: kio estas *eklernita*, tio estas *lernata*. Tiel same: *ekkonstruita-konstruata*, *eklegita-legata*.

Oni povas kunkroĉi ankaŭ plurajn parojn en pli-malpli longajn verbo-ĉenojn; ekz-e:

eklerni-lerni-ellerni-scii-forges-i-ne scii
aspiri-akiri-havi-perdi- ne havi-reakiri-havi

En ĉi tiuj verboĉenoj alternas daŭrverboj esprimantaj kvazaŭ agon statikan /dumagan staton/ kaj sendaŭraj rezultverboj esprimantaj agon dinamikan /statoŝanĝon/. Ĉe la unuaj gravas nur la ago mem, ties daŭro, ĉe la duaj la rezulto de la ago, ties preteco. Tial la unuaj postulas prezencan, la duaj preteritan partupon: Kio estas *eklernita*, tio estas *lernata*, poste /*el/lernita*, sekve *sciata*, kaj, se ĝi estas *forgesita*, ĝi estas *ne sciata*.

Ni provu la tempojn de la participoj inverse: Kio estas *eklernata*, tio estas *lernita*, poste *ellernata*, sekve *sciita*, kaj, se ĝi estas *forgesata*, ĝi estas *ne sciita*. Mi kredas, ke oni ne bezonas havi multe da lingva sento por trovi malĝusta, eĉ komike erara la duan varianton. Kaj kial ĝi estas tia? Tion klarigas la waringhiena verbo-divido.

2. Nun ni eksperimentu per la „aspektoj“ per tri aspektmontriloj: *ek-*/agokomenco/, *-ad* /agodaŭro aŭ ripeto/, *el-* /rezultnaska agofino/. Sed *el-* ne estas ĝenerale uzebla pro konfuzeco kun la propra senco /deinterne alekstere/, tial oni renkontas anstataŭe *fin-*, nezamenhofan kaj malplaĉan, ĉar ne ĝustsencan /devus ja esti *ĝisfin-*/; mi signos nun la finan aspekton eksperimente /iom ankaŭ propone/ per *per-* laŭ la latina.

Ni prenmu do po unu verbon el la tri verboklasoj kaj esploru ilian sencan kun la tri aspektmontriloj kaj sen ĉi tiuj. Ni metu la verbojn en preteriton:

Kompleta verbo:
ekskribis, skribis, skribadis, perskribis /finskribis/

„Ekskribis“ = komencis skribi. „Skribis“ estas „resuma formo“, ĝi povas signifi kaj „skribadis“ /sed ne finis/, kaj „perskribis“ /skribis kaj finis/. „Skribadis“ signas ankoraŭdaŭron, nefinitecon en la paseo, do pasive ĝi egalas al „estis skribata“. „Perskri-

bis“ signas rezultnaskan agofinon, do pasive ĝi estas egala al „estas skribita“. En la pasivo do *-ad* kaj *per-* /*fin-*/ elfalas kiel superfluaĵoj. Kiel oni vidas, ĉe kompleta verbo la tuta supra serio estas uzebla kaj necesa.

Senrezulta verbo:

ekkonis, konis, konadis, perkonis /finkonis/

„Ekkonis“ = komencis koni. „Konadi“ estas perfekte samsignifa kun „koni“, do estas superflua, neniam uzata. Tiel same neuzata estas „perkoni“ /finkoni/, ĉar „konis“ post sia fino ne restigas rezulton, do tiun finon oni esprimas per „ne plu konis“ aŭ „ĉesis koni“.

Sendaŭra verbo:

ekatingis, atingis, atingadis, peratingis /finatingis/

„Ekatingis“ kaj „peratingis“ havas tute la saman sencon kiel „atingis“, do ili estas neuzataj kaj nenecesaj. „Atingadis“ eble povas esti uzata por la esprimo de ripetado de atingoj.

La tri verboj /kaj la tri klasoj/ do ne sammaniere alprenas la aspekt-montrilojn.

3. La tria kaj lasta eksperimento estu la esploro de la tezo de TEO JUNG, laŭ kiu

iĝi ita = esti ata

Ni prenu unu rezultnaskan kaj unu senrezultan verbon: skribi kaj koni.

„Iĝas skribita“, efektive, estas egala al „estas skribata“, ĉar „iĝas“, kiel prezenco, indikas agon nefinitan, ankoraŭdaŭran, do signas, ke io nun „fariĝadas skribita“, ke tiu ago, kies rezulto estos la skribiteco, ĝuste nun daŭras.

Sed jen „iĝas konita“ — kion ĝi signifas? Konita = ne-plu-konata. Sekve „iĝas konita“ = „fariĝadas nekonata“ = ĉesas esti konata. Tio ree montras, ke inter rezultnaskaj kaj senrezultaj verboj estas konsiderinda diferenco, do distingi inter ili ne estas „gramatika ĵonglado“.

Ni rigardu ankoraŭ la preteriton:

„Iĝis skribita“ povas egali al „estis skribata“, sed ĝi povas egali ankaŭ al „estas skribita“, ĉar se la „skribitiĝo“ jam finiĝis, la

skribo estas preta. Kaj ĝi povas egali ankaŭ al „estis skribita“; efektive, inter „la letero tiuhore jam iĝis skribita“ kaj „jam estis skribita“ ekzistas nenia sencdiferenco.

„Iĝis konita“, male, neniel povas egali al „estis konata“, sole al „ĉesis esti konata“.

La tri eksperimentoj do pravigas la waringhienan verbodividon, ĉar montras tiajn lingvajn faktojn, kiuj estas klarigeblaj nur per tiu verbodivido. Sekvus montri, kiel tiu ĉi verbo-divido prilumas la zamenhofan sistemon de pasivo. Sed tion mi konfidis al la trovemo de la leganto: li certe sukcesos mem meti klara al si la aferon.

Zusammenfassung

Der Artikel befasst sich mit WARINGHIEN's dreiklassiger Zeitwörter-einteilung: Zeitwörter von Dauer und Ergebniss, Zeitwörter von Dauer ohne Ergebniss und Zeitwörter von Ergebniss ohne Dauer. Es wird die Richtigkeit und Realität dieser Einteilung schon bei der Darlegung der Klassen geprüft, und nachdem durch drei „Experimente“ demonstriert: 1. Die Zeitwörter der verschiedenen Klassen fordern verschiedene Partizipzeiten um die aktuelle Lage auszudrücken: die Zeitwörter ohne Ergebniss stehen in Partizip der Gegenwart /erstes Mittelwort, participium imperfectum/; die Zeitwörter ohne Dauer, falls es nicht um eine wiederholte Aktion sich handelt, in Partizip der Vergangenheit /zweites Mittelwort, participium perfectum/; die Zeitwörter von Dauer und Ergebniss können in beiden Partizipzeiten stehen dem gemäss, ob sie eine dauernde Aktion, oder ein fertiges Ergebniss ausdrücken sollen. 2. Die Zeitwörter der verschiedenen Klassen verhalten sich verschiedenartig in Bezug auf die Bildungssilben der einzelnen Verbaspekte /Inkohativum, Durativum, Terminativum/. 3. Die These von THEO JUNG /*iĝi ita = esti ata*/ gilt nicht bei den Zeitwörtern ohne Ergebniss, diese Klasse weicht also gründlich von beiden anderen ab. — Die passive Konjugation kommt in Esperanto auf die Klassenangehörigkeit der einzelnen Zeitwörter an, und wird mittels WARINGHIEN's dreiklassiger Einteilung am klarsten beleuchtet.

Konsonantokombinoj ĉe radikkomenco

de N. KAWASAKI*)

Mi jam plurfoje verkis pri konsonantokombinoj en Esperanto: specoj de kombinoj kaj ekzemploj de la oficialaj radikoj. Tie ĉi mi aplikos al Esperanto metodon montritan en A. A. HILL (1958). Materialo uzata estas la radikoj en Grand Dictionnaire Espéranto-Français de WARINGHIEN. Rim.: interjekcioj ne estas traktataj.

Kvarkonsonantaj kombinoj ne ekzistas. Ni komencu de trikonsonantaj kombinoj.

spl-		skl-		
spr-	str-	skr-	ŝpr-	ŝtr-
		skv-		
			dnj-	

Legante la supran tabelon, ni trovas, ke granda simileco regas tie. Nur s, ŝ en la pozicio 1, nur p, t, k en la pozicio 2, nur l, r, v en la pozicio 3. Escepton faras dnj-, kies ekzemploj estas rusaj riveroj: Dnjepro, Dnjestro.

Tiuj poziciaj grupoj, aperantaj en trikonsonantaj kombinoj, povas esti uzataj por priskribi dukonsonantajn kombinojn. Ĉe tio ni starigas du klasojn: derivita kaj nederivita. Al derivita klaso apartenas tiuj konsonantokombinoj, kiuj jam troviĝas en la trikonsonantaj kombinoj, sed kun unu pozicio vakanta, ekz. sp-, kiu estas 1—2 kombino kun pozicio 3 vakanta. Ekzemplo de nederivita klaso estas fl-, kiu havas konsonanton neentenatan en la trikonsonantaj kombinoj.

Derivitaj 1—2 kombinoj, kiuj estas skeme eblaj, estas

sp-	st-	sk-	ŝp-	ŝt-
-----	-----	-----	-----	-----

kaj ĉiuj fakte okazas. Krome, kvankam *ŝkr- ne ekzistas (neek-

*) Profesoro pri lingvistiko kaj lektoro pri Esperanto ĉe Osaka Fremd-lingva Kolegio, Osaka, Japanujo.

zisto indikita per steleto) ni trovas ŝk- ĉe neoficiala radiko ŝkoto. Dn- ne okazas.

Skeme eblaj derivitaj 2—3 kombinoj estas

pl-		kl-
pr-	tr-	kr-
		kv-

kaj ĉiuj fakte okazas. Pri la angla lingvo, HILL diras, ke manko de *stl- akordas kun manko de *tl-. Sed en Esperanto, kvankam ne ekzistas *stl-, ni trovas tl-: tlaspo (planto), grekdevena, neoficiala.

Kun derivitaj 1—3 kombinoj la situacio estas iom alia. El kvar skeme eblaj kombinoj sr- ne okazas, do fakte okazantaj estas

sl-	
	sv-
ŝr-	

Tio faras escepton al la ĝenerala regulo, ke ĉiuj kombinoj entenataj en la trikonsonantaj kombinoj nepre okazas. Krome, kvankam ne ekzistas *ŝkv- kaj *ŝpl-, *ŝkl-, ni havas ŝv- kaj ŝl-.

Nun ni transiru al nederivitaj kombinoj. Unue naskiĝas problemoj pri la pozicioj de m, n, j.

Fakte okazas

sm-	ŝm-
sn-	ŝn-

Snobo, snufi estas neoficialaj radikoj.

Ankaŭ jenaj fakte okazas

	tm-	km-
pn-		kn-

Pn-, tm- nur ĉe grekdevenaj radikoj (pneŭmatiko estas oficiala, tmezo neoficiala). Km- nur ĉe la propra nomo Kmero. WARINGHIEN donas 13 radikojn kun kn-. Kn- estas diversorigina, sed havante germandevenajn radikojn ekz. knabo, ĝi estas bone establita en nia lingvo.

Fakte ekzistas kombinoj

mj-	nj-	fj-	vj-
-----	-----	-----	-----

Oficialaj radikoj estas nur du: fjordo kaj njo. Mjelo; Njemen, njutono; vjelo, Vjetnamo, vjolo estas neoficialaj.

En la angla lingvo my-, ny- estas tre multekzemplaj, spyu-, styu-, . . . troviĝas, kn-, pn- estas jam malaperintaj en la nuntempa lingvo, tial HILL atribuas m, n al la pozicio 2 kaj y al la pozicio 3. Sekve, laŭ li, sm- 1—2, myu- 2—3, fyu 1—3 (f, v, estas atribuitaj al la pozicio 1). Ni havas dnj-, tial ni atribuu j al pozicio 3. Do mj-, nj- estas 2—3, fj- 1—3. Ĉar ni atribuis p, t, k al la pozicio 2, do pn-, tm-, kn- fariĝas 2—2. Restas pri vj, kiun mi poste studos.

Jenaj kombinoj okazas

bl-		gl-
br-	dr-	gr-
	dv-	gv-

Dv- estas unuekzempla: Dvino. Estas tute nature, ke ni donu la pozicion 2 al b, d, g, analoge al k, t, p. Do la supraj kombinoj estas 2—3.

Ni donu al f la pozicion 1, ĉar frikativo ne venas en la pozicio 2.

fl-
fr-
fj-

Ili estas 1—3.

Kiel trakti v en jenaj kombinoj?

vl-
vr-
vj-

Laŭ WARINGHIEN, Vladivostoko; vrako, vringi (ambaŭ german-devenaj), kompreneble ĉiuj neoficialaj. En la angla lingvo ne ekzistas skv-, kv-, dv-, do estas facile, ke oni atribuu v al la pozicio 1, laŭ bazo de fl- kaj laŭ analogeco de pl-: bl-. Ĉu en Esperanto, la supraj kombinoj estas 3—3 aŭ 1—3? Ŝajne, v estas duvizaĝa.

Aliajn kombinojn ni klasigas jene.

ft-	1—2	
sc-	1—2	
gn-	2—2	
mn-	2—2	neoficiala mnemoniko, grekdevena
sf-	1—1	
pt-	2—2	neoficialaj, grekdevenaj, ekz. pterido
bd-	2—2	neoficiala bdelio, grekdevena
ks-	2—1	
kŝ-	2—1	kŝatrio, neoficiala, hindodevena
ps-	2—1	
pf-	2—1	
ts-	2—1	tsetseo, neoficiala

Résumé

A. A. HILL a montré une théorie d'éclaircissement concernant les combinaisons consonantiques au commencement des mots anglais. Cet article est une application de sa méthode à l'Espéranto. Le résultat est presque satisfaisant, mais il reste quelques points difficiles, par exemple: v.

BIBLIOGRAFIO

- KAWASAKI, N., 1940: Konsonantokombinoj ĉe radikkomenco. — La Revuo Orienta, Tokio (japanlingve).
 — 1952: Dukonsonantaj kombinoj en Esperanto. — Journal of Osaka University of Foreign Studies 1, Osaka (depresaĵo ekzistas).
 — 1953: Trikonsonantaj kombinoj en Esperanto. — Journal of Osaka University of Foreign Studies 2, Osaka (depresaĵo ekzistas).
 WARINGHIEN, G., 1957: Grand Dictionnaire Espéranto-Français, Paris.
 HILL, A. A., 1958: Introduction to Linguistic Structure: from sound to sentence in English, New York.

Demokrateco ĉe vortelekto kaj vortderivado en lingvo internacia

de D-ro PAUL NEERGAARD

Kristaliĝas hodiaŭ ĉirkaŭ du solvoj la *teoriaj* diskutoj pri estonta formo de lingvo internacia: la naturisma tipo, reprezentata per Occidental (Interlingue) kaj Interlingua je unu flanko, kaj Esperanto kiel sola fakta reprezentanto nuntempa de la skema tipo je la alia flanko. Ia reala ebleco por atingi kompromison inter tiuj ĉi du sistemoj ne ekzistas, kaj ia ebleco per plua klopodado trovi esence preferindajn variantojn de la du tipoj ankaŭ estas tute neverŝajna.

Diskuto pri tiu aŭ alia detalo en la du sistemoj povas fariĝi — el vidpunkto de teoria interlingvistiko — nur supraĵa polurado. Gravaj estas la bazaj principoj, sur kiuj konstruiĝis la du sistemoj, gravaj la premisoj, la fundamentaj antaŭsupozoj malantaŭ la du solvoj. Ĉio, kio povas prilumi la implicaĵojn de iliaj konstruprincipoj rilate al lernado kaj praktika uzado de lingvo internacia, kontribuas al realisma prijuĝo de ekzistantaj ebloj. Ni resume reliefigu la kontrastajn vidpunktojn.

Interlingua estas ekstreme naturisma, pli aposteriora ol Occidental. Interlingua ne estas „konstruita“, diras GODE (1959), sed „ellaborita“ surbaze de la romidaj lingvoj, nenio en ĝi do estas arbitre konstruita, sed ĉio, laŭ fiksitaj principoj, kvazaŭ ekstrak-tita per interpolado (aŭ se necese per ekstrapolado: praformoj) de la vortformoj fakte ekzistantaj en la romidaj lingvoj (sed kun atento al anglaj kaj germanaj formoj). El tio rezultis lingvo laŭ formo kaj enhavo komuna al la regiono de la romidaj lingvoj kaj senplue akceptebla kvazaŭ dialekto de la anoj de tiuj ĉi lingvoj. Ĝi estas praktikata antaŭ ĉio kiel lingvo por scienco, precipe por resumoj de sciencaj traktaĵoj. Per tia aplikado oni supozas iom

post ioman enpenetradon — unue per pasiva uzado en tiujn rondojn, poste el tiuj ĉi rondoj ĝi enpenetros en pli vastajn popoltavolojn.

Esperanto, aliflanke, estas lingvo modere naturisma, aposteriora, kun skema strukturo, kun strikte reguligita gramatiko, reduktita ĝis minimumo, kaj kun vortfarado bazita sur simpla kunmetado, la elementoj konservantaj ĉe tio sian originan sencon. Tiu ĉi plene aŭtonoma sistemo permesas rapidan lernadon de necesa, tre limigita minimumo da vortradikoj kaj gramatikaj reguloj necesa por simpla praktikado de la lingvo permesante relative facilan disvastigadon de ĝi kiel aktive uzata lingvo en vastaj popoltavoloj. Per disvolvado de amasmovado kun gazetaro, kongresoj, turismaj aranĝoj kaj kun literaturo el ĉiuj kampoj de la kultura vivo stabiligis aktiva lingvosocio, per kies kolektiva uzado disvolvigis el la iama skiza projekto fakta lingvo kun propra tradicio, kun propra „spirito“, kun valoroj ne rekte pruntitaj el lingvoj etnikaj, sed fekundigitaj de ili.

Kiaj do estas la sekvoj de la alprenitaj konstruprincipoj? Por prilumi iujn el ili mi prenis kelkajn tipajn ekzemplojn de vortderivado en la menciitaj tri sintezitaj lingvoj. La ĉi-sube sinoptikitaj komparoj baziĝas sur la derivado en Interlingua kaj Occidental por esprimi la Esperantajn *-isto* kaj *-a*, do unu sufikson kaj unu gramatikan finaĵon de Esperanto.

<i>Interlinguë:</i>	<i>-isto</i> <i>Occidental:</i>	<i>Esperanto:</i>
commerci- <i>ante</i>	comerci- <i>ant</i>	komerc- <i>isto</i>
mission- <i>ario</i>	mission- <i>ario</i>	misi- <i>isto</i>
avi- <i>ator</i>	aviat- <i>or</i>	aviad- <i>isto</i>
barb- <i>ero</i>	barb- <i>ero</i>	raz- <i>isto</i>
art- <i>ista</i>	art- <i>ist</i>	art- <i>isto</i>
exped- <i>iente</i>	exped- <i>itor</i>	eksped- <i>isto</i>
serv- <i>itor</i>	serv- <i>itor</i> , serv- <i>ero</i>	serv- <i>isto</i>
medic- <i>o</i>	medic- <i>o</i>	kurac- <i>isto</i>
invent- <i>or</i>	invent- <i>or</i>	invent- <i>isto</i>
chimi- <i>sta</i>	chim- <i>ico</i>	kemi- <i>isto</i>

<i>Interlingv^u:</i>	<i>-a</i> <i>Occidental:</i>	<i>Esperanto:</i>
soci- <i>al</i>	soci- <i>al</i>	soci- <i>a</i>
crani- <i>an</i>	crani- <i>al</i>	krani- <i>a</i>
lun- <i>ar</i>	lun- <i>al</i> , lun- <i>ari</i>	lun- <i>a</i>
caten- <i>ari</i>	caten- <i>ari</i>	katén- <i>a</i>
interim	interim- <i>ari</i>	provizor- <i>a</i> , dum- <i>a</i> , intertemp- <i>a</i> (eventuale interim- <i>a</i>)
aqu- <i>atic</i>	aqua- <i>tic</i>	akv- <i>a</i>
aqu- <i>atile</i>	aqua- <i>tile</i>	akv- <i>a</i>
compar- <i>ative</i>	compar- <i>ativ</i>	kompar- <i>a</i>
prepar- <i>atori</i>	prepar- <i>atori</i>	prepar- <i>a</i>
energi- <i>c</i>	energi- <i>c</i>	energi- <i>a</i>
unison- <i>e</i>	unison- <i>i</i>	unuson- <i>a</i>
corn- <i>ee</i>	corn- <i>in</i>	korn- <i>a</i>
coincid- <i>ental</i>	coincid- <i>ent</i>	koincid- <i>a</i>
urg- <i>ente</i>	urg- <i>ent</i>	urĝ- <i>a</i>
consequ- <i>ential</i>	consequ- <i>ent</i>	konsekvenc- <i>a</i>
camp- <i>estre</i>	camp- <i>i</i>	kamp- <i>a</i>
franc- <i>esc</i>	franc- <i>esi</i>	franc- <i>a</i>
franc- <i>ese</i>	franc- <i>esi</i>	franc- <i>a</i>
paris- <i>ian</i> (en ambaŭ signifoj de - <i>a</i> kaj - <i>ana</i>)	paris- <i>an</i> (en ambaŭ signifoj de - <i>a</i> kaj - <i>ana</i>)	pariz- <i>a</i>
hero- <i>ic</i>	hero- <i>ic</i>	hero- <i>a</i>
problemat- <i>ic</i>	problema- <i>tic</i>	dub- <i>a</i> (problem- <i>a</i> retenas sian ĝu- stan derivitan sencon)
pall- <i>ide</i>	pall- <i>id</i>	pal- <i>a</i>
conven- <i>iente</i>	conven- <i>ent</i>	konven- <i>a</i>
pac- <i>ific</i>	pac- <i>ific</i>	pac- <i>a</i>
mar- <i>in</i>	mar- <i>in</i>	mar- <i>a</i>
hered- <i>itari</i>	hered- <i>ic</i> , hered- <i>itori</i>	hered- <i>a</i>
intu- <i>itive</i>	intuit- <i>iv</i>	intuici- <i>a</i>

<i>Interlingue:</i>	<i>Occidental:</i>	<i>Esperanto:</i>
decis-ive	deci-siv	decid-a
introduc-ori	introduc-ori, in- troduc-iv	enkonduk-a
sex-ual	sexu-al	seks-a

Al tiuj ĉi ekzemploj oni povus aldoni aliajn vortojn, i. a. iujn, ĉe kiuj neniuj finaĵo aŭ sufikso estas aldonata en la naturismaj lingvoj kaj plue oni povus menciigi vortojn, en kiuj aliaj sufiksoj (ekz. en Interlingue *-ose*, proksimume Esperanta *-oza* en la sencoj de *-plena*, *-malsana*) simile al *-ana* (vidu supre *paris-ian*) perdas sian laŭregulan sencon kaj funkcias kiel simpla adjektiva finaĵo.

Koncerne al la donitaj ekzemploj mi devas atentigi, ke en la Interlingua-vortaro redaktita de GODE (1951) estas aparte enlistigitaj entute 124 aktivaj afiksoj. Sed krom ili oni trovas multajn aliajn aplikatajn en la vortaro, tiel ke ekz. el la ĉi-antaŭe pritraktitaj sufiksoj por la signifo de *-a* deko da ili ne estas inkludita en la menciita listo de aktivaj afiksoj en Interlingua.

Tiu ĉi *komplika multeco de sinonimaj afiksoj* estas karakteriza por la romidaj fontolingvoj de la naturismaj planlingvoj.

Ne plisimpligas la derivadon en tiuj ĉi lingvoj *abundo da homonimaj afiksoj*. Ekz. en Occidental *-or*, *-ore*, *-uore* kaj *-ori* havas kvar tute diferencajn signifojn aŭ funkciojn, same tiel diferencas *-iera*, *-iere* kaj *-iero*. Simile ni trovas en Interlingua kiel ekzemplojn: *-ar* kaj *-ar*, *-ata*, *-ato*, *-ator*, *-atoria* kaj *atorio*, *-itor*, *-itori*, *-itoria* kaj *-itorio*, *-ica* kaj *-ico*, *-iente*, *-iente* kaj *-ientia*, *-iera* kaj *iero*, *-or*, *-ori* kaj *-orio* ktp. Plue troviĝas variantoj de laŭsignife unu afikso, ekz. (por *kun-*): *co-*, *col-*, *com-*, *con-* kaj *cor*.

Dua karakteriza trajto de la romidaj lingvoj kaj per tio de la naturismaj planlingvoj estas *la nestabileco de vortsenco ĉe derivado*. Vortelementoj perdas en multegaj kazoj sian originan sencon ĉe derivado. Tipaj ekzemploj estas la vortfamilio en Interlingua de *curren* (Esperante *kuri*), kies derivaĵoj perdas sian semantikan ligon kun la origina radikoj kaj ricevas dekojn da deviaj sencoj: *cursiva* (*kursiva*), *curren* (*kuriero*), *curso* (krom *kurado* ankaŭ *kurso*), *curren* (*kurento*), *concurren* (krom *kunkuri* ankaŭ *kon-*

senti kaj *konkurenci*), *concurso* (*kunveno* kaj *konkurso*), *occurrer* (*okazi*), *succurrer* (*helpi*), ktp. ktp.

ALBAULT (1959) faris tre klaran studon kun ilustraj ekzemploj pri la fundamenta diferenco inter la derivado en la naturismaj lingvoj (kaj en Volapük!) kontraste al la derivado (vortkunmetado) en Esperanto, kaj mi tial ne plue pritraktas tiun ĉi rilaton tiel gravan por la praktika lingvoakirado kaj -praktikado. Jam WARINGHIEN (1948) en sia profunda kaj pensiga pritrakto de la interlingvistika doktora tezo de MANDERS (1947) akcentas per ekzemploj el Occidental la esencan distingon inter la derivsistemoj de la du planlingvaj tipoj.

Tria esenca karaktertrajto de la naturisma lingvo estas *la ne-libereco en derivado, la neaŭtonomeco*. Estas vere, ke ne temas pri absoluta neaŭtonomeco. Sed ekzistas ĉiam esenca premiso de bona vortfarado en la naturisma lingvo, kaj certe antaŭ ĉio en Interlingua: la derivaĵoj devas aperi kiel formoj „naturaj“, kiel eble plej multe imitantaj la fontolingvojn. GODE (1951) parolas pri libera vortderivado de vortfamilioj, kiuj konsistas el nur unu membro, kaj donas kiel ekzemplon *jada* kun diversaj por Interlingua specifikaj, permeseblaj, sed ne rekomenditaj derivaĵoj, neekzistantaj en etnikaj lingvoj. Bone, oni do akceptas teoriajn eblojn. Sed kiel ĉe necesa derivado elekti inter multaj sinonimaj afiksoj? La respondo estas, ke principe oni devas elekti tiujn, kies uzado estas sankciitaj de nacilingva uzado — komparu la ekzemplojn pri la derivaĵoj de *-isto* kaj *-a* en Interlingua kaj Occidental. Libera elekto el kaj uzado de ekz. la ĉ. 30 diversaj sufiksoj por adjektivigo estas nete nepermesebla en tiuj lingvoj. Se en Occidental *lavi* estas *lavar*, kiel diri *lav(ad)o*? Ĉu *lava*, *lavation*, *lavatura* aŭ *lavament*? *Lavatura* estas la korekta formo, sed oni devas ĝin lerni. En Interlingua akceptitaj formoj kun tiu senco estas *lavatura*, *lavage* kaj *lavamento*.

Fine, kvara tre esenca punkto, per kiu distingiĝas la naturisma lingvotipo, estas *la plej ekstrema ekspluatado de la romida vortotrezoro*. Eble tiu ĉi karakterizaĵo estas, apud tiu de la nestabileco de vortsenco ĉe derivado, la plej grava obstaklo por ĝia ĝenerala lernado kaj aplikado ekster la rondoj de akademiuloj (pli malpli ankaŭ ekster tiuj de la akademiuloj de la romidaj lingvoj).

En Esperanto ni havas je unu flanko la simplan lingvaĵon, en kiu okazas simpla kunmetado de la vortradikoj propraj al Esperanto, inkluzive de afiksoj kaj gramatikaj finaĵoj. Je la alia flanko estas je dispono la trezoro de la t. n. „fremdvortoj“, t. e. la internaciaj vortoj, kiuj eniras en Esperanton bloke kiel nacilingvaj derivaĵoj, fakte kiel iaj fremdaĵoj¹ rilate al la „deriv“-sistemo de Esperanto, vortoj kiel *iniciatoro*, *kromofotografio*, *dormitorio*, *orientalismo*, *hidrofobio*, *antropometrio*, *denominatoro*, *hemoragio*, *fanerogamo*, *kongregacio*, *ekskoriacio*, *infloresko*, *infinitezimo*, *fagocitozo* kaj *prestidigitatoro*.

Estas la tasko de la verkistoj kaj esperantologoj enkonduki kaj transskribi internaciajn vortojn kiel eble plej laŭregulece konforme al certaj principoj (WÜSTER 1923, NEERGAARD 1933). Por atingi maksimuman laŭregulecon kaj internaciecon ĉe tiu adapta procedo tre utila helpo estas la reguligo farita en Occidental kaj Interlingua, precipe estas valora teknika helpilo la Interlingua-vortaro redaktita de GODE (1951).

En Esperanto oni en konsiderinda grado sendependiĝis de la naciaj lingvoj rilate al la sencenhavo de kunmetitaj vortoj. Ili ricevas tiun signifon, kiun komunikas al ili la unuopaj elementoj de la kombinaĵo.

La enkonduko en Esperanton de konvencie derivitaj vortoj kiel la internaciaj vortoj, tiel bone reguligitaj — laŭ la ekstera formo — en Occidental kaj Interlingua, okazas tiuamplekse, kiom oni trovas tion oportuna en la Esperanta lingvosocio. Kiomgrade tia enkonduko devas okazi, tion povas determini nur la praktiko, kaj la bezono tiurilate varias laŭ interesulgrupoj. Plej granda estas la bezono ĉe sciencistoj, teknikistoj, intelektuloj, malpli granda ĝi estas ekz. inter laboristoj aŭ homoj, kiuj uzas Esperanton ĉefe

¹ Ricevinte mian libron *Fremdvortoj en Esperanto* (NEERGAARD 1933) OTTO JESPERSEN, la dana lingvisto kaj interlingvisto, skribis al mi i. a.: „Ĉiam frapis min (kaj multajn aliajn) kiel io kurioza, ke la plej internaciaj vortoj devas esti rigardataj kiel fremdvortoj en Esperanto“. Ne volante rekte defendi la uzon de la termino „fremdvorto“ por internacia vorto en lingvo internacia, ĝuste la distingo inter la sistemo aŭtonoma, propra al Esperanto, kaj sistemo plejparte bazita sur la grek-latinida-romida vortotrezoro kaj -derivado certgrade pravigas la uzon de la esprimo „fremdvorto“ en Esperanto. Sed por la naturisma lingvo ne ekzistas tia distingo kaj pravigo.

por libertempaj vojaĝoj kaj por korespondado pri ĉiutagaj aferoj. Ĉu ne en ĉiu kulturlingvo estas diferenco inter tiu lingvaĵo, kiun uzas doktoro de medicino kaj tiu, kiun uzas havenlaboristo aŭ ŝoforo ĉe urba bierfarejo? Sed ĝuste tiaj diferencoj de lingvouzado, precipe de vortuzado, ekzistas en la lingvosocio de Esperanto. En kulturlingvo ekzistorajton devas havi ambaŭ idiomoj, la simpla, relative primitiva lingvaĵo kaj la pli nuancita kaj ellaborita lingvaĵo.

En la naturisma lingvo oni parolas (legu: skribas) ĉiam pli malpli ian doktoran latinon (kaj Interlingua ja eĉ rekte sin turnas al la sciencistoj). La unuflanka enkonduko de la alkiutimigitaj, pli komplikaj nacilingvaj vortformoj kaj la apliko de peza, katenita derivsistemo okazas je kosto de la reguleco, klareco kaj simpleco atingitaj en la skema Esperanto.

Sed tio ĉi ne estas la sola problemo, kiu leviĝas. La fakto mem, ke oni uzas en la naturisma lingvo por la ĉiutaga lingvo „doktoran latinon“, multe limigas la ekspluatadon de la internacia vortotrezoro de la „fremdvortoj“ por plinuancado de la lingvo en maniero, en kiu tia nuancado okazas en naciaj lingvoj, ekz. en ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. Ĉe apliko apud hejmaj esprimoj internaciaj vortoj tre ofte ricevas *specialan* signifon, kaj ĝuste al tiu procedo ŝuldiĝas la disvolviĝo de tiel multaj signifoj diferencaj de unu lingvo al alia, kiel ekzistas en la internaciaj vortoj. Ili ja estas pli internaciaj laŭ formo ol laŭ sencenhavo.

Ne temas do nur pri komplikaj formoj transprenitaj el la naciaj lingvoj, sed ankaŭ pri perdo de multaj ebloj por plua nuancado, ĉar oni eluzas la internaciajn vortformojn por ĝeneralaj nocioj de vasta sencenhavo.

Ekzemple, se oni en Interlingua por la ĝenerala nocio *instruisto* jam uzas la vorton *instructor*, ne plu ekzistas eblo diferencigi kiel en angla lingvo per la vorto *instructor* por asista universitata instruisto aŭ kiel en dana lingvo per la vorto *instruktør* por (speciala) instruiciisto, kaj uzi, kiel oni povus en Esperanto, la formon *instruktoro*. Se ne, kiel en Esperanto, ekzistas apartaj, klaraj, nemiskompreneblaj nocioj kiel *kolektanto* aŭ *kolektisto* kaj eventuale *kolektilo*, kiel scii, kiel demandas WARINGHIEN (1948), kio estas en Occidental *collector*, „ĉu tiu vorto havas la anglan signi-

fon de kolektisto, la francan de kloakego aŭ la germanan de vendisto de loteribiletoj“, la internacia vortformo estas je dispono, se oni kuraĝus ĝin alpreni por iu nuanco en Esperanto. Same apud *kolekto-kolektaĵo* estus je dispono por eventuale aparta nuanco (ekz. por dana *loteri-kolektion*) la formo *kolekcio*. Ĉar *kunlaboranto* en Esperanto havas sian simplan ordinaran signifon, oni povas aldoni, kiel oni tion faris en landoj okupitaj de malamikaj trupoj dum la lasta mondmilito, novan vorton, *kolaboratoro* por speciala nuanco de *kunlaboranto* (en angla lingvo *collaborator* ricevis dum la milito kromsignifon tian, ke oni nun iomete hezitas uzi la vorton en ĝia origina ĝenerala senco). Se pro formfidelo al la fontolingvoj la vorto *compositor* en Interlingua nepre devas ricevi ambaŭ signifojn de *komponisto* kaj *kompostisto*, eĉ se ekzistas distingo en aliaj lingvoj, simple ĉar estas praktike scii, pri kiu posteno temas, tiam tiu formfidelo estas praktikata je kosto de avantaĝoj, kiujn havas la etnikaj lingvoj. Sama tendenco al enkateno de la ebloj troviĝas en kategoria rifuzo de GODE (1959) akcepti por Interlingua sugestitan diferencigon inter *lingua* kaj *lingue* por *lingvo* kaj *lango*, ĉar studo de la elektitaj fontolingvoj indikas la formon *lingua* por ambaŭ nocioj, do enkonduko de devia formo estus fari ion arbitran, artefaritan. Kompatindaj sklavoj de la naturismaj principoj!

La defendantoj de la naturisma lingvotipo volonte rezervas al si la rajton porti la honorindan nomon de Latino sur sia standardo. Se spite al tio Esperanto aŭdacas signi la sian per la nomo de la Latino de la demokratoj aŭ de la popolo, tiun nomon la pli latinidaj Interlingua kaj Occidental certe ne povas pravigi por si. Sed volonte ni cedas al ĉiu el ili, ne sen respekto pri la sukcese farita ekstera formreguligo de la internacia vortotrezoro de la moderna civilizo, la nomon de la Latino de la aristokratoj.

Summary

A comparative study of some aspects of word selection and derivation in Interlingua, Occidental and Esperanto has been carried out in order to elucidate the more important implications of the fundamental principles applied in constructing the schematic type and the naturalistic type of auxiliary languages respectively.

Four principal characteristics of the naturalistic type can be stated as follows:

1) *Occurrence of a great number of synonymous affixes*, exemplified by a list of nine and ten suffixes in Occidental and Interlingua for the Esperanto suffix *-isto* alone and a list of about 30 suffixes in Interlingua for the adjective termination *-a* of Esperanto. Also homonymous affixes occur in the naturalistic languages.

2) *Lack of semantic stability of word roots in the process of derivation*, exemplified by the word family *curre*, in which the original meaning of the word-root is submerged in derivatives such as *cursiva*, *currente*, *occurrer*, *succurrer* etc.

3) *Lack of freedom in word derivation*, the possibilities largely being limited to conventional word structures of the ethnic (Romanic) languages.

4) *Extreme exploitation of the Romanic vocabulary*. While Interlingua and Occidental are wholly dependent on the laws of derivation in the Romanic languages, Esperanto, in adopting an autonomous system of derivation, has two totally different kinds of vocabulary: the words formed according to the rules of Esperanto exemplifying a system of very simple word formation, and the so-called international words often transcribed into Esperanto as derivatives forming the more complicated vocabulary of scientists and technicians. The vocabulary of the naturalistic type of auxiliary language is based exclusively on the latter kind of more complicated derivatives.

BIBLIOGRAFIO

- ALBAULT, ANDREO, 1959: Eseo pri la dinamiko de la Esperanta vortfardo. — *Esperantologio* 1: 41—57.
- GODE, ALEXANDER, 1951: *Interlingua-English*, a dictionary of the international language prepared by the research staff of the International Auxiliary Language Association. New York. LXIV + 415 p.
- 1959: *Manifesto de Interlingua*. — *Novas de Interlingua* 4 : 21—35.
- MANDERS, W. J. A., 1947: *Vijf kunsttalen. Vergelijkend onderzoek naar de waarde van het Volapük, Esperanto, Ido, Occidental en Novial*. Purmerend. 386 p.
- MATEJKA, A., 1945: *Wörterbuch Occidental-Deutsch und Deutsch-Occidental*. Chapelle (Vaud), Schweiz. XVIII + 133 p.
- NEERGAARD, PAUL, 1933: *Fremdvortoj en Esperanto. 15a regulo de la Fundamenta gramatiko en teorio kaj praktiko*. Parizo. 64 p.
- WARINGHIEN, G., 1948: *Esperanto antaŭ la tribunalo*. — *Literatura Mondo*, 3-a periodo, 2: 35—43 kaj 73—78.
- WÜSTER, E., 1923: *Esperantologiaj principoj*. Esperanto-germana Vortaro, p. (25)—(66).

»Latino macaronico«

de D-ro W. MANDERS*)

En „Historio de la Mondolingvo“ (Leipzig 1931, p. 27) E. DREZEN mencias inter la unuaj provoj de universala lingvo projekton kiun li nomas *Latino macaronico* kaj jene priskribas: „Vivinta en la j. 1491—1544 monaĥo TEOFILO HIERONIMO FOLENGO simpligis skolastikan latinon, kompletiginte ĝin per ĉiutage uzataj popolvortoj, vulgaraj kaj ordinaraj esprimoj. NODIER (1834) citas eĉ specimenon de tiu nova lingvo: „Vado per hunc boshum solus chiamando zaninam, ut chiamat vitulum vacea smarrita summu“. Ĝi estis kvazaŭ-provo refirmigi la poziciojn de la latina lingvo, kiel „lingvo monda“. Estis provo ĝin adaptigi al la bezonoj de la XVI jarcento. Tamen la provo neniel sukcesis kaj estis forgesita.“

La informo de DREZEN estas multrilate kritikinda:

- 1) La nomo „latino macaronico“ havas ortografion neesperantan kaj krome anstataŭ „macaronico“ pli taŭgus la adjektiva formo: Latino makaronika.
- 2) „... FOLENGO simpligis skolastikan latinon, kompletiginte ĝin per ĉiutage uzataj popolvortoj, vulgaraj kaj ordinaraj esprimoj“. Duona veraĵo. FOLENGO efektive enkondukis en la latinon multajn (eĉ tre multajn) italajn vortojn fleksianta ilin kvazaŭ ili estus latinaj, sed tiu procedo tute ne estis nova. Jam en la 12a jarcento ni trovas jenan makaronikaĵon:

Ecce non paulizat Paulus, sed saulizat;
Petrus intronizat, Lupusque caprizat;
Lupus pastorizat, Pastor giezizat, Ovis symonizat.

Makaronikaĵojn oni trovas en la literaturo de multaj lingvoj kaj en diversaj epokoj. M. DELEPIERRE publikigis en 1852 kolekton tre ampleksan el la itala, franca, germana, nederlanda, angla, hispana kaj portugala literaturoj. La fleksio ĉiam estas

*) D-ro de lingvistiko, gimnazia profesoro pri greka kaj latina lingvoj, St. Thomas College, Venlo, Nederlando.

latina, sed la vortaro estas parte aŭ ĉefe franca, germana ktp. Fama estas la germana makaronikaĵo el 1593 kun la titolo: Floia cortum versicale de Flois, swartibus illis deiriculis, quae minschos fere omnes, mannos, weibras, jungfras, etc., behüppere et spitzibus suis snafflis steckere et bitere solent, autore Griphaldo Knickknackio ex Flolandia. Ĝi havas la formon de epopeo kaj jene komenciĝas:

Angla floosque canam, qui waffunt pulvere swarto,
Ex wateroque simul fleitenti, et blaside dicko,
Multipedes deiri, qui possunt hiippere longe
Non aliter quam si floglos natura dedisset.
Illis sunt equidem, sunt inquam, corpora kleina,
Sed mille erregunt menschis martrasque plagasque
Cum steckunt snaflum in livum

- 3) La informo ke FOLENGO „simpligis skolastikan latinon“ povas sugestii ke la makaronikaĵoj de FOLENGO estis destinitaj por religiaj celoj. La malo estas vera. Makaronikaĵoj preskaŭ ĉiam estas (aŭ celas esti) burleskaj, satiraj aŭ komikaj, kaj FOLENGO ne estas escepto. Efektive li estis monaĥo (benediktano), sed jam frue li forlasis la monaĥejon (kaj poste tien revenis).
- 4) Absurdaĵo estas la pretendo ke la makaronikaĵoj de FOLENGO estas „kvazaŭ-provo refirmigi la poziciojn de la latina lingvo kiel lingvo monda“. La miksaĵo de FOLENGO estas nur ŝerco kaj neniel pretendas esti nova lingvo. La esprimo „monda“ lingvo estas komplete mistrafa. Per siaj makaronikaĵoj FOLENGO atingis publikon multe pli limigitan ol se li estus verkinta en pura itala aŭ latina lingvo, sed ĝuste tiun eliton de latine edukitaj samlandanoj li volis atingi kaj amuzi.
- 5) La vorto „vacea“ en la de DREZEN citita teksto estas verŝajne preseraro. Temas evidente pri distiko, kaj nur la formo „vacca“ metrike taŭgas.
- 6) Kiel FOLENGO — kaj multaj aliaj — faris makaronikaĵojn surbaze de la latina lingvo, tiel oni povus fari — kaj faris — makaronikaĵojn sur bazo de aliaj lingvoj. Ankaŭ Esperanto kun siaj karakterizaj finaĵoj kvazaŭ invitas al makaronikaĵoj. Be-

Ian ekzemplon mi trovis en Laborista Esperantisto, 1961, p. 13. Ĝi estis transprenita el „Bulteno de la Esperantista Klubo en Praha“ okt.—nov. 1960. La aŭtoro ne estas indikita. Jen mallonga citaĵo:

„Vespero obskuras. Adoleska, rustike vestita, dina femino descendas haste la ŝtuparon de burgo. Ŝi estas jam infre sur pado. Friga gelo faris duran vojon, kiu antaŭ tri tagoj kotozis . . . Diste en vilaĝo hojlas hundo. Kvankam la vojo kurtas, en obskuro ŝi tristozas.“

La teksto estas vera makaronikaĵo: Esperanto liveris la fleksion kaj la vortaron havigis grandparte la eŭropaj lingvoj. Ni jam konstatis ke makaronikaĵoj ofte celas esti satiraj. Nu, ankaŭ ĉi-rilate nia teksto ne estas escepto: ĝi estas protesto kontraŭ iuj lingvoscienculoj kiuj — laŭ la aŭtoro — malfaciligas Esperanton

Zusammenfassung

DREZEN hat Unrecht indem er das Latino macaronico (bessere Rechtschreibung: latino makaronika) ohne weiteres zuschreibt an FOLENGO (1491—1544). Schon lange vor FOLENGO hat es macaronisches Latein gegeben und auch jetzt existiert die Gattung noch in den Literaturen verschiedener Sprachen. Gänzlich falsch ist die Auffassung DREZENS das Latino makaronika sei eine neue Sprache, ja sogar der Versuch zu einer Weltsprache. Makaronisches Latein ist eben nur eine Scherzsprache in der die Flexion zwar lateinisch ist, die Wörter aber teilweise einer bestimmten anderen Sprache entnommen sind. So wie es makaronisches Latein gibt, so kann man auch ein makaronisches Esperanto schreiben.

BIBLIOGRAFIO

- DREZEN, E., 1931: Historio de la mondlingvo. Leipzig. 241 p.
 DELEPIERRE, M. OCTAVE: Macaronéana ou melanges de littérature macaronique. Paris 1852. 384 p.
 NODIER, C., 1834: Du language factice, appelé macaronique. Paris.

Gramatika karaktero de la sufiksoj »in« kaj »um«

de KENĴI OSSAKA

Ĝis nun oni klasigis la sufikson „in“ sub „substantivaj sufiksoj“ kaj „um“ — sub „senkarakteraj“ (vidu ekz. J. R. G. ISBRUCKER 1959), sed ŝajnas al mi, ke pli bone ni faru ŝanĝeton en la klasigado, por ke la teorio de la Vort-Strukturo (iniciatita de R. DE SAUSSURE, vidu malsupre) pli adekvate aplikigu en la praktiko:

- A) „in“ estu klasigata sub la klaso de „senkarakteraj sufiksoj“ (ankaŭ same la sufiksoj „ĉj“ kaj „nj“), kaj
B) „um“ estu apartigata sub la nova klaso „nedifinita sufikso“.

Tiam la klasigo de la oficialaj sufiksoj estos kiel ĉi-sube tabellite:

- 1) Substantivaj [o]: aĵ, il, ing, uj, ej, ar, er; ism; on; ul, ist, an, edz, estr, id;
- 2) Adjektiva [a]: ec, em, ebl, end, ind; obl, op; ant, int, ont, at, it, ot;
- 3) Verbaj [i]: ad; ig, iĝ;
- 4) Senkarakteraj []: eg, et; aĉ; in; ĉj, nj;
- 5) Nedifinita [x]: um.

Ekzemplo (1): segilo = seg[i]il[o] (la finiĝo „o“ estas pleonasmo) = (per la leĝo de renverso) il[o] seg(ag)[i] = ilo por la ago segi.

Ekzemplo (2): belaĵo = bel[a]aĵ[o] = (sen renverso, ĉar „aĵ“ estas la komplemento de la adjektivo „bel[a]“) bel[a]aĵ[o], nome bela objekto.

Rimarko (1). La bazo de la teorio de R. DE SAUSSURE estas:

a) la Zamenhofa genia solvo de interlingvo: plena dismembrigo de la ideoj (kiel klarigite en la Antaŭparolo al la Unua libro), nome, Esperanto ne estas tiel nomata fleksia lingvo, sed ĝi estas ideale aglutina lingvo (vidu ISBRUCKER aŭ „Fundamenta Krestomatio“);

b) „Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj“ (Fundamenta Gramatiko § 11).

Kaj kiel la natura kaj logika sekvo:

c) la principo, ke ĉiu vorto (radiko, afikso aŭ finiĝo) havas sian propran gramatikan karakteron.

N.B. DE SAUSSURE skribas en sia Antaŭparolo al la „Vort-Strukturo en Esperanto“: En Esperanto ekzistas nur *kunmetitaj* vortoj, kaj oni ne bezonas paroli pri vortoj *derivitaj*.

(A). Senkaraktera sufikso „in“.

Senkarakteraj sufiksoj estas vortstrukture kvazaŭ senkoloraj (2) aŭ diafanaj []: la karakteron de la kunmetita vorto (radiko) determinas ne la sufikso, sed la antaŭiranta radiko. Kiel ekzemple: river[o]et[] = [o] (substantiva); dorm[i]eg[] = [i] (verba).

Rimarko (2). En unu eldono de sia „Vort-Strukturo“ DE SAUSSURE efektive per koloroj presigis la diferencigojn de la vortkarakteroj.

Esti „senkaraktera“ ne signifas esti „sensignifa“. Senkarakteraj sufiksoj nur ne ŝanĝas la karakteron de la kunmetita vorto (radiko), kvazaŭ ili estas senkoloraj [], sed ili mem havas en si la latentan signifon de „ec“ [a] nome ili modifas sence la antaŭirantan radikon (kiel se ili estas duagradaj semantemoj (3)). Tial en analizado oni devas renversi la ordon, por riveli la latentan signifon (ĉar la sufikso kun latentia signifo duaorda staras post la radiko modifota, ni devas „inversigi“ la ordon, nome transmeti ĝin antaŭ la radikon — en la pozicion de adjektivo). Ekzemple: river[o]et[] = (per inversigo) et[a] river[o] = eta t. e. malgranda rivero.

Rimarko (3). Substantivojn kaj verbojn mi proponas nomi „unuaordaj semantemoj“, statikaj kaj dinamikaj respektive, kaj adjektivojn (kaj ankaŭ adverbojn) „duaordaj semantemoj“ (Vidu la Revuo Orienta“, n-ro 6, 1957).

Tiamaniere senkaraktera sufikso per renverso (aŭ inversigo) de la vortordo ricevas karakteron kvazaŭ pli prefiksan, ol sufiksian.

Komparu: disĵeti = dis[a] ĵet[i] = dise t. e. ĉiufanken ĵeti. Tiele oni, kvankam malofte, uzas „et“ prefikse; kiel ekzemple: „ethurĝo“.

La sufikso „in“ kondutas tute tiel same kiel „eg“ aŭ „et“, kaj sekve ĝi devas esti „senkaraktera“ sufikso.

frat = hom = ul = o

frat'in = hom[in] = ul = o

Konsekvence [in] = [], nome „in“ estas diafana, t. e. senkaraktera kaj latente signifanta „virinseksecon“ (= [ec] = [a]) (4).

fratino = frat[o]in[] = (per renverso) in[a] frat[o] =
ina frato

aŭ

frat(ul)-in = ulin frat = ina ulo el speco frat(o).

Rimarko (4). DE SAUSSURE skribas en la Vort-Strukturo, p. 7: La vortoj Ann, . . . matron entenas en si mem la pli ĝeneralan ideon de virinsekseco „in“. Li tamen en ekzemplo donita traktas ĝin en la senco de „ulino“. Li do verŝajne ne havis klaran koncepton pri la senkaraktereco de „in“.

Tial ni al la menciita difino de „senkarakteraj sufiksoj“ aldonu la sekvantan rimarkigon:

„Senkarakteraj sufiksoj, kvankam diafanaj vortostrukturo havas en si latentan signifon de „ec“[a], por kiun riveli oni devas inverse apliki la leĝon de renverso.

Ekz. (3). Ekzemploj de senkarakteraj sufiksoj:

{ river[o]eg[]	= eg[a]	river[o]	= ega rivero
{ river[o]et[]	= et[a]	river[o]	= eta rivero
{ varm[a]eg[]	= eg[a]	varm[a]	= ege varma
{ varm[a]et[]	= et[a]	varm[a]	= ete varma
{ dorm[i]eg[]	= eg[a]	dorm[i]	= ege dormi
{ dorm[i]et[]	= et[a]	dorm[i]	= ete dormi
{ ĉeval[o]aĉ[]	= aĉ[a]	ĉeval[o]	= aĉa ĉevalo
{ obstin[a]aĉ[]	= aĉ[a]	obstin[a]	= aĉe obstina
{ kri[i]aĉ[]	= aĉ[a]	kri[i]	= aĉe krii
hund[o]in[]	= in[a]	hund[o]	= ina hundo

Ekz. (4). „Matron“ havas jam en si la ideon de „ul-in“, kaj oni do ne diras „matronino“. Komparu kun „fratino“, ekzemplo ĉi supre menciita.

$$\begin{cases} \text{matron[o]} = \text{matron(ul-in)[o]} = \text{ina ulo, t. e. virino el} \\ \text{speco matron.} \\ \text{matrino} = \text{matron(ul-in)in[o]} \dots \text{do „in“ estas pleonasmo} \\ \text{forĵetenda.} \end{cases}$$

Ekz. (5).

$$\begin{cases} \text{belulo} = \text{bel[a]ul[o]} = \text{bela homo, t. e. bela viro (5).} \\ \text{belulino} = \text{bel[a]ul[o]in[]} = \text{bela ulino, nome bela virino.} \end{cases}$$

Rimarko (5). „Negativismo“ estas la karakteriza eco de Esperanto. Kiel ekzemple: per „in“ oni montras „virinon“ kaj *per neesto de „in“* ni montras „viron“.

N.B. En Ido tamen: „spozulo“ = edzo; „spozino“ = edzino.

Ekz. (6). Virgulino = virg[a]ul[o]in[] = virga ulino, virga virino.

N.B. En Ido, substantivo derivita el adjektivo montras personon, do en Ido „virgino“ = virgulino, sed en Esperanto oni ordinare ne diras „virgino“, ĉar virg[a]in[] = in(ec)a virg(ec)o estas sensenca. Zamenhofa ekzemplo:

Preĝu al la Sankta Virgulino. (Ekzercaro § 37).

Tiel „ino“ = virinsekseco, „ulino“ = virino. Sed ĉar „o“ estas tre ĝeneralsenca koncepto kaj ĝi tial povas iam signifi „(ul)o“, „(aĵ)o“, „(ec)o“ aŭ „(ad)o“ dank’ al la influo de la kunteksto. Kaj ĉar la ineco troviĝas nur ĉe (viv)ulo (aĵino, ecino aŭ adino estas sensenca), anstataŭ „ulino“ oni ifoje pro simpleco uzas „ino“, kiam tion permesas la kunteksto (laŭ la principo de elastecco.) Ekzemple:

La plej danĝera *homo* — malbona *in’* en domo. (Proverbaro 37).

Ĉi tie dank’ al la kunteksto „homo“ ino povas signifi „in(ul)o“ = ulino, homino, virino.

El ĉiuj brutoj puraj prenu al vi po sep paroj, virbestojn kaj *iliajn inojn*. (Genezo 7-2). Ĉi tie: „iliaj inoj“ = inoj de la virbestoj = inbestoj = bestinoj, ulinoj.

(B). Nedifinita sufikso „um“.

En la Ekzercaro § 42 estas klarigite: La sufikso „um“ *ne* havas *difinitan* signifon, kaj tial la vortojn kun „um“ oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Tiel la vorto kun „um“ estas kvazaŭ unu memstara vorto kaj ricevas sian propran karakteron, sendependan de ĝia originala radiko, aŭ „o“, aŭ „i“, aŭ „a“, laŭ la okazo (= [x]). Kiel ekzemple

Kol[o]um[x]	= [o-x]	= [o-o]		kol(ĉirkaŭ)aĵo
vent[o]um[x]	= [o-x]	= [o-i]		ventofari
plen[a]um[x]	= [o-x]	= [a-i]		plenfari
proksim[a]um[x]	= [a-x]	= [a-a]		proksimeca

Ni do vidas, ke „um“ ne estas „senkaraktera“, sed ĝi havas „nedifinitan“ karakteron [x].

(C). Nekarakteraj sufiksoj „ĉj“ kaj „nj“.

La karesnomaj sufiksoj „ĉj kaj „nj“ estas specialaj sufiksoj almetataj ordinare al „mallongigita“ radiko de persona propra nomo, vira [ĉj] kaj virina [(in)nj] respektive. Ili apartenas al la klaso de senkarakteraj sufiksoj kaj havas la latentan signifon „karesnomata, kara“ [a]. Kiel ekzemple

Vil[o]ĉj[] = ĉj[a] Vil(helm)[o] = kara Vilhelmo.
 Mari[o]nj[] = nj[a] Mari[o] = kara Mario.
 pa[o]nj[] = pa(tr)[o](in)nj[] = kara patrino, patrineto.

Summary

As an extension of the word-structure theory in Esperanto initiated by R. DE SAUSSURE, the suffixes have been classified, according to the part they play in word-formation, in 4 groups: 1) Nominal, 2) Adjectival, 3) Verbal and 4) Characterless; and hitherto the suffix „in“, denoting the feminine gender has been classified under 1) Nominal, and the suffix „um“, having no fixed meaning, — under 4) Characterless. The author proposes to make some change in the classification, so that DE SAUSSURE's theory may be more fully applicable in practice, viz. „in“ should be better classified under 4) Characterless, and „um“ — separately under the new class 5) Indefinite.

In ordinary cases the suffix determines the character of the compound word (root), as the word-element of chief meaning stands at the end. If we denote a noun by [o] (the termination of the noun), a verb by [i] (the termination of the infinitive), and an adjective by [a] (the termination of the adjective), we have for example

jun'[a] = young; ul'[o] = a nominal suffix denoting a person.

junulo = jun[a]ul[o] = a young person, i. e. a youth, a lad[o].

A „Characterless“ suffix however does not determine the character of the compound, but the preceding root determines it, as if the suffix were „colourless“ or „transparent“ []. To be „characterless“ does not mean to be „insignificant“; it has the meaning of [a], hidden in it:

river'[o] = a river; et [] = a characterless suffix for diminution of degree.

riveret' = river[o]et[] = a small river, i. e. a brook[o].

junulin' = jun[a]ul[o]in[] = a feminine youth, i. e. a lass [o].

Therefore „in“ would not be a „nominal“ suffix [o], but it should be „characterless“ (transparent) suffix [], as it is not „in“ but „ul“ that determines the character of the compound word (root) „junulin“.

The suffix „um“ has no definite meaning by itself, but provides the word with some meaning, either with [o], or with [i], or with [a], depending on the occasion (the context and the word root). Therefore „um“ is not characterless, but a suffix with „indefinite“ character.

BIBLIOGRAFIO

ISBRUCKER, J. R. G., 1959: Pri la vortfarado en Esperanto. — Esperantologio 2: 13—36.

SAUSSURE, RENÉ DE, 1916: La vortstrukturo en Esperanto. 20 p. Bern.

Ĉu Nepalo aŭ Nepalujo?

Kontribuaĵo al laŭfundamenta fokusigo de la landnoma demando.

de J. RÉGULO PÉREZ*)

Partout et toujours, les langues tendent à abolir l'absence d'unité et à instituer l'unité de forme pour l'unité de rôle grammatical et de signification.

A. MEILLET,

Linguistique historique et linguistique générale.

Eĉ homoj, kiuj neniam okupiĝis pri lingvoscienco, scias, ke unu el la ĉefaj manieroj, laŭ kiuj estiĝas la gramatikaj formoj, estas la analogio. La analogio konsistas en tio, ke oni formas novan vorton sur ŝablono de alia, kiel ekzemple sur la modelo *astro/astrologio/astrologo*, *etimo/etimologio/etimologo*, *etn(i)o/etnologio/etnologo*, *socio/sociologio/sociologo* k. s. aperis en Esperantujo la formoj *esperanto/esperantologio/esperantologo*, neniam antaŭe ekzistintaj en la etnaj lingvoj.¹ Tiel vive funkciis tie ĉi la analogio, ke esperanto malaglutinis, aŭtonomigis kaj enkorpigis al sia sistemo la sufiksojn *-logi/-log-* de la gentaj lingvoj, kaj la procezo baldaŭ fariĝis tiel forte fekunda, ke la Akademio antaŭ ne longe sankciis tiujn sufiksojn per la stampo de oficialeco.

Plej ordinare okazas, ke la regulaj formoj, devenigitaj per analogia funkciado de lingvosistemo, trovas ĉies akcepton, ĉar ili akordiĝas kun similaĵoj aŭditaj aŭ memorataj de la aliaj samlingvanoj. En tiu ĉi kazo, kiel ekzemple en la kazo pri *esperantologio/esperantologo* kaj *Esperantujo*, la lingva tradicio kaj la novaj formoj kunharmonias, kaj sekve okazas tute glata kaj senprotesta akceptado de la novuloj.

Sed ankaŭ ne malofte okazas, ke tradicio kaj lingvosistemo ne plene kunharmonias, ĉar, en rilato al konkreta sinkronia evolu-

*) Profesoro agregacia pri romanida lingvistiko kaj lektoro pri Esperanto ĉe Universitato de La Laguna, Kanariaj Insuloj, licenciato pri klasika filologio, doktorandus pri romanida lingvistiko (Univ. Madrid).

¹ Same kreiĝis *Esperantujo*, kiel deduktiĝas el la enhavo de la nuna artikolo.

etapo de lingvo, pluraj solvoj estas eblaj. Tiam la analogio naskas novajn formojn, sendependajn de la tradicio. Temas do pri *analogiaj novigoj*. Tiun kreadon de novaj analogiaĵoj diktas la bezono paroli klare, la deziro esti esprimiva. Ne temas pri logiko; temas pri forta deziro emfazi signifojn. La logiko ne malofte trompas la realan procezon de la lingvoevoluo.

*

Lastatempe aperis en la esperantista gazetaro *Deklaro pri „Nepalo“*, subskribita de mi kiel eldonisto de la libro de TIBOR SEKELJ *Nepalo malfermas la pordon*. Tiu *Deklaro* estis la finpunkto de longa korespondado inter T. S. kaj mi, pro tio, ke en la citita libro aperis mapo kun la landnomoj *Nepalujo*, *Tibetujo*, kaj en la *Leksikologia komentario*, kiun mi aldonis al la volumo, mi esprimis klaran preferon por tiuj du formoj, kvankam mi lojale respektis la formojn *Nepalo* kaj *Tibeto*, kiujn T. S. uzis en la korpo mem de la libro. Mi ĉiam skrupule respektas lingvajn preferojn de aŭtoroj, kies librojn mi eldonas, eĉ kiam ili estas eraraj, se, post averto, la aŭtoroj insistas pri ili. Ne okazis ĉi-foje tiel, ĉar ja *Nepalo* kaj *Tibeto* estas formoj ekzistantaj apud *Nepalujo* kaj *Tibetujo*. Tamen ne nur protestis T. S., en formo, kiu trenis nin ambaŭ preskaŭ ĝis la rando de interkonfliktiĝo, sed ja ankaŭ gazetoj kaj privataj uloj diris, ke mi iris tro malproksimen. Sed ĉu vere mi iris tro malproksimen, kaj *Nepalujo* estas „monstra“ formo, kiel ekzemple skribis al mi P. CILIGA?

G. WARINGHIEN (1959, p. 175), en brila eseo pri *La landnoma demando*, venis al la konkludo, ke ni troviĝas en evoluetapo de nia lingvo, kie pluraj formoj kaj solvopropozicioj aperas en kolizio, ĉefe post la krizaj jaroj ĉirkaŭ 1907. En la fino, li kompromise sugestas konsideri la landnomojn internaciaj vortoj, apliki al ili la 15an regulon de la Fundamenta Gramatiko kaj ilin ekuzi paralele kun la tradiciaj formoj. Tamen, laŭ mia kompreno de la afero, ne temas pri vortoj esperantigeblaj laŭ la 15a regulo, sed pri vortoj de nia *komuna* trezoro. Sekve ni devas alfronti la problemon tute decide kaj senkompromise.

*

En ĉiu grava demando, ni devas iri unue al la Fundamento, ĉar ĝi estas nia konstitucia leĝo. Apud ĝi, kaj dum kolizio ne estiĝos, ni povas funkciigi la leĝon de analogio, kiu regas por ĉiuj lingvoj. Frappe ĝin esprimis A. MEILLET per la supraj motaj vortoj, kiujn mi volas emfazi per ripeto: *Partout et toujours, les langues tendent à abolir l'absence d'unité et à instituer l'unité de forme pour l'unité de rôle grammatical et de signification.*

Ĉu la Fundamento eksplicite solvis la principan aferon de la landnoma vortokreado kaj permesas al ni apliki la leĝon de analogio? Jes ja! En la § 40 de la Ekzercaro ni legas: „La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo“. Laŭ tiu klara principo, ZAMENHOF kaj la unuaj esperantistoj ne hezitis tute konsekvence uzi la formojn *Bolivujo, Brazilujo, Holandujo, Irlandujo, Kanadujo, Palestinujo, Siberujo, Siriujo* ktp. Nur poste, ĉefe sub premo de kelkaj kleraj francoj, venis konsideroj pri la por ili ĝenanta plursenceco de la sufikso *-uj-*, kaj tiam ekflamis la t. n. landnoma demando, kiu baldaŭ evoluis al akra landnoma problemo.

Plursenceco de gramatikilo, eĉ se foje/povas aperi ĝena, ne estas ĉi-kaze la kerno de la demando. Aliaj gramatikiloj, ekz-e la prepozicio *de*, la sufikso *-it-*, la partiklo *krom* ktp, havas denaske pli ol unu sencon. La ĉefan batalpunkton konsistigas tio, ĉu ni konsideru kiel bazon la genton, kiel postulas la Fundamento (La *rusoj* loĝas en Rusujo) kaj devenigu el ĝi la nomon de la lando per la sufikso *-uj-* (La rusoj loĝas en *Rusujo*), aŭ ĉi ni konsideru kiel bazon la landon kaj devenigu el ĝi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso *-an-* (kiel ekz-e *eŭropano* el *Eŭropo*). Tiun distingon diktis al la kleraj francoj koncepto pri *nacio*, kiu por la plimulto de la tiutempaj eŭropanoj pli-malpli egalas al tiu de *gento*. Sed la koncepto pri *nacio* estas io origine eŭropa, kiu ne ĉiam ekzistis kaj probable ne ĉiam ekzistos. Cetere ĝi ne estas koncepto statika, sed dinamika kaj sin adaptiĝanta al malsamaj epokaj cirkonstancoj. Ĉar, kio finfine konsistigas *nacion* en niaj tempoj? Eble ĉefe la volo vivi kune, la politika komunumo. Tiel almenaŭ profiliĝas la konturoj de la nuntempaj nacioj. Plej draste en la novaj regnoj, kie oni insistege, multe pli ol en Eŭropo, parolas pri *nacia* armeo, *nacia* flago, *nacia* mono, *nacia* literaturo ktp. Ĉefe en Ameriko kaj nun en Afriko, kie fakte apenaŭ povas nuntempe ekzisti

nacioj laŭ la eŭropa kompreno de la vorto dum la lastaj du jarcentoj.² Kaj certe la novaj regnoj pravas, malgraŭ la diverseco de gentoj, rasoj, religioj, lingvoj ktp, ĉar ja — mi ripetas — ni iras al la kompreno de nacio kiel politika komunumo. La *svisoj* nepre konsistigas nacion, eĉ se ili parolas kvar lingvojn, devenas el du ĉefaj gentoj (ĝermanoj kaj romanidoj), praktikas plurajn religiojn, havas malsamajn kantonajn leĝojn ktp; same la *belgoj*, kiuj parolas du lingvojn kaj kies nacion konsistigas partoj el du najbaraj pli grandaj gentoj; kontraŭe la *aŭstroj* konsistigas nacion el nur parto de pli vasta etnio. Foje pluraj *nacioj* formas pli vastan regnon, kiel ekz-e Sovetujo, Hindujo, Jugoslavujo, el kio sekvas regule kaj normale paroli pri sovetoj, hindoj, jugoslavoj³

² Al la komunlingva sinonimiĝo aŭ egalaĵo (*gento*) = *lando* = *nacio* = *regno* = *ŝtato*, kun pli kaj pli forta malatento al la nocio *gento*, tre kontribuis unue la Ligo de *Nacioj*, kaj nun, ankoraŭ pli energie, la Organizaĵo de la Unuiĝintaj *Nacioj*. En respondecaj ĵurnaloj, gazetoj, revuoj kaj libroj oni skribas, ke nun OUN havas rondcifere 100 *landojn* aŭ *naciojn*; oni parolas pri *ŝtatoj*-membroj; kaj laste oni povas vidi en publikaĵoj angla-, franca- kaj hispanalingvaj, ke Leopoldville estas la *nacia* ĉefurbo de Kongolando, kontraste ekz-e kun Stanleyville, *provinca* ĉefurbo. Fakte Kongolando estas io apenaŭ komparebla kun la *eŭropaj* nacioj, sed tamen ĝi konsistigas unu el la 100 *nacioj* de OUN. Ni devas do agnoski, ke la nun ĉie viglanta koncepto pri *nacio* respondas al nova multe pli vasta, semantika enhavo. — Dume *gentoj* pli kaj pli malgraviĝas; laŭ DE SMET WIM („La Espero“, n-ro 1, 1961, p. 5), la afrika baĉokva gento vivas nuntempe dividita sub kvin administracioj, kie, krom la propra genta lingvo, regas kvar eŭropaj kaj pluraj aliaj oficialiĝintaj afrikaj lingvoj. Eble morgaŭ OUN akceptos tiujn kvin administraciojn kiel novajn naciojn. Sed ja Makedonujo en Eŭropo montris la vojon.

³ Ne temas pri kabinetaĵo mia! Dum mi verkis tiun ĉi artikolon, mi senerarigis la unuajn presprovojn de *Reekoj*, poemaro originale verkita en esperanto de 19 gejugoslavo. En la fino de la libro aperas iliaj biografietoj, en kiuj la kompilinto, MARINKO GIVOJE, zorge notis la naciecon de ĉiu. Sed antaŭ ol adresi al mi la definitivan manuskripton, li sendis, por kontrolo, la biografietojn al la 19 koncernuloj. Kaj en letero de 18. 11. 1960, GIVOJE informis:

„Feliĉe, ke mi sendis ilin al kontrolo, ĉar jen kelkaj ŝanĝoj: . . . anst. *kroatino* ĉe Skaljer-Race, mi devis meti *jugoslavino*. Iom strange ŝajnis al mi, ĉar ŝi sola havas kiel naciecon *jugoslavino*, dum la aliaj estas serboj, slovenoj, kroatoj . . . Sed kion fari? Jen kion ŝi tiurilate skribas: 'Mia patrino estis slovenino, mia patro kroato, mi naskiĝis en Kroatio kaj vivis kaj vivas en Serbio. Kio mi estas? Vi ne scias, certe. Mi ja estas kaj povas esti nur purrasa jugoslavino. Kaj tio mi estas!' Kaj, kedu min, ŝi pravus! Ni ne povas ŝin perforti, ke ŝi metu anstataŭe ion alian. Kunlige kun tio ĉe mi devas mencii al vi interesan enketon, kiun entreprenis la plej konata ju-

ktp. Mi scias, ke tiu formulo ne kovras ĉiujn realajn kazojn, kiel ekz-e *Usono* (kvankam min persone ne troe ŝokus *Usonujo* kaj *usonoj*: ili ja ne estus formoj malpli idiotisme konvenciaj, ol estas *Usono/usonano*, nek malpli fremdaspektaj por neesperantistoj); sed ĝi eliminis multajn komplikajojn, multajn diverĝojn, multajn konfuzeblojn — kaj, ĉefe, ĝi estas plene laŭfundamenta kaj perfekte analogia. Laŭ tiuj laŭfundamentaj kaj analogiaj principoj mi do signis la preferindon de *Nepalujo* kaj *Tibetujo*. Ĉar, laŭ mia lingvosento,

Nepalo malfermas la pordon

estas frazo tuttute paralela, el funkcia vidpunkto, al

<i>Belgo</i>	}	<i>malfermas la pordon.</i>
<i>Hindo</i>		
<i>Koreo</i>		
<i>Japano</i>		
<i>Tibeto</i>		

Kaj analogie al la supre citita § 40 de la Fundamenta Ekzercaro, ni devas kompreni, ke belgoj, hindoj, koreoj, japanoj kaj tibetoj loĝas respektive en Belgujo, Hindujo, Koreujo, Japanujo kaj Tibetujo.

goslava semajna ilustrita gazeto „Globus“ en 73 urboj de nia lando, en kiuj la jugoslavo respondis al 17 plej diversaj demandoj. La rezultoj aperis en „Globus“ de 13. XI. Unu el tiuj demandoj estis: 'Ĉu en viaj personaĵoj /generalije/ en la rubriko *nacieco* vi enskribas: serbo, kroato, sloveno ktp. aŭ nur: jugoslavo?' Tiuj, kiuj transiris la aĝon de 20 jaroj, estis tiurilate pli firmaj en elmontrado de sia nacieco, sed la pli junaj ol 20 jaroj, en la rubriko *nacieco* indikis grandparte jugoslavo“.

Temas pri ia kvazaŭ *svisiĝado*, t. e. kreado de nova *gento* el diversaj malpli grandaj etnioj, kiuj sin sentas konsistigantoj de pli vasta *nacio*, pro politika komuneco. Ĉu la politikan komunecon naskas volo vivi kune aŭ ĝin oni trudas perforte, la finrezultaĵo estas la sama. — Aliajn trafikajn ekzemplojn povas provizi la sovetaĵoj popoloj aŭ la israelaj civitanoj, sed ĉefe Ameriko, vastega fandejo de novaj gentoj devenigataj el indianoj, kreoloj, negroj kaj enmigrintoj (ĥinoj, japanoj, germanoj, poloj, grekoj ktp) plus mestizoj kaj mulatoj; tiurilate Brazilujo estas unu el la plej progresemaj regionoj, ĉar tie, inter 65.000.000 da loĝantoj, puraj blankuloj, puraj negroj kaj puraj indianoj nun estas regresantaj minoritatoj (ankoraŭ grandaj minoritatoj, jes ja, sed, kiom ajn grandaj, tamen *minoritatoj* kaj *regresantaj*).

En bela ĉapitro de sia libro *Interlingvistiko kaj esperantologio*, W. MANDERS analizas la koncepton de lingva korekteco kompare inter la lingvoj naciaj kaj esperanto, surbaze de la konata verko de O. JESPERSEN *Mankind, Nation and Individual*, kaj nerefuteble konkludas: „Kontraste kun la naciaj lingvoj, en kiuj ĝenerale nur tio estas korekta, kion oni kutime uzas, en Esperanto oni povas uzi ĉiun esprimon kiu estas komprenebla kaj ne kontraŭas la Fundamenton. Eĉ se ĉiuj esperantistoj dirus *Anglio* aŭ *stulta*, mi parolus korekte uzante *Anglujo* kaj *malsaĝa*.“

Ĉu do ne estas malsaĝe, se ni, havante la principon de unueco en la Fundamento, ruinigas ĝin per anarhia reflektado de la malregulaĵoj ekzistantaj en la gentaj lingvoj? Ne estis sekvo de eldonista ekstemporala la mapo kaj la preferindo, kiujn mi montris por la formoj *Nepalujo*, *Tibetujo*, kiel eble povus kredigi la *Deklaro pri „Nepalo“*, sed respekto al la aŭtoraj preferoj, de unu flanko, kaj montrado de direkto sekvenda, de la alia. La valideco de *Nepalujo*, *Tibetujo* estis analogie deduktita de la primaraj normoj de nia lingvo; sekve tiuj formoj estas absolute korektaj kaj, pro sia laŭfundamenteco kaj apogo sur nia plej sana tradicio, certe prave preferindaj.⁴

Summary

In late 1960 and early 1961 there appeared in the Esperanto press a notice *Deklaro pri „Nepalo“* (A Statement on „Nepal“) in which J. RÉGULO, the publisher of TIBOR SEKELJ's *Nepalo malfermas la pordon*, apologises for printing in the map and appendix of that book the forms *Nepalujo*, *Tibetujo* as in his view preferable to *Nepalo* and *Tibeto* as used by the author. J. RÉGULO here defends his preference on the basis

⁴ Pro la limigita spaco, kiun la redaktoro asignis al ĉiu kontribuaĵo por tiu ĉi festnumero, mi ne povis enkonsideri la Lingvan Respondon de ZAMENHOF pri landnomoj, nek la ideojn de ZAMENHOF-hilel-isto, ke ĉiuj regnoj nomu sin laŭ la ĉefurbo: Parizio, Peterburgo. Ankaŭ en pli vasta enkadrigo de la temo nepre meritis konsideron la sistemo regule aplikata de SAT (kiun mi mem fojfoje uzis), kun la interesaj formoj *Franclingvio*, *Germanlingvio* (en ambaŭ ĉi-kazoj temas, kiel oni scias, pri teritorioj nuntempe apartenantaj al tri eŭropaj ŝtatoj) ktp. La supra prezento ŝajne trosimpligas la problemon, mi scias; sed per tio mi ne pretendas ĝin *finsolvi*, sed kontribui al ĝia fokusigo laŭ la Fundamento, kaj per mia tezo pravigi la uzon de *Nepalujo*, apud tiu de aŭstraloj, bolivoj, kanadoj ktp por la loĝantoj de la koncernaj -ujoj.

of the Esperanto *Fundamento* and the law of analogy which operates in all languages, and argues that *Nepalujo* and *Tibetujo* are regular and acceptable forms. But since the complex question of geographical nomenclature is now to the forefront, J.R. goes into the genesis of the whole question, shows that the terms of dispute have undergone a semantic change, and urges a single, uniform way for forming the names of countries, in the spirit of the *Fundamento de Esperanto*.

BIBLIOGRAFIO

- MANDERS, W., 1950: Interlingvistiko kaj esperantologio: Purmerend, 61 p.
WARINGHIEN, GASTON, 1959: Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj. La Laguna. 450 p.

Esperantigo de grekaj nomoj

de D-ro EBBE VILBORG*)

Kiam esperanta teksto enhavas nomojn el lingvo, kiu ne uzas la latinan alfabeton, estas necese apliki iun sistemon de transskribado aŭ esperantigo. Pro sia grandega kultura influo la antikva greka lingvo havas la plej gravan pozicion inter tiaj lingvoj. Pri la formoj de grekaj nomoj en Esperanto ankoraŭ regas kompleta ĥaoso. Tamen estas grave, ke Esperanto, kiu celas esti rekonata kiel kultura lingvo, almenaŭ evitas rekte erarajn kaj absurdajn formojn. Tiu ĉi artikolo estas provo sistemigi la esperantigon de grekaj (personaj) nomoj. Mi preferas esperantigon ol nuran transskribon pro tio, ke ĝi havas jenajn avantaĝojn:

a) La nomoj enhavos nur sonojn konatajn de ĉiu esperantisto; neniun hezitos pri prononco aŭ akcento.

b) Asimilitaj nomoj komplete adaptiĝas al la esperantaj sintakso kaj vortfarado.

c) Estas pli facile konkordi pri unuforma sistemo de esperantigo (ĉar ni povas uzi la ekzemplojn donitajn de ZAMENHOF kiel normigajn) ol elekti unu el pluraj eblaj sistemoj de transskribado.

La problemo dividiĝas en du partojn: 1) redono de unuopaj grekaj fonemoj; 2) esperantigo de la finoj de diversaj nomtipoj. Mi finos la artikolon per listo de rekomendindaj formoj.

1. Redono de grekaj fonemoj.

La esperantaj ekvivalentoj proponitaj en la suba tabelo diferencas je multaj punktoj de la supozata prononco de la klasika greka lingvo (Ateno, 5-a jc. a. K.). La kaŭzo de tio estas, ke la prononco jam estis parte ŝanĝita, kiam la latina lingvo komencis amase asimili grekajn vortojn. La latina transskribmaniero poste eniris en la modernajn eŭropajn lingvojn, kaj ni devas rememori ke ZAMENHOF ne prenis la grekdevenajn radikojn rekte el la fonto: li adoptis ilin pere de la latino aŭ iu moderna lingvo.

*) D-ro de filozofio, docento de greka lingvo ĉe la Universitato de Gotenburgo, Svedujo.

Greka liter(kombin)o	Esperanta ekvivalento	Ekzemploj normaj
<i>Vokaloj</i>		
α	<i>a</i>	<i>akademio</i>
ϵ	<i>e</i>	<i>episkopo</i>
η	<i>e</i> 1)	<i>demokratio</i>
ι	<i>i; j</i> 2)	<i>biblio; jodo</i>
o	<i>o</i>	<i>organo</i>
v	<i>i</i>	<i>sistemo</i>
ω	<i>o</i> 1)	<i>diplomo</i>
<i>Diftongoj</i>		
$\alpha\iota$	<i>e; aj</i> 3)	<i>sfero</i>
$\epsilon\iota$	<i>i</i> 4)	<i>idolo</i>
$o\iota$	<i>e; oj</i> 5)	<i>ekonomo; levkojo</i>
$v\iota$	<i>i</i> 6)	<i>harpio</i>
αv	<i>aŭ; av</i> 7)	<i>paŭzo</i>
ϵv	<i>eŭ; ev</i> 8)	<i>eŭnuko; evangelio</i>
ov	<i>u</i>	<i>muzo</i>
φ	<i>o</i> 9)	<i>melodio</i>
<i>Konsonantoj</i>		
β	<i>b</i>	<i>barbaro</i>
γ	<i>g</i>	<i>giganto</i>
$\gamma\gamma$	<i>ng</i> 10)	<i>diftongo</i>
$\gamma\xi$	<i>nks</i>	<i>sfinkso</i>
δ	<i>d</i>	<i>diademo</i>
ζ	<i>z</i>	<i>zono</i>
ϑ	<i>t</i>	<i>mito</i>
κ	<i>k; c</i> 11)	<i>kometo; ceramiko</i>
λ	<i>l</i>	<i>liriko</i>
μ	<i>m</i>	<i>manio</i>
ν	<i>n</i>	<i>nimfo</i>
ξ	<i>ks</i> 12)	<i>aksiomo</i>
π	<i>p</i>	<i>praktika</i>
ρ	<i>r</i> 13)	<i>ritmo</i>
σ, ς	<i>s; z</i> 14)	<i>spasmo; frazo</i>
τ	<i>t</i> 15)	<i>titano</i>
φ	<i>f</i> 16)	<i>filozofo</i>
χ	<i>ĥ</i> 17)	<i>ĥaoso</i>
ψ	<i>ps</i>	<i>psikologio</i>
ϵ	<i>h</i>	<i>harmonio</i>

Notoj.

1) Esperanto ne povas — samkiel aliaj lingvoj uzantaj la latinan alfabeton — diferencigi longan kaj mallongan *e* aŭ *o*.

2) G ĉiam estis vokalo, sed por faciligi la prononcon estas rekomendinde meti la respondan konsonanton (*j*) kiam ĝi troviĝas antaŭ alia vokalo. Kp. notojn 3, 5.

3) Laŭ modelo de *Ajakso* (Z) ni rekomendas *aj* antaŭ vokalo, *e* en ceteraj pozicioj.

4) Rimarkinda escepto estas la uzo de *-e-* en L antaŭ vortfina *-us*, *-a*, *-um*. El L tiu skribmaniero envenis en Esp. (*liceo*, *muzeo*). Mi sekvis tiun tradicion ankaŭ por personaj nomoj.

5) *e* antaŭ konsonanto, *oj* antaŭ vokalo (kp. noton 3).

6) Apenaŭ uzata en personaj nomoj.

7) *aŭ* antaŭ konsonanto, *av* antaŭ vokalo (kp. noton 8).

8) *eŭ* antaŭ konsonanto, *ev* antaŭ vokalo.

9) *o* estis origine longa diftongo (longa *o* + *i*), sed la dua elemento kun la tempo mutiĝis. Tiun staton reprezentas la L transskribo per nura *o*. La fonemo apenaŭ troviĝas en personaj nomoj.

10) *γ* estis uzata en G por esprimi la nazalon antaŭ *g-* aŭ *k-* sono (kiel en A *ring*). En Esp. aperas *n* + la koncerna sono.

11) *κ* estis origine ĉiam prononcata [k]. Tamen, en L la prononco sangiĝis en [ĉ] en pozicioj antaŭ *e*, *i*, *y*. Tiu duobla prononco influis la transskribon en modernaj lingvoj, ankaŭ Esp.

12) Ekzemploj kun *-kz-* ne estas troveblaj en grekdevenaj radikoj.

13) *ϝ* signifas specialan *r*-sonon prononcatan kun (sammomenta) *h*-sono. Ĝi troviĝis komence de vortoj kaj, kune kun normala *r*-sono, interne de vortoj (ekz. *Ῥίρκος*). En la interno de certaj nomoj, la skribo *-rh-* estas imagebla por eviti konfuzojn (*Pirho* pli bone ol *Piro*?).

14) *s* ĝenerale, *z* inter vokaloj (en radikfino tamen *s*, se tiu sono finas la grekan vorton: *ibisio*). Ankaŭ *σσ* estas sonorigita intervokalo en Esp.: *maŭzoleo* (tamen ne en radikfino: *koloso*).

15) En kelkaj malfruepokaj grekaj nomoj finiĝantaj per *-τιος* oni povas konsideri la transskribon *-cio* (ĉar la L prononco estis [tsi]).

16) Origine aspirata *p* kaj tial skribita *ph* en L. Tamen la sono

poste ŝanĝiĝis — kaj en G kaj en L — en [f]; la modernaj lingvoj, eĉ se ili konservas la grafion *ph*, ĉiuj montras tiun sonon.

17) χ prezentas, inter ĉiuj G konsonantoj, la plej gravajn malfacilojn por transskribado. Ĝia origina sono estis aspirata *k* (en L: *ch*); L kaj la plejmulto de modernaj lingvoj konservis la *k*-sonon, sed G mem transformis ĝin en [h]. Por Esp., kaj *k* kaj *h* povas esti konsiderataj: *h*, reprezentanta la spirantan prononcon de χ analoge al *f* reprezentanta φ ; *k*, ĉar (a) per tiu sono la plimulto de nunaj lingvoj redonas χ , (b) la grafio *k* respondas al la klasika prononco (analoge al *t* = ϑ), (c) ekzistas tendenco en Esp. eviti la *h*-sonon entute. Efektive, la esperantaj radikoj devenantaj de grekaj vortoj kun χ povas esti grupigataj en tri kategorioj: (1) kun *h* (*holero*, *horo*); (2) kun *k* (*kilometra*, *kroniko*); (3) jen kun *h*, jen kun *k* (*arĥi-*, *mehaniko*). La kombino $\sigma\chi$ ĉiam fariĝas *sk*: *skemo*, *skismo*, *skolo*. — Por nia celo ŝajnas grave povi distingi la grekajn fonemojn κ kaj χ (ekz. por redoni la kombinon $\kappa\chi$ = *kĥ*). Ni do rekomendas *h*, kvankam en plej multaj kazoj *k* povas esti uzata sen ĝeno.

2. Traktado de grekaj vortfinoj.

Ĝenerala principo: radikoj finiĝantaj per vokalo perdas la vokalon antaŭ Esp. -o; radikoj finiĝantaj per konsonanto ricevas aldone Esp. -o.

(a) Viraj nomoj kun radikoj en -o (nom.: -os). Ni povas rekte transpreni la radikojn en Esperanton. Z-aj ekzemploj: *Adrasto*, *Egisto*, *Plutarĥo* k. t. p.

(b) Virinaj nomoj kun radikoj en -a/-e (nom.: -a, -e). Formoj -ao, -eo estas certe evitindaj pro malbonsoneco. Ni do anstataŭigu la finvokalon per -o. Z-aj ekzemploj: *Andromakĥo*, *Heleno*, *Ifigenio* k. t. p.

(c) Viraj nomoj kun radikoj en -a/-e (nom.: -as, -es). Sama traktado kiel por (b). Z-aj ekzemploj: *Eneo*, *Oresto* k. t. p. Escepto: Se la formo estas nur dusilaba, ŝajnas konsilinde konservi la tutan nominativan formon, aldonante -o, por garantii plejblan rekoneblecon. Ekz.: *Areso* (pli bona ol *Aro*), *Hadeso* (Z), *Hermeso*.

(ĉ) Geviraj nomoj kun radiko en $k(h)$, $p(h)$, $t(h)$; g , b , d ; n , r , nt . Ni povas principe eliri aŭ de la nominativa formo (finaĵo nul aŭ $-s$) aŭ de la genitiva formo (minus la finaĵo $-os$); la lasta pli bone montras la karakteron de la radiko: *Atlaso* aŭ *Atlanto*, *Eroso* aŭ *Eroto*. Por personaj nomoj ni rekomendas la nominativan formon $+o$ (laŭ modelo de Z: *Adoniso*, *Eroso*, *Iriso*, *Pariso* k. t. p.). Por ordinaraj substantivoj Esp. kontraŭe preferas la genitivan radikformon (tamen ne konsekvence): *piramido* (sed *ibiso*!), *giganto* (sed *atlaso*!), *faringo* (sed *sfinkso*!). Ankaŭ la ceteraj modernaj lingvoj estas nekonsekvencaj je tiu punkto.

(d) Viraj nomoj kun radiko en $-s$ (nom.: $-es$). Ĉar ni jam pri-traktis alian tipon kun nominativo en $-es$ (c), ŝajnas logike proponi la saman solvon por tiu ĉi kategorio. Z-a ekzemplo: *Diogeno*. La escepto proponita sub (c) ne povas okazi ĉi tie, ĉar ĉiuj nomoj de tiu ĉi grupo estas kunmetoj kaj do plursilabaj.

(e) Viraj nomoj kun radiko en $-eŭ$ (nom.: $-eus$). Ni proponas esperantigon en $-eo$. Tiu solvo konservas la G akcenton kaj havas la apogon de la latinidaj lingvoj (*Orfeo* = F *Orphée*, I *Orfeo*). Z-aj ekzemploj: *Atreo*, *Perseo*, *Prometeo*. Tradicia escepto estas *Aĥilo* (Z), sendube pro L *Achilles* (*akileo* estas botanika termino).

(f) Geviraj nomoj kun radiko en $-i$ (nom.: $-is$). Analogio al la alia klaso kun nominativo en $-is$ (kp. sub ĉ: *Iriso*, *Pariso*) igas nin rekomendi esperantigon en $-iso$. En la biologiaj terminoj derivitaj de tiu ĉi klaso, niaj vortaroj hezitas inter $-io$ kaj $-o$ (vd. WÜSTER 1926). Kelkaj el la nomoj en $-is$ estas personigitaj abstraktaj verb-substantivoj finiĝantaj per $-\sigma\zeta$ (tipo kiu ĝenerale donas $-zo$ en Esp.: *dozo*, *krizo*, *tezo* . . .). El tiaj substantivoj ni do havus nomformojn kiel ekz. *Nemeziso* kun malagrabla duo de siblaj sonoj. Por eviti tion mi proponas duoblan regulon: Se la greka nomo havas σ antaŭ la radikfino, ni esperantigu ĝin per $-zo$ (*Nemezo*); se ne, ni preferu la plenan formon en $-iso$.

(g) Virinaj nomoj kun nom. en $-o$. Ni transprenu la nominativan formon: *Sapfo*, *Ino*.

3. Listo de rekomendataj formoj.

La jena listo registras kelkajn ofte citatajn grekajn nomojn (el filozofio, historio, mitologio) laŭ la transskribo skizita ĉi-supre. Kie mia transskribo diferencas de formo trovebla en WARINGHIEN, *Grand dictionnaire Espéranto-Français* (W), mi notis tion. Mi ne sisteme provis eviti similecon al ordinaraĵoj substantivoj (kp. *Pano*: *pano*); en la plejmulto de tiaj okazoj, konfuzoj ne estas imageblaj. Ĉe kelkaj nomoj mi notis m (vira) resp. f (virina).

Adoniso, Afrodito, Agamemnono, Aĥilo, Ajaso (Aĵakso W), *Alceo, Alcestiso, Alcibiado, Aleksandro, Alkmano, Alkmeno, Amfitrito, Anakreono, Anaksagoro, Anaksimeno, Andromaho* (m kaj f), *Andromedo, Anĥizo, Antigono* (m kaj f), *Antisteno, Apelo, Apolono, Areso, Arĥiloĥo, Arĥimedo, Ariadno, Aristido, Aristofano, Aristotelo, Artemiso, Asklepio, Aspazio, Ateno* (f), *Ateneo* (m), *Atlaso, Atreo, Aŭgio*.

Bakĥo (Bakko W), *Belerofono, Biaso, Boreo, Brazido, Brizeiso. Cekropso, Cerbero, Cibelo, Ĉimono, Ĉirko* (Circa W).

Dafno, Danao, Dedalo, Demetro, Demokrito, Demosteno, Deŭkaliono, Diogeno, Diomedo, Dionizo, Dionizio, Drakono.

Edipo, Egeo, Egisto, Eĥo, Elektro, Endimiono, Eneo, Eolo, Eoso, Epikuro, Epikteto, Eriso, Eroso, Eŝilo (Eskilo W), *Eŝino, Eteoklo, Eŭklido, Eŭridiko* (Eŭridika W), *Eŭripido, Eŭropo, Ezopo*.

Faetono, Febo (m kaj f), *Fedono, Fedro* (m kaj f), *Fidio, Filipo, Filokteto, Filomelo, Fineo*.

Galateo, Ganimedo, Georgio, Gorg(on)o.

Hadeso, Hebo, Hefesto, Hekabo, Hekato, Hektoro, Heleno, Hero, Heraklo, Heraklito, Hermeso, Herodoto, Herondo, Herostrato, Heziodo, Hiperiono, Hipodamio, Hipokrato, Hipolito, Hiponakso, Homero.

Ĥaribdo, Ĥarmido, Ĥarono, Ĥirono, Ĥrizeiso, Ĥrizipo.

Ifigenio, Ikaro, Ino, Io, Iriso, Ismeno, Izokrato.

Jazono, Jokasto.

Kadmo, Kalimaho, Kaliopo, Kalipso, Kasandro (m kaj f), *Kastoro, Klio, Kleopatro, Kleono, Klitem(n)estro, Konono, Kreono, Krezo, Krono, Ksantipo* (m kaj f), *Ksenofano, Ksenofono*.

*Laerto, Lajo, Ledo, Leonido, Leto, Likurgo, Lizio, Lizipo, Lizi-
strato, Luciano.*

*Medeo, Meleagro, Melpomeno, Menandro, Menelao, Midaso, Mil-
tiado, Mimnermo, Minoso.*

Naŭzikao, Nemezo, Nereo, Nestoro, Niobo.

Oceano, Odiseo, Oresto, Orfeo, Oriono.

*Palaso, Pano (Pajno W), Pandoro, Pariso, Parmenido, Patrok-
lo, Paŭzanio, Pazifao (Pazifea W), Pegazo, Peleo, Pelopso, Pene-
lopo, Perdiko, Periandro, Periklo, Perseo, Persefono, Pindaro, Pir-
ho, Pitagoro, Pitio, Pizistrato, Platono, Plutarĥo, Plutono, Polibio,
Polideŭko, Polifemo, Polignoto, Poliklito, Poliniko, Pozidono,
Praksitelo, Priamo, Priapo, Prokrusto, Prometeo, Protagoro, Pro-
teo, Ptolemeo.*

Radamantiso, Reo.

*Sapfo, Scilo, Seleno, Semelo, Semonido, Simonido, Sizifo, Sko-
paso, Sofoklo, Sokrato, Solono, Stentoro, Steziĥoro, Strabono.*

*Taleso, Talio, Tantalo, Telemaĥo, Temistoklo, Teodoro, Teo-
frasto, Teogniso, Teokrito, Terpsiĥoro, Tespiso, Tetiso, Tezeo, Ti-
esto, Timoteo, Tirezio, Tirteo, Triptolemo, Tritono, Tucidido.*

Urano.

Zefiro, Zenodoto, Zenono, Zeŭksiso, Zeŭso.

Summary

A system for the transcription and assimilation of (ancient) Greek personal names, based upon the usage of ZAMENHOF, is proposed. A list containing the most frequent of those names in transcription concludes the article.

BIBLIOGRAFIO

- WARINGHIEN, G., 1957: Grand Dictionnaire Espéranto-Français. Paris. 367 p.
- WÜSTER, E., 1926: Esperantologiaj principoj. En: Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. Leipzig. (Kun bibliografiaj indikoj sur p. 51, ne ripetitaj ĉi tie). P. (25)—(66).

Pri la artikolo, precipe en esperanto

de VILHO SETÄLÄ*)

La unua el la dek ses „reguloj“ gramatikaj de Fundamento de Esperanto (ZAMENHOF 1905) varias laŭ la lingvo. En Fundamenta Krestomatio (ZAMENHOF 1903) ĝi tekstas esperante: *Artikolo* nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (*la*), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj. *Rimarko*. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj. Personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

En la alilingvaj tekstoj plejmultaj la „rimarko“ tute mankas; en la franca teksto estas menciita simileco kun uzo en franca kaj germana lingvoj, en la rusa oni parolas pri tiuj lingvoj „kaj aliaj“, en la nederlanda-flandra pri „nia“ lingvo.

Sed la uzo de la artikolo varias de lingvo al lingvo. Pro tio la esperantologoj jam frue komprenis, ke necesas pliaj reguloj, ĉe kio ili kompreneble sin apogis al la alilingvaj gramatikoj. Tiel PAUL FRUICHTER (1903) pritraktas la artikolon en ok ĉapitroj, kiuj dividiĝas en 23 „regulojn“ kun aldono de sep „rimarkoj“, sur ok malgrandaj paĝoj. Same KALOCSAY kaj WARINGHIEN (1938) uzas kvin grandajn paĝojn por la pritrakto.

Ĉu la afero fakte postulas tiom da pritrakto, reguloj kaj esceptoj? La stato ŝajnas almenaŭ nedezirinda por lingvo simpla kaj logika.

Estas necese iri al la fonto, t. e. al la historie evoluintaj lingvoj. E. N. SETÄLÄ k. a. (1915) difinas la aferon jene:

„Laŭ tio, ĉu la estaĵoj estas difinitaj aŭ nedifinitaj, oni povas esprimi ilin a) konataj aŭ antaŭe menciitaj (difinita senco), b) nekonataj aŭ antaŭe nemenciitaj (nedifinita senco). Ĉi tio estas esprimata en kelkaj lingvoj per fleksiaj formoj, en aliaj per apartaj vortoj, nomataj artikoloj. Laŭ tio oni diferencigas en tiuj lingvoj du *specojn*, la difinitan kaj la nedifinitan.“

*) Fil. magistro, Helsinko, Finnlando.

Tiu bazo estas komuna al la diverslingvaj lernejoj gramatikoj, kiujn mi konas. Kaj en ĉiuj el ili, ĝi kondukas al multforma regularo pri la uzo de la artikolo(j), kun diversaj esceptoj.

La plej grava devio de la ĉefregulo estas la neuzo de la difina artikolo ĉe propraj nomoj kaj ĉe vortligoj, kie diversaj pronomoj determinas la substantivon (Zamenhof, doktoro Zamenhof, mia patro, tiu domo, ktp.), kiuj ĉiuj prezentas difinitan specon. Ĉi tiu malfacilaĵo estas rekonita de la esperantologoj, kaj ĝi speguliĝas en iliaj verkoj per tio, ke ili tute ne donas ĉefregulojn por la okazoj, kie la difina artikolo estas uzenda, nur por tiuj, kie oni neniam uzu ĝin (FRUICIER 1903, § 10, dua alineo).

Tiu devio tamen ŝajnas al mi tiel grava, ke senplue leviĝas la demando, ĉu ne la ĉefregulo estas malĝusta.

Evidente la unua, kiu ekkomprenis la gravan diferencon inter du kategorioj de esprimoj, „determinaj“ kaj „aludaj“, estis la sveda filologo ADOLF NOREEN (1903). Li ne nur akcentis la diferencon inter unuopaj vortoj, kiuj determinas koncepton (ekz. ĉevalo, forta, labori), kontraŭ aliaj, kiuj nur aludas al tia (ĝi, tie, tuta ktp.), sed ankaŭ montris, ke la sama kontrasto povas ekzisti inter vortligoj, kaj ke ĉiu substantivo povas en frazo esti uzata en determina aŭ en aluda senco.

Tio signifas, ke 'ĉevalo' en naturscienca teksto, kiu pritraktas la kvalitojn komunajn al ĉiuj individuoj de la zoologia specio *equus caballus*, estas vorto determina, same la vortligo 'mia ĉevalo' aŭ 'Brunulo' (kiel nomo de ĉevalo), kaj simile. Kontraŭe, en la ofte citita frazo 'venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana', la vorto 'kuracisto' aludas al 's-ro X, doktoro de medicino'; ĝi ne estas determina vorto. Sed se ni tie forlasas la artikolon ('venigu kuraciston'), la vorto 'kuracisto' estas uzata en determina senco, tio signifas, 'mi' postulas nur personon kun la distingo inter aliaj homoj, ke li estas kuracisto.

La 'determinajn' vortojn ni povus, eble pli facile kompreneble, nomi *vortoj*, *kiuj plene karakterizas* la celitan ideon, kaj la 'aludajn' *vortoj*, *kiuj postulas kompletigon*, antaŭ ol ili tion farus, sed kiu kompletigo ĝenerale ne estas necesa pro la kunteksto aŭ pro la cirkonstancoj, en kiuj la frazo estas uzata kaj komprenata.

Sur la bazo de ĉi tiu divido la ĉefregulo pri la uzo de artikolo fariĝas:

La difina artikolo estas uzenda, kiam vorto estas uzata en aluda signifo, en tiu senco, ke sen la kunteksto ĝi postulus kompletigon per determinaj vortoj por esprimi la celatan koncepton.

Ĉi tiu regulo havas la avantaĝon, ke ĝi ne havas esceptojn, en esperanto. Se la leganto studos la ekzemplojn donitajn ekz. en la Plena Gramatiko sur la bazo de ĉi tiu regulo, li tion facile konstatos. Estas necesa unu sola 'rimarko'. Nome, se substantivon sekvas longeta determino, aŭ se tia antaŭiras aŭ ĉirkaŭas la substantivon, oni povas montri per la artikolo, ke la substantivo kiel tia ne estas determina kaj postulas kompletigon (kiu tamen ĉeestas).

Fine, se ĉi tiu regulo lasas iun okazon nedecidita, tio signifas, ke la uzo de la artikolo estas logike indiferenta, aŭ eventuale kaŭzas nuancan diferencon en la senco de la frazo.

Por la fino mi donas kelkajn karakterizajn ekzemplojn kun aludo al la donita regulo.

Ekzemploj (*d* = plene determina esprimo, *a* = aluda senco,

k = kompletigo sekvas, laŭ la rimarko).

Sur la herbejo ludas *knabino*. (*d*).

La knabino havas ludilon. (*a*)

Ŝia ludilo (*d*) estas ringo, *la mia* (*a*) estas pilko.

Kiu estas en *la ĉambro* (*a*: ekz. nia ĉambro)?

Tie estas *maljunulo* (*d*). Tie estas *la avo* (*a*: nia avo).

Ĉu sur *tiu herbejo* (*d*) estas ankaŭ *via ĉevalo* (*d*)?

Jes, *la ĉevalo* (*a*: nia ĉ.) estas nigra.

Alian ĉevalon (*d*: iun el la aliaj) posedas Karlo.

La aliaj ĉevaloj (*a*: ĉiuj aliaj) estas fremdaj.

Sur la herbejo estas ankaŭ *la ĉevalo* (*k*), kiun vi vidis hieraŭ.

Ĉevalo, kies piedo estas rompita, nepre lamas (*d*).

La urbo Berlino (*k*). *La urbo*, kie mi loĝas (*k*).

La fama profesoro Ramstedt (*k*).

Sinjoro Malmgren, profesoro Collinder, Laŭro Friis (*d*).

Universala Esperanto-Asocio (*d*). Balta maro, Danubo, Rejno (*d*).

(La) Nigra maro [fakte *d*, sed oni povus diri, ke la maro estas nur unu el la nigraj maroj (!), kaj tial (*a*)].

Zusammenfassung

Über den bestimmten Artikel, besonders in Esperanto.

Die Benutzung des bestimmten Artikels ist prinzipiell ähnlich in allen Sprachen, die den Artikel kennen. Gewöhnlich wird die Hauptregel so formuliert, dass der Artikel dann zu benutzen ist, wenn das betreffende Hauptwort auf ein vorher erwähntes oder bestimmtes Ding deutet. Von dieser Regel machen aber eine ganze Reihe von Fällen eine prinzipielle Ausnahme. So wird der bestimmte Artikel niemals bei bestimmten Ausdrücken folgender Art benutzt: Zamenhof, Dr. Zamenhof, mein Vater, jenes Haus, usw. Wenn man aber beachtet, dass ein substantivischer Ausdruck entweder ein Ding restlos benennt, oder im Gegenteil nur darauf hinweist, kann man die Regel so abändern, dass „der Artikel dann zu benutzen ist, wenn das Hauptwort nur auf das Ding deutet“, und irgendeiner Ergänzung bedürfte, um das Ding restlos zu bestimmen, und damit zu einer Hauptregel mit keinen prinzipiellen Ausnahmen kommen. Man muss nur darauf hinweisen, dass, wenn die Ergänzung z. B. in Form eines Relativsatzes nachfolgt, der Artikel eben deshalb nötig ist, weil diese nur nachher kommt.

Die so aufgefasste Regel ist ohne Ausnahmen in Esperanto zu folgen. In den Nationalsprachen kommen natürlich Ausnahmen vor, aber diese sind schon nicht prinzipieller Art.

BIBLIOGRAFIO

- FRUCTIER, PAUL: Esperanta sintakso. 1-a eldono 1903, Parizo, 2-a eldono 1907.¹
- KALOCSAY, K. & WARINGHIEN, G.: Plena Gramatiko de Esperanto, 2-a eldono 1938,¹ Budapest.
- NOREN, ADOLF: Vårt språk, 1903, Stockholm.
- SETÄLÄ, E. N., USCHAKOFF, I. & RALF SAXEN: [tradukita titolo] Raporto de gramatika komitato (de Finnlanda registaro) (Komiteanmietintö n:o 6), 1915, Helsinki.
- ZAMENHOF, L. L.: Fundamento de Esperanto, 1-a eldono 1905, Parizo. 5-a eldono 1918.¹
- Fundamenta Krestomatio, 1-a eldono 1903, Parizo. 6-a eldono 1909.¹

¹ La eldonoj, je kiuj la verkinto disponis.

Indikoj per Esperanto de angla prononco

de J. C. WELLS, B. A.*)

Antaŭ kelkaj jaroj Prof. WARINGHIEN (1956) proponis sistemon por figuri la proksimuman prononcon de neesperantigitaj propraj nomoj. Tiucele uzante la Esperantan alfabeton li aldonis al ĝi plurajn simplajn signojn por sonoj, kiuj ne troviĝas en Esperanto. Tiuj, kiuj estas uzeblaj por indikoj pri anglaj vortoj, estas jenaj: „*x* = franca *e*, *eu*; germana *ö*; angla *u*, *ir*, ktp (do, aŭ antaŭa lip-ronda mezvasta vokalo, aŭ centra mezvasta vokalo).

d' = angla *th* mola.

n' = angla kaj germana *-ng*.

t' = angla *th* dura, hispana *c* (antaŭ *e*, *i*), *z*.

! post silabo montras, ke ĝi estas akcenta, kiam la akcento ne estas samloke, kiel en Esperanto.“

La sama sistemo estas aplikita en *Esperanta Antologio* (AULD 1958) kaj en *Lingvo kaj Vivo* (WARINGHIEN 1959), sed jam kun aldono de la signo “:”, kiu post vokalo montras, ke ĝi estas longa.

Pli-malpli fonetika transskriba sistemo, kiel ĉi tiu, celas ebligi, ke parolantoj de unu lingvo (ĉi-kaze Esperanto) sciu proksimume ĝuste prononci nomojn kaj aliajn vortojn en unu aŭ pluraj aliaj lingvoj (ĉi-kaze ni konsideras nur la anglan). Ekzistas du alternativaj principoj, sur kiuj ĝi povas baziĝi:

- 1° Redoni ĉiun sonon de la angla lingvo per la plej simila sono de Esperanto eventuale kun aldono de kelkaj neesperantaj, tamen pli-malpli internaciaj sonoj — vidu supre; aŭ
- 2° Apliki la sistemon, ke ĉiu aparta sono (pli ĝuste, fonemo) de angla estu montrata per aparta simbolo en la transskribo.

Ni konsideru kelkajn ekzemplojn de alternativo inter ĉi tiuj du principoj. La unua vokalo en la angla nomo „Radcliffe“ havas sonon proksimume mezan inter Esperantaj *a* kaj *e*.¹ Se oni sekvas la

*) licenciulo (B. A.) de la Universitato de Cambridge, studento ĉe University College, Londono, en la Fonetika Instituto.

¹ En ĉi tiu artikolo temas nur pri la sudangla klera prononco de la angla lingvo, la tiel nomata „Received Pronunciation“.

unuan principon ĉisupre menciitan, oni povus libere elekti, transkribante laŭ sia gusto per *a* aŭ *e*. En *Eseoj* WARINGHIEN (1956) redonis tiun nomon per *redklif*. Tamen tiu skribo ja pensigas al angloj ne pri „Radcliffe“ sed pri „Redcliffe“! Se, laŭ la dua principo, oni deziras ne intermiksi tiujn du anglajn vokalojn nek la du menciitajn nomojn, oni devas figuri la vokalon per *a*. Kaj ŝajne ankaŭ WARINGHIEN poste atingis tiun konkludon, ĉar en *Lingvo kaj Vivo* li skribas „Ashley“ kiel *aŝli*.

Se oni sekvas la unuan principon, evidente oni ne povas utiligi la longosignon “:”. Ĉar ekzemple la unua vokalo en „feeler“ havas saman longon (daŭron) kiel la *i* en Esp. *filo*, kaj la unua vokalo en „Warden“ kiel la *o* en *nodo*; vidu Plenan Gramatikon, § 20 (KALOCSAY-WARINGHIEN 1958). Tamen laŭ la dua principo, necesas uzi la longosignon (aŭ iun alian rimedon) por apartigi anglan „feeler“ disde „filler“, „Warden“ disde „Waddon“ — do *fi:lx*, *filx*, *ŭo:dxn*, *ŭodxn*. En tiu kazo oni devus klare atentigi, ke vokaloj sen la signo “:” devas esti mallongaj, indiferece ĉu en tia pozicio ili estas longaj en Esperanto aŭ ne. Atentu, tamen, ke la diferenco inter anglaj „keen“ kaj „kin“ ne estas eĉ ĉefe afero de nura longo aŭ daŭro de la vokalo, kiel iuj supozas; interalie, la vokalo en „kin“ estas pli malstreĉa, pli meza, pli vasta, kaj malpli longa, ol la vokalo en „keen“. Do la transskriboj *ki:n*, *kin* devas impliki ĉion menciitan. En *Eseoj* WARINGHIEN (1956) ne aplikis la longo-signon, do estus skribinta ambaŭ *kin*. Ĝi estis ekuzita en la *Antologio*, kaj poste en *Lingvo kaj Vivo*; estas evidente, ke oni nun definitive elektis sekvi la duan principon kaj apliki la longo-signon.

En la tabelo oni trovos liston de la dudek unu anglaj vokaloj.² Apud ĉiu vokalo montriĝas angla vorto ĝin ekzemplanta; la transskribo de tiu vokalo laŭ la tri verkoj, kun ekzemploj; kaj la transskribo de ĉiu vokalo, kiu plej bone akordiĝas kun la unua, respektive kun la dua principo. Mi kuraĝas mem proponi, ke estonte oni sekvu la sistemon de ĉi lasta kolumno. Ĝi atencas la duan principon nur en tio, ke ĝi ne montras diferencon inter la vokalo de „bud“ kaj la malforta unua vokalo en „about“; tamen, ĉar la vokalo laste nomita povas okazi nur sen akcento, povas ekzisti kon-

² Por detala klarigo kaj priskribo, vidu JONES (1958).

TABELO

N-ro	Ekzempla vorto	Eseoj I	Lingvo kaj Vivo	Esperanta Antologio	laŭ Principo I	laŭ Principo II
1.	seat	<i>i</i> Freeman <i>frimn</i>	(i:) —	(i:) —	<i>i</i>	<i>i:</i>
2.	sit	<i>i</i> Christie <i>kristi</i>	<i>e</i> Eliot <i>eljrl</i>	(e) Dinwoodie <i>dinŭudi</i>	<i>i</i> aŭ <i>e</i>	<i>i</i>
3.	set	<i>e</i> Bentley <i>benlli</i>	<i>a</i> Ashley <i>aŝli</i>	<i>e</i> Francis <i>frensas</i>	<i>e</i> aŭ <i>a</i>	<i>e</i>
4.	sat	<i>a</i> Carroll <i>kelrɛl</i>	<i>a:</i> Hartley <i>ha:lli</i>	<i>a:</i> Clark <i>kla:k</i>	<i>a</i>	<i>a:</i>
5.	calm	<i>o</i> Darwin <i>daŭn</i>	<i>o</i> Collinson <i>kolinsn</i>	<i>o</i> Johnson <i>ĝonsn</i>	<i>a</i> aŭ <i>o</i>	<i>o</i>
6.	cot	<i>o</i> Crofts <i>krofɕ</i>	<i>o:</i> Warden <i>ŭo:dn</i>	<i>o:</i> Auld <i>o:ld</i>	<i>o</i>	<i>o:</i>
7.	caught	<i>u</i> Auld <i>old</i>	(u) —	<i>u</i> Dinwoodie <i>dinŭudi</i>	<i>o</i> aŭ <i>u</i>	<i>u</i>
8.	good	<i>u</i> Heywood <i>hejŭud</i>	(u:) —	<i>u:</i> Foote <i>fu:t</i>	<i>u</i>	<i>u:</i>
9.	mood	<i>u</i> Cooper <i>kupɔ</i>	<i>x</i> Butler <i>brɛtlɹ⁴</i>	(x) —	<i>x</i> aŭ <i>a</i>	<i>x:</i>
10.	bud	<i>x</i> -Club <i>-klɔb</i>	<i>x:</i> Byrd <i>br:d</i>	(x:) —	<i>x</i>	<i>x:</i>
11.	bird	<i>x</i> -Church <i>-ɕɹlɕ</i>	<i>x</i> Cadwell <i>kaɖɛrl</i>	<i>x</i> Newell <i>njuɛrl</i>	<i>x</i>	<i>x</i>
12.	about	<i>x</i> Daniel <i>denjɛrl</i>	<i>ej</i> Bailey <i>bejli</i>	<i>ej</i> Heywood <i>hejŭud</i>	<i>ej</i>	<i>ej</i>
13.	hay	<i>ej</i> Bailey <i>bejli</i>	<i>oŭ</i> Pope <i>poŭp</i>	<i>oŭ</i> Boulton <i>boŭltɒn</i>	<i>xŭ, eŭ, oŭ</i>	<i>xŭ</i>
14.	hoe	<i>oŭ</i> Holmes <i>hoŭmz</i>	<i>aj</i> Eisenhower <i>ajzna!ŭɔ</i>	<i>aj</i> Price- prajs-	<i>aj</i>	<i>aj</i>
15.	high	<i>aj</i> Christ- <i>krajs-</i>	<i>aŭ</i> Downes <i>daŭnz</i>	<i>aŭ</i> Brown <i>braŭn</i>	<i>aŭ</i>	<i>aŭ</i>
16.	how	<i>aŭ</i> Brown <i>braŭn</i>	(oj) —	(oj) —	<i>oj</i>	<i>oj</i>
17.	boy	(oj) —	<i>i:x</i> Shakespeare	(ix) —	<i>ix</i> aŭ <i>ex</i>	<i>ix</i>
18.	fear	<i>ix</i> Shakespeare	<i>ŝejkspi:x</i>	(ex) —	<i>ex</i>	<i>ex</i>
19.	fair	<i>ex</i> Mayor <i>mer</i>	<i>ex</i> Sinclair <i>sin'kleɔ</i>	—	—	—
20.	core ²	—	—	—	—	—
21.	tour	<i>ux</i> Bournemouth	<i>bu:xnmɛɹ'</i>	—	<i>ux</i> aŭ <i>ox</i> ³	<i>ux</i>

¹ Erare anstataŭ *brɛtlɹɔ*.² Preskaŭ ĉie vokalo 20 kunfalis kun vokalo 7 („court“ prononciĝas same kiel „caught“). Esceptokaze ĝi estas montrbla kiel *ox*.³ Ankaŭ vokalo 21 por multaj kunfalis kun vokalo 7.

*it iz not pritendid d'xt d'is ripo:t! xv d'x ve!xrixs investigejŝxnxz
intx d'x ti:ĉin' xv esprantxŭ xt ŭxn sku:l iz x sajntifik ĉri:tiz,
xnd it ŭud bi ŭajz tu xksept! its kxnklujxnxz xz impreŝxnxz o:
px:lsxnxl kxnvikŝxnxz ra:d'x d'xn mat'maltikxl didxkŝxnxz. nev-x-
d'xles! d'i infxmejŝxn dxz in!dikejt d'xt d'xr iz hixr x fi:ld fx
fru:tfxl risx:ĉl.* (El: WILLIAMS 1960)

Sekvas la ortografia originalo:

It is not pretended that this report of the various investigations into the teaching of Esperanto at one school is a scientific treatise, and it would be wise to accept its conclusions as impressions or personal convictions rather than mathematical deductions. Nevertheless, the information does indicate that there is here a field for fruitful research.

Summary

An occasional phonetic transcription, such as is considered here, is intended not primarily for language students, but for speakers of one language (the 'known' language) who have occasion to quote names or other words from another language (the 'foreign' language). It can be based on one of the two principles:

(I) the rendering of each *sound* of the foreign language by the graph whose corresponding sound in the known language is most similar to that sound; or

(II) the consistent symbolization of each *phoneme* of the foreign language by a different graph in the transcription.

A system for transcribing English pronunciation into Esperanto, devised by WARINGHIEN, is examined from this point of view. It is found that the two principles are often in conflict, since one can be satisfied only at the expense of the other: this conflict is exemplified by modifications later made to the system by its author. Difficulties arise particularly in the representation of the English vowels.

Various further minor modifications to WARINGHIEN's transcription are put forward.

BIBLIOGRAFIO

- AULD, W. (red.), 1958: *Esperanta Antologio*, La Laguna. 641 p.
JONES, D., 1958: *The Pronunciation of English*, Cambridge.
KALOCSAY, K., WARINGHIEN, G., 1958: *Plena Gramatiko de Esperanto*, Milano.
WARINGHIEN, G., 1956: *Eseoj I*, La Laguna. 233 p.
— 1959: *Lingvo kaj Vivo*, La Laguna. 450 p.
WILLIAMS, N., 1960: *Report on the teaching of Esperanto*, Manchester.

Landaj perantoj

(Baza kotizo por unu volumo 250—300-paĝa: 6 usonaj dolaroj. La kotizo estas en aliaj valutoj indikita kun rezervo rilate kursŝanĝojn. Kie ĉe lando ne estas indikita kotizo, la baza kotizo validas)

BRITUJO (35 sh.): S-ino M. C. Major, 1, Pembroke Square, London, W. 2.

ĈEĤOSLOVAKUJO: Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanická 4, Praha 12.

DANLANDO (35 d. kr.): S-ro Eskil Svane, Lindegaardsvej 28 C, Kopenhago-Chl. Poŝtkonto 2661.

FRANCUJO (2500 fr. fr.): Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris 20. Poŝtĉekkonto: 1234-22 Paris.

HISpanUJO (300 pesetoj): S-ro V. Hernández Lluzera, Avda. Ejército Español 59, Sabadell.

HUNGARUJO: D-ro Bálint Szemenyei, Huba-U 38, Orosháza.

JUGOSLAVIO: Slovenia Esperanto-Ligo, Mikloŝičeva 7, Ljubljana.

NEDERLANDO (18 guldenoj): S-ro C. van Es-sen, Floretstraat 10, Rotterdam 25.

POLLANDO: Pola Esperanto-Asocio, ul. Nowy Swiat 27, Warszawa.

SVISLANDO (22 sv. fr.): S-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn.

USONO (6 us. dol.): S-ro R. C. Marble, P. O. Box 4127, Van Nuys, California.

ALIAJ LANDOJ: 70 steloj de Universala Ligo povas esti akceptataj kiel kotizo, sed prefere kontaktu la danan peranton pri demandoj pri kotizo. Kompletigaj informoj pri perantoj aperos en venonta kajero.